





Federación Española de Esperanto  
Hispana Esperanto - Federacio

Rodríguez San Pedro 13 - 3<sup>o</sup> - 7, E-28015 MADRID  
Tel. +34 - (9)1 - 4468072

FRAY LUIS DE LEÓN

---

# LA PERFEKTA EDZINO

EL LA HISPANA, LINGVO TRADUKIS

ESPERANTISTO N.º 10.072

(Augusto Jiménez Loira)

---

PREZO: 2.00 PESETOJ

---

La unua eldono de tiu ĉi verko estis farita en presejo de Johano Fernández, el Salamanka'o la 1583<sup>an</sup> jaron.

---

VALENCIA: 1909

PUBUL Y MORALES. - Editores

Avellanas, 7



Federación Española de Esperanto  
Hispana Esperanto - Federacio

Rodríguez San Pedro 13 - 3<sup>a</sup> - 7. E-28015 MADRID  
Tel. +34 - (91) - 4468078



†

MAG. · FR. · LVISIO · LEGIONENSI

DIVINARVM · HVMANARVQVE  
ARTIVM · ET · TRIVM · LINGVARVM · PERITISS  
SACRORVM · LIBRORVM

PRIMO · APVD · SALMANT · INTERPRETI  
CASTELLAE · PROVINCIALI

NON · AD · MEMORIAM · LIBRIS · INMORTALEM  
SED · AD · TANTAE · IACTVRAE

SOLATIVM · HVNC · LAPIDEM · A · SE  
HVMILEM · AB · OSSIBVS

ILLVSTREM · AVGVSTINIANI

SALMANT · P. · OBIT

AN · MDXCI · XXIII · AVGVSTI · AET · LXIII



## Biografio de monaĥo Ludoviko de Leon

---

En Belmonte'o, vilaĝo de Manĉujo (1) (kastiluja Provinco) estis naskita nia biografiota, la 1527<sup>an</sup> jaron.

Estis liaj gepatroj, ankaŭ Belmonteanoj, noble la gesinjoroj Don (2) Lope de Leon kaj Doña (3) Inés de Valera.

Don Lope de Leon estis nomita kortega advokato la jaron 1533<sup>an</sup> kaj en Madrido loĝis la infano Ludoviko ĝis la 1541.<sup>a</sup> jaro kiam li iris Salamanka'on. Tie, post kelkaj lernadoj, li fariĝis monaĥo de Sankta Agustena komunumo la 1543.<sup>an</sup> jaron, kaj profesis en tiea monaĥejo de Sankta Agusteno la 29.<sup>an</sup> de Januaro de 1544.<sup>a</sup> antaŭ monaĥo Francisko de Nieva hispana provincestro de la komunumo, kiam estis monaĥeprioro monaĥo, Alonso Dávila.

La 24.<sup>an</sup> de Decembro de 1561.<sup>a</sup>, opozicie kontraŭ sep scienculoj, el kiuj kvar estis universitataj profesoroj, li atingis katedron en Salamanka'a Universitato, tiam la plejbona hispana instruejo.

---

(1) La gotoj nomis ESPARTARIO tiun ĉi tervastajon, kaj la araboj MANĤO, ankaŭ nomoj signifas SEKA TERO, kaj vere, tiel estas la hispana lando nun nomata MANĤA.

(2) Hispana titolo kiun uzas nun en Hispanujo preskaŭ ĉiuj homoj.

(3) Viriuseksa ekvivalento de Don.

La 1572.<sup>an</sup> jaron oni kulpigis lin antaŭ la Inkvizicia Tribunalo, pro tio ke li tradukis en la hispana lingvo kaj hispane komentariis ion el la Biblio. Tiu ĉi estis privata laboro farita de li por amiko kiu tion petis de li; sed malbona homo prenis liajn papernotojn kaj perfidis lin.

La 27.<sup>an</sup> de Marto je la sesa vespera horo oni enfermis lin en malliberejon, kie li faris fidan proteston, kaj petis, kaj ricevis, Sankta-Kristan kaj Sankta-Virgulinan imagaĵojn, kaj kelkajn religiajn librojn.

Dum la proceso, malamikaj atestantoj malplibonigis lian situacion, speciale lia universitata kunprofesoro Leono de Castro kaj lia kunmonaĥo Johano Ciguelo, helpitaj de inkvizicia kulpigisto.

Li bone sin defendis, parole kaj skribe, sed Tribunalo prokrastis la aferon, kiel eble plej, kaj nur post preskaŭ kvin jaroj, li povis rehavi sian liberecon.

La 13.<sup>an</sup> de Aŭgusto de 1577.<sup>a</sup> oni absolvis lin, riproĉinte kaj avertinte lin, ke estontece li vidu pri kio kaj kie li parolos pri gravaj kaj danĝeraj aferoj, kaj ankaŭ oni ordonis enfermi la skribaĵojn.

Precipaj kulpoj, kiuj motivis tiun ĉi riproĉon estis, ke tiam estis malpermesite traduki Biblion en kiu ajn lingvo, kaj, ke oni diris, ke li parolis malŝate pri kelkaj interpretadoj el la *Vulgata*'o.

Dum lia ĉeestado en malliberejo, li verkis jen notindajn versaĵojn (1).

Tie ĉi envio kaj mensogo  
 Tenis min enfermitan;  
 Feliĉa la humila stato  
 De la prudentulo, kiu foriĝas  
 El tiu ĉi malbona mondo,  
 Kaj kun malriĉa manĝado kaj domo  
 En la rava kamparo

(1) La tradukinto ne estas esperante nek alilingva poeto, kaj tial li decidis traduki laŭvorte, tiun ĉi kaj ceterajn versaĵojn el tiu ĉi verko.

Sola trapasigas sian vivon,  
 Nur je Dio li sin ordigas,  
 Nek enviata, nek envianta.

Unu jaron post lia liberigo, oni remetis lin al lia katedro.

Liaj historiistoj diras, ke li estis grandsprita homo, tre saĝa, kaj tre instruita, pri hispana, latina, greka kaj hebrea lingvoj; bona latina poeto; el la hispanaj poetoj, tiu de la plej altega spirito, kaj unu el la plej bonaj verkistoj el la hispana lingvo; eminenta instruistulo kaj klera teologo; tiel, ke li estis Teologia Doktoro, titolo kiun tiam havis tre malmultaj personoj.

Doktoro Vincencio Blasco de Lanuza diras (1), ke post Trento'a religia Konsiliĝo, Salamanka'a Universitato konsultis lin pri kalendara reduĝto.

En religia Konsiliĝo okazinta en Toledo la 3.<sup>an</sup> de Decembro de 1588.<sup>a</sup> prezidita de la Ĝenerala monaĥo Gregorio Elparencse, kiu poste estis kardinalo, oni komiziis lin, por ke li faru konstituciojn, kiuj estis aprobitaj, por la Agustenanoj nudpiedaj monaĥoj.

Post tio ĉi, li estis nomita Ĝenerala Vikario de ilia komunumo en Kastiluja provinco.

Estas juveloj de la hispana literaturo, inter aliaj, liaj tradukoj de «*La Salomonaj himnoj*,» de «*Davidaj laŭdoj Miserere mei Deus*,» verse, kaj de grekaj kaj aliaj latinaj klasikulaj verkoj; kaj ankaŭ liaj originalaj verkoj, «*Los nombres de Cristo*,» — «*Comentario sobre el Apocalipsis*,» — «*Lectura de teologia Escolastica*,» — «*Oracion latina alabando á S. Agustin*,» k. t. p. Kreditigis lin kiel bonega latina verkisto, «*Explanationem Cantorum Salomonis*,» «*In Salmum Vigesimum Sextum Explanationis*,» kaj aliaj.

Lia verko «*El Perfecto Predicador*,» ne estas publikigita; domaĝe, ĉar en Hispanujo ne estis tiam oratoro de tiel altega stilo kiel li.

(1) *Historio de Aragonlando Vol. IV.<sup>a</sup>, Lib. 5.<sup>a</sup>, ĉap. 44.<sup>a</sup>*

Pro ordono de la Reĝa Konsilantaro, li ekzamenis la verkojn de Teresa de Jesuo, kaj, de li aprobitaj, li faris ilian antaŭparolon. Admiranto de tiu ĉi Sanktulino, li komencis verki ŝian vivon; sed morto tranĉis lian, antaŭ ol li finis tiun ĉi taskon.

Kiel poeto, ankaŭ li estis notinda; tiel, ke nia fama satirverkisto proza kaj versa Don Francisco de Quevedo Villegas, kiu travivis de 1580.<sup>a</sup> ĝis 1645.<sup>a</sup> jaroj, arigis kaj eldonis du fojojn liajn versojn.

La suno hispana, la grandega Cervantes, ankaŭ, kiel Quevedo, estis samtempulo, (1543.<sup>a</sup> 1610.<sup>a</sup>) de nia humila monaĥo, pri kiu li diras verse (1):

Mi volus fini mian dolĉan kanton  
En tia okazo, paŝtistoj, laŭdante  
Geniulon, kiu mirigas la mondon  
Kaj, kiu povus ekstaze trudaltiri vian animon.  
En li mi kompendias kaj enmetas ĉion, kion  
Mi montris ĝis tie ĉi, kaj mi estas montronta al vi:  
Monaĥo Ludoviko de Leon estas tiu, pri kiu mi diras,  
Kion mi respektegas, adoras kaj sekvas.

En Aŭgusto de la 1591.<sup>a</sup> jaro, la Aŭgustenaj ĉefaj monaĥoj kunvenis en Madrigal'on, vilaĝo el la Avila'ra provinco, kie estis naskita la reĝino Isabel'o La Katolika. Kun ili estis la saĝa Ludoviko, kaj inter aliaj komunumaj aferoj, kiujn oni tie traktis, li estis nomita komunuma Provincestro. Malfeliĉe por malmulte da tempo, ĉar en tiu mem monato, la 23.<sup>an</sup> tagon, li mortis.

Oni kondukis lian kadavron al la monaĥejo de la Aŭgustenanoj en Salamanka'o, en kies kolonkorto kuŝas antaŭ altaro de Nia Sinjorino de la *Populo*, sub tombŝtono, kun latina enscribo, kies esperanta traduko jen estas:

*Al granda monaĥo Ludoviko de Leon, lertega viro*


(1) *Galatea, Lib. VI.<sup>a</sup>*

*en la diaj kaj homaj sciencoj kaj en la konado de tri lingvoj. Klariginto de Sanktaj Libroj en Salamanka'o. Kastiluja Provincestro. Ne por memoro, kiu estas jam senmorta per la libroj, sed por konsolo en tiel granda perdo, tiun ĉi ŝtonon, per ĝi mem humila, sed glora pro liaj mortrestaĵoj, dediĉas la Aŭgustenanoj. Li pie mortis en Salamanka'o la 23.<sup>an</sup> de Aŭgusto de 1591.<sup>a</sup>, sesdekkvarjara.*

A. J. L.

---







## Al Ŝia Moŝto Sinjorino Mario Valera Osorio

---

### ENKONDUKO

---

Kie oni parolas pri la leĝoj kaj kondiĉoj de la edzeca stato kaj pri la premanta devigo de edzino por okupi sin en ilia plenumo.

Tiu ĉi nova stato en kiu Dio metis vian Moŝton, submetinte vin sub la leĝoj de la sankta edzeco, kvankam ĝi estas, kiel larĝa vojo, pli neĉirkaŭita kaj malpli klopoda ol aliaj, tamen ne mankas en ĝi malhelpoj kaj malbonaj paŝoj: kaj estas vojo kie oni ankaŭ faletas, kaj oni danĝerostas kaj eraras, kaj en kiu oni bezonas gvdiston kiel ĉe la aliaj; ĉar servadi la edzon, kaj guvernadi la familion, kaj la kleradon de la gefiloj, kaj la respondecon kiun, kune kun tiu ĉi, oni ŝuldas al la timo de Dio kaj al la gardo kaj pureco de la konscienco (ĉio, kio apartenas al stato kaj al ofico de virino, kiu edziniĝas) estas agoj, el kiuj, ĉiu per si mem bezonegas multan zorgon; kaj kiujn, ĉiujn kune, sen speciala favoro de la ĉielo, oni ne povas plenumi. En tio, kio trompiĝas multaj virinoj, kiuj pensas, ke edziniĝi estas nur forlasi la patran

hejmon, kaj transloki sin al tiu de la edzo, kaj eliĝi el servuto kaj alveni al libereco kaj bontroveco; kaj ili pensas, ke naskante filon iam post iam, kaj poste forjettante ĝin en la brakojn de nutristino, ili estas ĝustaj kaj perfektaj virinoj.

Kaj tial, ja, ke la bona prudento de via Moŝto kaj la inklino al ĉiu virto por kiu Dio dotis vin, certigas min por ne timi, ke vi estos kiel iu el tiuj ĉi, kiujn mi diras tamen la profundan amon, kiun mi pri vi sentas, kaj la deziro pri via bono, kiu en mi brulas, vekas min, por ke mi liberu al vi ian avizon, kaj por ke mi serĉu, kaj ekbruligu ian lumon, kiu sen trompo nek eraro, lumigu kaj rektigu vian iradon tra ĉiuj malbonaj paŝoj de tiu ĉi vojo, kaj en tutaj ĝiaj kurboj kaj malrektajoj.

Kaj, kiel kutimas kiuj faris longan marveturon aŭ, kiuj pilgrimis tra fremdaj lokoj, kiuj al tiuj el siaj amikoj, kiuj volas entrepreni sammarveturon kaj samvojon, antaŭ ol ili ĝin komencos, kaj antaŭ ol ili eliros el siaj hejmoj, diligente kaj zorge ili diras detalete al ili, la lokojn, kiujn ili devas transveturi, la aferojn pri kiuj ili devas sin gardi, kaj al ili avertas pri ĉio, kion ili kredas necesa al ili; tiel mi dum tiu ĉi vojirado, kiun via Moŝto komencis, mi instruos al vi, ne tion, kion estinta sperto lernigis al mi, ĉar ĝi estas malpropra de mia profesio, sed tion, kion mi lernis en la sanktaj tekstoj, kiuj estas instruado de la Sankta Spirito. En kiuj, kiel en komuna butikoj, kaj, kiel en publika kaj ĝenerala aĉetejo, la pieco kaj la dia saĝeco sufiĉege metas por la uzado kaj ĝenerala profito de la tuta homaro, ĉion, kio estas necesa kaj taŭgas al ĉiu stato; kaj precipe en tiu ĉi de la edzinoj, oni elekzamenas kaj tiel subeniras al ĝiaj privatecoj, ke eĉ enirante hejmojn de la virinoj, oni celas meti al ili kudrilon en la manon kaj zoni al ili ŝpinaĵon kaj movigi ŝpinilon inter iliaj fingroj.

Ĉar vere kvankam la edzeca stato, estas pri graŝeco kaj perfekteco malpli granda ol tiu de la sindetenemuloj,

aŭ gevirguloj, pro ĝia neceseco en la mondo por la konservado de la homaro, kaj por ke eliru el ĝi tiuj naskitaj por esti filoj de Dio, kaj por honori la teron kaj gajigi la ĉielon per gloro; tial, ĝi estis ĉiam tre honorita kaj privilegiata de la Sankta Spirito en la sanktaj tekstoj. Ĉar per ili ni scias, ke tiu ĉi stato estas la unua kaj la plej antikva el ĉiuj statoj: kaj ni scias, ke ĝi estas vivmaniero ne elpensita post kiam nia natureco malvirtigis pro la peko kaj estis kondamnata je morto, sed ordonita en la komenco, kiam la homoj estis senmankaj kaj feliĉege perfektaj en la paradizo. Ili mem instruas al ni, ke Dio per sia persono ordigis la unuan estintan edziĝon, kaj, ke Li kunigis la manojn al la du unuaj geedzoj kaj benis ilin, kaj Li estis kvazaŭ ni dirus, la svatisto kaj la pastro. Tie ni vidas, ke la unua vero kiun oni skribis en ili, kiun Dio diris por nia instruado, kaj la unua doktrino kiu eliris el sia buŝo, estis la aprobo de tiu ĉi kunigo, dirante. *Ne estas bone, ke la homo estas sola* (1).

Kaj ne nur en la libroj de la Malnova Teksto, laŭ kiuj, estis senfrukta estis malbeno, sed ankaŭ en tiuj de la Nova, en kiuj, oni konsilas kaj ĝenerale oni publikigas laŭte, kaj kvazaŭ laŭ sono de trumpeto la sindetenemon kaj la virgecon, al la edzeco estas farataj novaj favoroj.

Kristo nia bono, estante la floro de la virgeco, kaj grandega amanto de la virgeco, kaj grandega amanto de la konveneco kaj pureco, estis invitata en ian edziĝfeston, kaj al ĝi ĉeestis, kaj en ĝi manĝas, kaj ĝin sanktigas, ne nur per la majesteco de sia ĉeesto, sed per unu el siaj unuaj kaj notitaj mirakloj (2). Li mem, kiam malfortigis la edza leĝo, kaj kvazaŭ malstreĉigis iamaniere la premanta edzigo, kaj kiam tralasis homoj multajn aĵojn malproprajn de la pureco, kaj firmeco, kaj unueco, kiun

(1) Genesis, ĉap. 2.<sup>a</sup> ver 18.<sup>a</sup>

(2) Job, ĉap. 2.<sup>a</sup>

oni ŝuldas al ĝi, tial, ke preni viro virinon nur estis iom pli ol ricevi salajre servantan knabinon por laŭvola tempo, Kristo mem inter la ĉefaj partoj de sia doktrino, kaj inter la aferoj por kies rimedo estis sendita de sia Patro, Li faris ankaŭ la rebonigon de tiu ĉi sankta ligo, kaj tiel, Li remetis ĝin en la antikvan kaj unuan gradon (1). Kaj, kio estas super ĉio, Li faris el la edzeco, kiun interkonsentas la homoj inter si, signifon kaj sanktegan sakramenton de la ama ligo per kiu Li ligiĝas al la animoj; kaj volis, ke la edza leĝo de viro kun virino estus kiel portreto kaj viva bildo de la dolĉega kaj prēmega unueco, kiu estas inter Li kaj Lia Eklezio (2); kaj tiel, Li nobligis la edzecon per riĉegaj donoj de sia favoro, kaj de aliaj bonfaroj de la ĉielo.

Tiel, la stato de la geedzoj estas nobla kaj sankta stato, kaj tre amata de Dio: kaj ili estas avizataj tre aparte kaj tre detale, pri tio, kio al ili konvenas, en la sanktaj verkoj, per la Sankta Spirito: kiu per sia grandega bono, ne malŝatiĝas meti sian vidon en niajn mizerojn, nek konsideras humilega aŭ malgrandega ian aĵon el tiuj, kiuj profitas nin.

Ĉar, inter aliaj multaj lokoj de la diaj libroj, kiuj rilatas pri tio, la plej adekvata loko, kaj en kiu estas kvazaŭ resumata, aŭ ĉio, aŭ la plejmulto el kio al tiu ĉi afero aparte apartenas, estas la lasta ĉapitro de la *Proverboj*, kie Dio per buŝo de Salomono, Lia reĝo kaj profeto, kiel sub persono de virino, patrino de sama Salomono, kies vortojn li metas kaj rilatas per belegaj tialoj, li elplene pentras ian virtan edzinon, kun ĉiuj ŝiaj koloroj kaj partoj: por ke tiuj, kiuj pretendas tiaj esti, (kaj tion devas pretendi ĉiuj kiuj edziniĝas) ili vidiĝu en ĝi kiel en helega spegulo; kaj ili sciĝu, tie vidante sin, pri tio, kio al ili konvenas por plenumi ilian devon.

(1) Mat, ĉap. 19.<sup>a</sup>

(2) Ad Ephes, ĉap. 5.<sup>a</sup>



Kaj tiel, konforme kun tio, kion kutimigas fari tiuj, kiuj ŝcias pri pentrado, kaj montras kelkajn bildojn, bonege laboritajn, al tiuj, kiuj ne komprenas tiel multe pri tiu arto, ke ili atentigas al ili malproksimaĵon, kaj tion, kio estas pentrita kiel proksima, kaj sciigas al ili la lumojn, kaj la mallumojn kaj la forton de la plimalgrandigo pro perspektivo, kaj per la lerteco de la vortoj faras, ke tio, kio sur la tabulo ŝajnas esti morta, ĝi jam vivu, kaj preskaŭ sin agitu, kaj moviĝu antaŭ la okuloj de la vidantoj: tiel mia ofico pri tio ĉi, kion mi skribas, estos prezenti al via Moŝto tiun ĉi bildon, kiun mi diris elfaritan de Dio, kaj ĝin meti antaŭ viajn okulojn, kaj montri al vi per la vortoj, kvazaŭ per fingro, kiel eble mi povos, ĝiajn belegajn figurojn kun ĉiuj iliaj perfektajoj, kaj fari, ke vi klare vidu tion, kion per grandega artifiko la scio kaj la mano de Dio metis kaŝitan en ĝi.

Sed antaŭ ol mi alvenos al tio ĉi, kio estas elmontri la leĝojn kaj kondiĉojn, kiujn sur si havas la edzino, estas bone, ke via Moŝto konu la premantan devon, kiun vi havas vin okupi pri ilia plenumado, tute sindonante al ili per varmega deziro. Ĉar tiel, kiel ĉe kia ajn afero aŭ ofico kiun oni pretendas, por sukcesi, oni bezonas du cirkonstancojn, unu scii tion, kio ĝi estas, kaj ĝiajn kondiĉojn, kaj tion el kio, ĝi precipe konsistas; kaj alian, ŝati ĝin vere; tiel pri tio ĉi, kion ni traktadas, antaŭ ol ni parolos per la intelekto, kaj ni malkaŝos el ĝi tion, kio tiu ofico estas, kun ĉiuj ĝiaj ecoj kaj partoj, taŭgos, ke ni inklinu vian volon al ŝatado de ilia sciado, kaj, ke sciinte ilin, vi bonvolu sindoni al ili.

Pri kio, mi ne pensas uzi multajn vortojn, nek estos necese por via Moŝto, kiu estas kompreneble inklinita al boneco, ĉar tiu, kiu timas Dion, por ke li deziru kaj penu kontentigi sian staton, sufiĉas al li scii, ke Dio, tion alsendas al li, kaj, ke same kaj aparte, kion Li petas al ĉiu estas, ke li korespondu al la devo de sia ofico, plenumante la sorton kiu estis difinita al li; kaj, ke se en

tio ĉi li kulpiĝas, kvankam en aliaj aferoj li preterir kaj rimarkiĝu, li ofendas Lin.

Ĉar, kiel en milito, soldato, kiu forlasas sian lokon ne plenumas la devon por sia kapitano, kvankam pri aliaj aferoj li servu lin; kaj tiel, kiel en la komedio la vidanto malaplaŭdas malbonulon je persono kiun ĝi prezentas kvankam pro lia propra ĝi estas tre bona; tiel la homoj kiuj malatentas siajn oficojn, kvankam ĉe aliaj virtoj ili estas zorgemaj, ili ne kontentigas Dion. Ĉu via Moŝto havus por si kiel kuiriston, kaj donus salajron, al iu, ne scianta savi kuirmanĝaĵon, sed kiu bone ludu gitareton? Do, tiel, Dio ne volas en sia hejmo tiun, kiu ne plenumas la oficon, kiun Dio difinis al li.

Kristo diras en la Evangelio, ke *ĉiu prenu sian krucon* (1). Li ne diras, ke li prenu malpropran, sed ordonas, ke ĉiu ŝarĝu sur sin, sian propran. Li ne volas ke religiulino forgesu, tion, kio estas ŝia devo kiel religiulino, kaj prenu sur sin la zorgojn de edzino; nek plaĉas al Li, ke edzino forgesu la mastrumadon de sia domo kaj monaĥiniĝu.

Plaĉas al Dio la edzo, estante bona edzo, kaj estante bona religiulo, la monaĥo, kaj la komercajisto farante dece sian oficon, kaj eĉ la soldato servas Dion montrante ĝustatempe sian kuraĝon kaj per la kontentiĝo pri sia salajro, kiel tion diras sankta Johano (2). Kaj la kruco kiun ĉiu devas surporti kaj per kiu li estas atingonta ĉeesti kun Kristo, ĝuste estas la devigo kaj la ŝarĝo kiun ĉiu havas, kaŭze de la stato je kiu ĉiu vivas. Kaj kiu plenumas ĝin, tiu kontentigas Dion, kaj trafas sian celon, kaj restas honorita, kaj glora, kaj kvazaŭ per la penado de la kruco, atingas la ripozon kiun li meritas.

Sed kontraŭe, kiu ne plenumas tion ĉi, kvankam multe laboru por plenumi aliajn oficojn, kiujn li bonvol

(1) Luk, ĉap. 11.<sup>a</sup>, ver. 27.<sup>a</sup>

(2) Luk, ĉap. 3.<sup>a</sup>, ver. 14.<sup>a</sup>

prenas sur sin, tiu perdas la laboron kaj la favorojn. Sed estas la blindeco de la homoj, tiel mizera kaj tiel granda, ke ne estante dubo pri tiu ĉi vero, kvazaŭ estus kontraŭe, kaj, kvazaŭ estus al ni malpermesate plenumi oficojn, kiuj estas precize, tiuj, kiujn ni ekzercas, tiel ni havas malamon al ili, kaj foriras el ili, kaj ni metas tutan nian scion kaj zorgon por fari la malproprajn.

Ĉar, vidos via Moŝto kelkajn religiistajn personojn, kiuj, kvazaŭ ili estus edzigitaj, ilia precipa zorgo estas mastrumi la domojn de iliaj parencoj aŭ de aliaj personoj, kiujn ili volonte prenis sur sin, kaj, ke se oni akceptas aŭ forpermesas la servanton, tio devas esti farita per ili mem, kaj se oni pretigas la ĉambraron por la vintro, tio estas ordonita de ili autaŭe. Kaj kontraŭe, estas aliaj, inter la edzigitaj, kiuj, kvazaŭ iliaj domoj estus bienaĵoj de iliaj najbarinoj, tiel malatentas ilin, kaj ilia tuta vivo estas la preĝeja ĉambro, kaj la preĝlibro, kaj la varmado de la preĝeja planko, vespere kaj matene; kaj dume, malvirtigas la servantino, kaj prenas malbonajn kutimojn la filino, kaj la bieno ruiniĝas, kaj la edzo fariĝas demono.

Kaj se la plenumado de tio, kio ne estas ilia ofico, estus al ili pli facile, ol plenumi sian devon, ili havus iomete da senkulpigo; aŭ iel estus konsolo por ili, se post la klopodoj pro tio, kion ili bonvole prenas sur sin, ili havus sukceson; sed estas kontraŭe, ĉar la religiulo eĉ multe peninte, ne regos dece la vivon de la edza homo, kaj neniam la edza homo trafos tion, kio estas esti religiulo. Ĉar, tiel, kiel la vivo ĉe la monaĵo, kaj la leĝoj, kaj ilia plenumado, kaj ĉiu interrilato kaj fundamento de la monaĥa vivo favoras kaj helpas la religian vivmanieron, por kiu celo ĉio estas ordigata; tiel, por tiu, kiu estante monaĥo, forgesas la monaĥecon kaj okupas sin pri tio, kio estas edzeco, ĉio fariĝas al li malhelpo kaj tre grava embaraso. Kaj, kiel liaj intencoj, kaj pensoj, kaj la celo al kiu ili sin turnas, ne estas

monaĥejo; tiel li faletas, kaj kulpigas ĉe ĉio, kio estas monaĥeco; ĉe la enirejo, ĉe la kolonkorto, ĉe la ĥorejo kaj silento, ĉe la severmoreco kaj humileco de la vivo. Pro tio konvenas al li, aŭ forlasi sian frenezan obstinon, aŭ batali kontraŭ eskadrono da gravaj malfacilaĵoj, kaj levi, kiel oni diras, akvon super turon.

Tiel same, ke la vivmaniero de la edzino invitas ŝin kaj kuraĝigas ŝin al la mastrumado, tiel pro milo da tialoj apartigas ŝin de tio, kio estas monaĥineco aŭ religiulineco. Kaj tiel unuj kaj aliaj, ne volinte fari tion, kio al ili propre respondas, kaj volinte distingi sin pri tio, kio ne estas ilia ofico, malplenumas sian devon kaj ne atingas tion, kion ili pretendas, kaj laboras senkompare pli ol laborus, se ili laborus por fari sin perfektaj, ĉiu en sia ofico, kaj restas ilia laboro sen lumo kaj sen frukto.

Kaj, kiel en naturo la monstroj, kiuj estas naskitaj kun partoj kaj membroj de malsimilaj bestoj, ne prosperas, nek vivas; tiel, tiu ĉi monstreco de malsamaj statoj, estas kunigo, parte de la profesio kaj parte de la agoj, kaj kiuj ĝin sekvas, tiuj ne atingas siajn intencojn. Kaj, kiel naturo malamas la monstrojn, tiel Dio foriras el tiuj ĉi, kaj ilin abomenas. Kaj, tial, Li diris en la malnova leĝo, ke nek en la kampo oni dissemos malsimilajn semojn, nek en la teksaĵoj la interkruciĝantaj fadenoj estos el malsamaj specoj (1), nek malpli oni prezentos al Li, ofere, beston kiu vivas en akvo kaj sur tero (2).

Do, metu via Moŝto sur sian koron, firmege, ke esti bona amikino de Dio estas esti bona edzino, kaj, ke la bono de via animo estas esti perfekta en via stato, kaj, ke klopodi, kaj vigli pri tio, estas fari al Dio oferon, al vi mem tre agrablan.

Kaj mi ne diras, nek trapasas tra mia cerbo, tio, ke

(1) Lev., ĉap. 19.<sup>a</sup>, ver. 9.<sup>a</sup>

(2) Deuter., ĉap. 14.<sup>a</sup>

al geedzoj, aŭ al iu ajn devas manki preĝo; sed mi diras la diferencon kiu devas ekzisti inter bona religiulino kaj bona edzino. Ĉar ĉe tiu, preĝado estas tuta ŝia ofico; ĉe ĉi tiu, la preĝo devas esti perilo por ke ŝi pli bone plenumu sian oficon. Tiu ne volis edzon, kaj malŝatis la mondon, kaj adiaŭis ĉiujn, por konversacii ĉiam kaj senbare kun Kristo; tiu ĉi estas traktonta Kriston por atingi bonvolon kaj favoron, per kiuj ŝi sukcesos eduki la filon, kaj bone mastrumi, kaj servi kiel decas la edzon. Tiu estas vivonta por senĉese preĝi; ĉi tiu estas devigita preĝi por vivi kiel decas. Tiu plaĉas al Dio raviĝante je Li; tiu ĉi devas servi Lin laborante en mastrumado de sia domo por Li.

Sed pripensu via Moŝto, kiel rebrilas la grandeco de la dia boneco en tio, ke Li prenas, kiel servaĵon nian, tion mem, kio estas por nia profito. Ĉar vere, kvankam ne estus alia aĵo, kiu klinus la edzinon fari sian devon, krom la paco, kaj la kvieteco, kaj la granda bono kiun en tiu ĉi vivo ili ricevas, kaj el kiu profitas la bonulinoj, estante bonaj, nur tio ĉi sufiĉus. Ĉar oni ja scias, ke, kiam virino zorgas pri sia ofico, ŝia edzo amas ŝin, kaj la familio vivas bonordege kaj la gefiloj lernas virton, kaj la paco reĝas, kaj kreskas la havo.

Kaj tiel, kiel plenan lunon, dum serenaj noktoj, oni ĝuas, ĉirkaŭitan kaj kvazaŭ akompanitan de helegaj lumoj, kiuj, ĉiuj ŝajnas pliigi en ĝi sian brilon, kaj rigardadas kaj riverencas ĝin, tiel la bona virino en sia domo regas kaj brilas, kaj turnigas al si, kune, la okulojn kaj la korojn de ĉiuj. La helpo kaj la sendanĝereco akompanas ŝin, kien ajn ŝi iras; kaj, kien ajn ŝi ekrigardas, tie ŝi trovas gajon kaj ĝojon; ĉar se ŝi metas la okulojn en sian edzon, ŝi konsoliĝas en lia amo; se ŝi ilin turnas sur siajn gefilojn ŝi gajiĝas pro ilia virto; ŝi trovas en la geservistoj bonan kaj fidelan servon, kaj en la havo profiton kaj pligrandiĝon, kaj ĉio estas al ŝi ŝatinda kaj gaja: kiel kontraŭe, al tiu, kiu estas malbona mastrum-



antino, ĉio fariĝas por ŝi maldolĉaĵoj, kiel oni povas vidi per senfinaj ekzemploj.

Sed mi ne volas haltigi min ĉe afero bedaŭrinde tiel klara, nek mi volas forigi vian moŝton el via vilaĝo mem. Turnu via moŝto la okulojn al viaj genajbaroj kaj gevilaĝanoj, kaj dismovu en via memoro tion, kion pri aliaj aferoj vi aŭdis. Pri kiom da virinoj vi scias, ke ne zorginte pri ilia stato kaj okupi sin je iliaj deziregoj, ili staras kun siaj edzoj en ĉiama malpaco kaj malfelico? Kiom da ili vi vidis ofenditaj kaj mallaŭditaj pro malkonsentoj de iliaj filoj kaj filinoj, pri kiuj, ili ne volis atenti? Kiom da ili suferas en ekstrema malriĉeco, ĉar ili ne gardis siajn havaĵojn, aŭ pli bone dirante, ĉar ili perdis ilin kaj estis ilia blato?

Tiel estas, ke ne estas aĵo pli bonega, nek pli feliĉdona ol bona virino; nek pli malbona nek malfeliĉa, ol edzino kiu ne estas tio: kaj la unu kaj la alian instruas al ni la Sankta Skribo: Pri la bona diras jen:

«Edzo de bona virino estas feliĉa; kaj vivos duoblajn tagojn: kaj meritoplena virino ripozigas sian edzon, kaj finigos pace la jarojn de lia vivo.

»Bona virino estas bona sorto, kaj kiel premio al tiuj, kiuj timas Dion, Dio donos ŝin al homo pro liaj bonaj agoj (1).

»La bono de diligenta virino ravas lian edzon, kaj plenigos, je medulo, liajn ostojn.

»Granda donaco el Dio estas ŝia bona interrilato (2): bono sur bono, kaj beleco sur beleco estas virino, kiu estas sankta kaj honesta.

»Kiel leviĝanta suno, ŝajnas en la ĉielaj altecoj, tiel la vizaĝo de bonedzino ornamas kaj beligas ŝian domon (3).»

Kaj pri la malbona diras kontraŭe.

(1) Eccles, ĉap. 26.<sup>a</sup>, ver. 1.<sup>a</sup>, 2.<sup>a</sup>, 3.<sup>a</sup>

(2) Ibid, ver. 16.<sup>a</sup>, 17.<sup>a</sup>

(3) Ibid, ver. 19.<sup>a</sup>, 21.<sup>a</sup>

«La ĵaluzulino estas kordoloro, kaj plorado (1), kaj traktadi malbonulinon, estas kunrilati kun skorpio (2).

»Domo pluviĝanta estas bataletema virino (3), kaj, kio malordigas la vivon estas edziĝi kun tiu malamindulino (4).

»La kormalgajeco estas la plej granda el la vundoj, kaj la malboneco de la virino estas ĉiuj malbonaĵoj kune.

»Ĉian vundon kaj ne korvundon (ni havu): ĉian malbonon kaj ne virinmalbonon (ni havu) (5).

»Ne estas pli malbona kapo, ol kolubra kapo, nek kolero kiu egalas tiun de la kolerigita virino.

»Vivi kune kun leonoj kaj drakoj estas pli elportebla, ol kunvivi kune kun malbonfaranta virino (6).

»Ĉiu malbono estas malgranda, kompare kun malbona virino: al pekintoj respondu tia sorto.

»Kiel estas sabla supreniro por maljunaj piedoj, tiel estas por modestulo, malbonparolanta virino (7).

»Senkuraĝigo de koro, kaj mortiga vundo, estas malbona virino.

»Tranĉo de kruroj kaj defalo de manoj estas virino, kiu ne plezurigas sian edzon.

»La virino komencigis la pekon, kaj pro ŝi, ni ĉiuj mortos (8);» kaj tiel, aliajn multajn tialojn.

Kaj okazas pri tio mirinda afero, ke estante virinoj en si mem personoj alte ŝatantaj indecon, kaj deziregantaj esti estimataj kaj honorataj, kiel estas ĉiuj, kiuj estas malkuraĝuloj, kaj ŝatante venki unu la alian, eĉ ĉe malgrandaj aferoj kaj infanaĵoj; ili ne sin estimigas, pli bone

(1) Eccles., ĉap. 26.<sup>a</sup>, ver. 8.<sup>a</sup>

(2) Ibid, ver. 10.<sup>a</sup>

(3) Prov., ĉap. 19.<sup>a</sup>, ver. 13.<sup>a</sup>

(4) Ibid, ĉap. 30, ver. 23.<sup>a</sup>

(5) Ecclesiast, ĉap. 25.<sup>a</sup>, ver. 17.<sup>a</sup>, 18.<sup>a</sup>, 19.<sup>a</sup>

(6) Ecclesiast, ver. 22.<sup>a</sup>, 23.<sup>a</sup>

(7) Ibid, ver. 26.<sup>a</sup>, 27.<sup>a</sup>

(8) Ibid, ver. 31.<sup>a</sup>, 32.<sup>a</sup>, 33.<sup>a</sup>

ili malzorgas kaj forgesas tion, kio estas ilia propra virto kaj laŭdo.

Plaĉas al virino ŝajni pli bela ol alia, kaj se eĉ ŝia najbarino havas pli bonan jupon, aŭ se okaze uzas pli bonan elpensitan hararanĝon, ŝi ne elportas tion pacience; kaj se pri tio, esti mastrino de sia domo, oni superas ŝin, tiam, ŝi nek klopodas nek suferas, plibone ŝi faras honoraferon el kiu ajn bagatelo, kaj nur tio ĉi ne estimas. Kaj tamen, esti venkita pri tio, ne difektas ŝin kaj ne venki pri tio ĉi, detruas ŝin; ĉar, tio ne estas pro ŝia kulpo, kaj tio ĉi, detruas tutan ŝian bonon kaj tiun el ŝia domo: laŭdo, kiun pro tio oni atingas, estas tuj pasanta kaj vana laŭdo, kaj laŭdo kiu pereas antaŭ ol naskiĝo: kaj tia, ke se ni parolas vere, ne meritas esti nomita laŭdo: kaj kontraŭe, laŭdo, kiun per tio oni atingas, estas masiva laŭdo, kiu havas verajn radikojn, kiu floras per buŝo de prudentuloj, kaj, ke ne finiĝas per la aĝo, nek per la tempo eluziĝas; plibone per la jaroj ĝi kreskas, kaj la maljuneco renovigas ĝin, kaj la tempo fortikigas ĝin, kaj la eterneco speguliĝas en ĝi, kaj resendas ĝin ĉiam pli viva kaj freŝa dum miloj da cent-jaroj.

Ĉar la bonan virinon, ŝia familio respektegas, kaj ŝiaj filoj amas ŝin, kaj ŝia edzo amegas ŝin, kaj ŝiaj najbaroj benas ŝin, kaj la samtempuloj kaj la estantoj kaj la posteuloj ŝin laŭdas kaj ŝin plialtigas.

Kaj vere, se estas sub la luno io, kio meritas esti estimata kaj taksata, tio estas la bona virino; kaj kompare kun ŝi, la suno mem ne lumas, kaj la steloj estas malhelaj. Kaj mi ne scias pri juvelo, multekosta nek laŭda, kiu, tiel altigas kaj beligas la homojn, per heleco kaj brilo, kiel tiu trezoro de nemortemaj bonoj, de honesteco, de mildeco, de fido, de vereco, de amo, de pieco kaj ŝateco, de ĝojo kaj paco, kiujn enhavas kaj fermas en si bona virino, kiam lia bona feliĉo ŝin donas al li por kunulino.

Ĉar se Eŭripido (1), saĝa verkisto, ŝajne supraĵe, diras malbone pri ĉiuj virinoj, kaj diras, ke se iu el pasintaj tempoj diris malbone pri ili, kaj se iu el estantaj tion diras, aŭ se tion diras la postvenontaj, ĉio, kion ili diris, kaj diras, kaj diros, li sola ankaŭ volas diri, kaj tion diras. Sed se tion ĉi li diras, ne estas li mem kiu diras, kaj kiu tion diras, tiu havas justan senkulpigon pro tio, ke Medeo estis kaŭzo de la diro.

Sed, ĉar ni jam tien ĉi alvenis, prave devas silenti miaj vortoj kaj eksonori tiuj de la Sankta Spirito, Kiu ĉe la doktrino de la bonaj virinoj kiun Li metis en la Proverbojn (2), kaj mi prezentas nun tie ĉi al via Moŝto, komencas per tiuj ĉi samaj laŭdoj per kiuj mi nun finas, kaj Li diras, per malmultaj tialoj, tion, kion neniam lango, per multaj, povus diri, kaj tiel diras:

## I

### Kelkaj avertoj de la aŭtoro por eniri en la traktadon de la afero.

*Kiu trovos valoran virinon? Malofta kaj grandega estas ŝia prezo* (3).

Sed antaŭ ol komenci, konvenas al ni antaŭcertigi, ke ĉe tiu ĉi ĉapitro la Sankta Spirito ne nur prezentas bonan edzinon, elmontrante la devojn kiujn ŝi havas, sed ankaŭ Li diras kaj elmontras, kaj kvazaŭ kaŝas sub tiu ĉi pentraĵo, aferojn pli grandajn kaj de pli alta signifo, kiuj apartenas al la tuta Eklezio.

(1) In Hecuba.

(2) Prov., ĉap. 31.<sup>a</sup>

(3) Prov., ĉap. XXXI.<sup>a</sup>, ver. 10.<sup>a</sup>

Car oni devas kompreni, ke la Sankta Skribo, kiu estas dia parolado, estas kiel bildo de la kondiĉo kaj naturo de Dio. Kaj tiel, kiel la Dieco estas kune unu sola perfektaĵo kaj multaj malsamaj perfektaĵoj; unu pro simpleco, kaj multaj pro valoro kaj eminenteco; tiel la Sankta Skribo per samaj vortoj diras multajn kaj malsamajn esprimojn; kaj, kiel instruas la sanktuloj, la simpleco de unu sentenco enhavas grandan gravedecon de signifoj. Kaj, kiel ĉe Dio, ĉio, kio enestas estas bona, tiel en Li Skribo ĉiuj sencoj, kiujn metis en ĝi la Sankta Spirito estas veraj. Maniere, ke sekvi unu sencon, ne estas malakcepti la alian; nek malpli, kiu ĉe tiu sanktaj tekstoj malkovras unu el la multaj sencoj, kiujn ili enhavas, tiu ne devas, pro tio, esti konsiderata kiel homo, kiu malakceptas la aliajn sencoj.

Mi, do, diras, ke en tiu ĉi ĉapitro, Dio, per Salomona buŝo, per samaj vortoj plenumas du aferojn. Unu instruas kaj ordigas la morojn; la alia profetas sekretajn misterojn.

La moroj, kiujn Li ordonas, estas tiuj de la edzino; la misteroj, kiujn Li profetas, estas la lerteco kaj la kondiĉoj, kiujn Li estis metonta en Sia Eklezio, pri kiu Li parolas figure, kvazaŭ ĝi estus virino en sia hejmo. En tio ĉi lasta Li publikigas tion, kion oni devas kredi. En la unua instruas tion, kion oni devas agi.

Kaj, ĉar tio ĉi estas la sola afero, kiu taŭgas por ni celo, ni pro tio parolos tie ĉi nur pri ĝi, kaj ni penos kiel eble plej, meti sub lumon kaj kvazaŭ antaŭ okulojn ĉion, kio estas en tiu ĉi bildo, de la virto, kiun Dio tie ĉi pentras.

## II

Kiom multe estas bezone, por ke virino estu perfekta, kaj kiom multe devas tion ĉi peni, tiu, kiu estas edzino.

*Valoran virinon kiu trovos? Malofta kaj grandega estas ŝia prezo (1).*

Poste, en la komenco, Li prezentas tion, pri kio Li estas dironta, kio estas regularo de valora virino, tio estas, de perfekta edzino, kaj laŭdas tion, kion Li proponas, aŭ por plibone diri, Li proponas tion, ĝin laŭdante, por tuj vekoj kaj bruligi ĉe ili, tiun ĉi honestan kaj virtan deziron. Kaj por ke estu pli forta la trolaŭdo, Li metas tion, per demando, dirante. «*Valoran virinon kiu trovos?*» Kaj, ja, tiel demandante, kaj tiel dirante, Li diras, ke estas malfacila ŝin trovi, kaj, ke tiaj estas malmultaj.

Kaj tial, la unua laŭdo kiun Li donas al la bona virino estas diri pri ŝi, ke ŝi estas maloftaĵo: kio estas same kiel nomi ŝin multekosta, kaj bonega aĵo, kaj inda esti tre estimata; ĉar ĉio, kio estas malofta, estas multekosta. Kaj oni vidas, ke tiu ĉi estis Lia intenco, ĉar poste: «*Malproksima kaj ekstrema, Li diras, estas ŝia prezo.*» Aŭ, kiel diras la originalo samsence. «*Pli kaj transe, kaj tre malproksima de la multekostaj ŝtonoj estas ŝia prezo.*» Tiel la homo, kiu trafis valoran virinon, povas tuj konsideri sin riĉa kaj feliĉa, komprenante, ke li trovis orientan perlon, aŭ delikatan diamanton, aŭ smeraldon, aŭ iun ajn multekostan ŝtonon de netaksebla valoro.

Tial, la unua laŭdo al la bona virino estas diri, ke ŝi estas malfacile trovebla. Kio, tiel estas por laŭdi la bon-

(1) Prov., ĉap. XXXI.<sup>o</sup>, ver. 10.<sup>a</sup>

ajn, kiel avizo por ordinare koni la senfortiĝon de ili ĉiuj. Ĉar ne estus eksterordinare, esti unu bona, se estus multaj bonaj, aŭ se ordinare ne estus multaj iliaj malbonaj moroj. Kiuj vere estas tiel multaj, kaj tiel eksterordinaraj, kaj tiel malsamaj inter ili, ke estante nur unu ilia deveno kaj speco, ili ŝajnas diverspecaj. Tiel Focilido aŭ Simonido (1), kvazaŭ ŝercante pri tiu ĉi afero, kutimis diri: nur ĉe la virinoj, oni vidas la eltrovemon kaj la ruzecon de ĉiuj specoj de aferoj, kvazaŭ ĉiaj estus de ili konataj. Ĉar el ili, unuj estas krudaj, kaj liberaj, kiel ĉevaloj, kaj aliaj sagacaj kiel vulpinoj; aliaj riproĉantaj, aliaj ŝanĝeblaj al ĉiuj koloroj, aliaj pezaj, kiel faritaj el tero; kaj pro tio, tiu virino, kiu, inter tiom da malsamaj malbonoj, trafas esti bona, ŝi meritas esti tre laŭdata.

Sed ni vidu, kiel la Sankta Spirito nomas valora virino la bonan virinon, kaj poste ni vidos, kiel ĝuste Li komparas kaj antaŭmetas ŝin al la multekostaj ŝtonoj.

Tio, kion ni diras tie ĉi valora virino, ni povus diri vireca virino, kiel Sokrato (2) nomas la perfektajn edzidojn, parolante pri Jenofono; tiel, ke tio ĉi, kion ni diras vireca aŭ valoro, ĉe la originalo estas vorto multsignifa kaj fortika, kaj tia, ke apenaŭ per multaj el niaj komunaj vortoj, oni povas esprimi ĉion, kion ĝi signifas. Ĝi esprimas virton ĉe kuraĝo, kaj fortikecon ĉe koro, lertecon, kaj riĉaĵojn, kaj povon, kaj superecon; kaj fine, estaĵon perfektan kaj ĝustan en ĉiuj aferoj, al kiuj, tiun ĉi vorton, oni almetas; kaj, ĉion, tion ĉi, trezoramasigas en si, tiu, kiu estas bona virino, kaj ne estas tia, se ŝi ne tion ĉi trezoramasigas.

Kaj por ke ni komprenu, ke tio ĉi estas vero, la Sankta Spirito nomas ŝin per tiu ĉi nomo, kiu enhavas en si mem tiom da diversaj trezoroj. Ĉar, kiel la virino estas pro sia naturo facilanima kaj facilglita, pli ol kiu

(1) Apud. Stobæum serm LXXIII.

(2) Memorabil, siye de Administratione domestica, libro V.<sup>a</sup>

ajn estaĵoj, kaj je ŝia kutimo kaj sprito, aĵo facilrompa kaj trodelikata; kaj kiel la geedza vivo estas vivo submetita al multe da danĝeroj, kaj, kie okazas ĉiutage tre grandaj penoj kaj malhelpoj, kaj vivo riskanta senĉesajn malafablecojn kaj malplezurojn, kaj, kiel diras Sankta Paŭlo (1), vivo kie estas la animo kaj la koro disigita, kaj kvazaŭ transigita el si, al kurante jen al la filoj, jen al la edzo, jen al la servistaro kaj bienaron; por ke tiom da malgrandaĵoj eliru venkante el tiel malfacila kaj tiel longedaŭra batalo, estas necese, ke tiu, kiu estas estonta bona edzino, estu ĉirkaŭita de tiel notinda eskadro da virtoj, kiel estas la virtoj, kiujn ni nomis, kaj tiuj, kiujn en si mem enhavas la ĝusteco de tiu nomo.

Ĉar tio, kio supermezuras por ke homo eliru bone el afero kiun li entreprenas, ne sufiĉas por ke virino respondas dece al sia ofico; kaj, ju pli persono estas malforta, des pli ĝi bezonas pli grandan helpon kaj favoron, por alveni kien ajn sub peza ŝarĝo.

Kaj, kiel ĉe malmola materio, kaj, kiu ne submetiĝas al fero, nek al arto, ni vidas figuraĵon bonege skulptitan, ni konas kaj diras, ke estas perfekta kaj superega en sia ofico, la artisto, kiu ĝin faris, kaj, ke per la plisupero de lia artifiko, li venkis la neregeblan malmolecon de la malmolaĵo; tiel, kaj sammaniere, montriĝi virino kiel decas en tiom da okazoj, kaj malfacilaĵoj de la vivo, kiam ŝi estas tiel malforta, estas klara signo de kapitalo da maloftega kaj preskaŭ heroa virto. Kaj estas evidenta argumento, ke ju pli naturo estas malforta, des pli, pri anima kuraĝo kaj pri ĝia virto, ĝi estas pligranda kaj plibona.

Kaj, tiu ĉi mem estas ankaŭ la kialo, kiel ni vidas per spertado, kaj kiel historio montras al ni, per ne malmultaj ekzemploj, ke kiam virino trafas sin rimarkigi ĉe io ajn laŭdinda, ĉe tio, ŝi venkas multajn homojn al

(1) Ad Corinth., ĉap. VII, ver. 34.



tio mem dediĉitaj. Ĉar estaĵo, estante tiel malmulte, kiel estas tio, kion ni nomas virino, neniam nek komencas, nek atingas valoran aferon, nek taŭgan, se ne estas pro tio, ke klinigas ŝin al ĝi, kaj vekas ŝin, kaj kuraĝigas ŝin, ia malfacilkredebla virto, kiun, la ĉielo metis en ŝian animon, aŭ ia speciala Dia donaco. Ĉar ŝi venkas sin naturon, kaj eliras, kiel rivero el sia kanalo, ni devas precize kompreni, ke ŝi enhavas en si grandan provizon da bono.

Maniere, ke per tre granda vero kaj por signifo de laŭdo, la Sankta Espirito, al la bona virino, ne nomis ŝin iel bona, nek Li diris aŭ demandis: Kiu trovos bonan virinon? Sed nomis ŝin valoran virinon, kaj uzis por tio, tiel bonegan, kaj signifan vorton, kiel la originalan, kiun ni diris, por sciigi al ni, ke la bona virino estas pli bona, kaj ke tio, kion ni nomas bona, estas duonaj, kiu ne egalas tion bonegan, kion devas havi, kaj havi en si la bona virino: Kaj, ke por ke homo estu bona, sufiĉas al li esti parte bona, sed en la virino, tio estas afero de multaj kaj tre delikataj perfektecoj; ĉar ĝi ne estas ago el kiu ajn metiisto, nek ordinara okazo, nek bono, kiun oni trovas kie ajn, sed *bonega* artaĵo, kaj nekomparebla bono, aŭ por plibone diri, amaso da bonegaĵoj.

Kaj tiu ĉi estas la unua laŭdo kiun donas al ŝi la Sankta Spirito, kaj el tiu laŭdo devenas, kvazaŭ el ĝi estus naskita, la dua, kiu estas kompari ŝin al multekostaj ŝtonoj. Per kio, kiel per unu vorto, eldiras plene ĉion kio en tio ĉi, pri kio ni parolas, enhaviĝas.

Ĉar, tiel, kiel multekosta ŝtono estas de alta kaj eksterordinara valoro, tiel la boneco de bona virino havas delikatajn karatojn da virto; kaj, tiel, kiel la multekosta ŝtono per si mem estas malmultaĵo, kaj pro grandeco de la sekreta virto akiras grandan prezon, tie tio, kio ĉe la malforta persono el la virino, metas boneŝtonon, estas granda kaj malofta bono; kaj, tiel, kiel ĉe la

multekosiaj ŝtonoj, tiu, kiu ne estas bonkvalita, ne estas bona, tiel ĉe la virinoj ne estas mezokvalito, nek estas bona, tiu, kiu nur estas bona; kaj sammaniere, kiel estas riĉa, homo kiu havas multekostan smeraldon, aŭ bonegan diamanton, kvankam li ne havas alian bienon, kaj posedi tiajn ŝtonojn, ne estas posedi unu ŝtonon sed posedi je ĝi malgrandigitan trezoron; tiel, bona virino ne estas ia virino, sed amaso da riĉaĵoj, kaj, kiu ŝin posedas estas riĉa nur per ŝi sola, kaj ŝi sola povas lin fari feliĉega kaj feliĉa; kaj tiamaniere, kiel multekostan ŝtonon oni uzas ĉe la fingroj, kaj oni ĝin metas antaŭ la okulojn, kaj oni ĝin ŝürmetas sur la kapon por ĝia beligo kaj honorigo, kaj ĝia posedanto havas en ĝi, kune, ornamon dum gajeco, kaj helpon por bezono, nek pli nek malpli, bonan virinon ŝia edzo devas estimi pli ol siajn okulojn, kaj surportadi ŝin sur sia kapo, kaj la plibona loko de lia koro esti ŝia, aŭ por plibone diri, lia tuta koro kaj lia tuta animo esti ŝia, kaj li devas kompreni, ke ŝin havinte, li havas ĝeneralan trezoron por la malsamaj tempoj, kaj he ŝi estas virta vergeto, kiu, laŭ oni diras, ĉe ĉiu okazo kaj ĝustatempo plaĉos al li, kaj plenumos lian deziron, kaj, ke ĉe la gajeco li havas en ŝi dolĉan akompanion, per kiu li pligrandigos sian ĝojon, interkomunikante ĝin al ŝi; kaj ĉe la malgajeco, li havas aman konsolon, kaj ĉe la duboj fidelan konsilon, kaj ĉe la penoj flegon, kaj ĉe la mankoj monhelpon, kaj kuracilon ĉe la malsanoj, pligrandigon por sia bienhavo, gardiinion de sia domo, majstrinon de siaj gefiloj, provizistinon de siaj ekscesoj; kaj fine, ĉe realeco kaj ŝanceco, ĉe prospereco kaj kontraŭeco, dum la flora aĝo kaj dum la laciga maljuneco, kaj dum daŭrado de sia tuta vivo, li havas dolĉan amon, kaj pacon, kaj ripozon. Ĝis tie ĉi alvenas la laŭdoj, kiujn Dio donas al tiu ĉi virino: ni vidu nun, tion, kio, post tio ĉi, sekvas.

## III

**Kian konfidon bona virino devas naski en la brusto de sia edzo, kaj kiel koncernas al edzinofico la konservadon de la bieno, kio konsistas en ŝia neelspezemeco.**

Al ŝi konfidas la koro de ŝia edzo, senigoj ne senkreditigos lin (1).

Post kiam, Li prezentis sian elpensitan personon kaj ŝatis ĝin al ni, laŭdante ĝin, Li komencas specifi ĝiajn bonajn kondiĉojn, kaj tion, kio kunmetas kaj perfektigas ĝin, por ke metante la virinoj siajn piedojn en tiujn piedsignojn, alvenu al tio, kio estas perfekta virino.

Kaj ĉar la perfekteco de homo, ĉe kiu ajn lia stato, konsistas precipe en tio bonagi; tial la Sankta Spirito metas tien ĉi, kiel partojn de tiu perfekteco pri kiu Li parolas, nur la laŭdajn agojn al kiuj estas devigata edzino, kiu pretendas esti bona; kaj estas tio unua, kiun ŝi devas naski en la koro de sia edzo, grandan fidon; sed oni devas serĉi kia estas kaj pri kio estas tiu fido kiun Li diras; ĉar iu pensos ke ĝi estas la fido kiun havas la edzo pri sia edzino, kiu estas honesta; kaj kvankam estas vero, ke virino per sia boneco atingos tiun ĉi bonan juĝon, laŭ mia opinio, la Sankta Spiritu ne rilatas tie ĉi pri tio, kaj la tialo ĉar Li ne rilatas al tio, estas tre justa; unue, ĉar Lia intenco estas kunmeti tie ĉi perfektan virinon, kaj esti honesta iu virino, oni ne kalkulas, nek oni devas kalkuli, inter la partoj el kiuj, tiu ĉi perfekteco kunmetiĝas, sed plibone tio estas, kiel la bazo sur kiu, tiun ĉi konstruaĵo oni starigas; kaj por tion diri, per unu

(1) Prov., ĉap. XXXI.<sup>a</sup>, ver. 2.<sup>a</sup>

vorto, estas, kiel estaĵo kaj substanco de la edzino, ĉar se ŝi tion ĉi ne havas, ja ne estas virino, sed perfida prostitutino kaj malnoblega koto, kaj malpuraĵo la plej haladza kaj la plej malestimata el ĉiuj.

Kaj, kiel ĉe la homo, estaĵo ornamita de intelekto kaj prudento, Li ne metas laŭdon, ĉar tion havi estas lia propra naturo, kaj se okaze tio mankus al li, tiu manko metus al li tre grandan malhonoron; tiel, virino ne estas tiom laŭdebla, ĉar ŝi estas honesta, kiom estas senhonta kaj abomeninda se ŝi ne estas tia.

Tiamaniere, ke la Sankta Spirito, en tiu ĉi loko, ne diras al virino, ke ŝi estu honesta, sed Li antaŭsupozas, ke ŝi ja estas tia; kaj al tiu, kiu tiel estas, Li al ŝi montras tion, kio al ŝi mankas, kaj tion, kion ŝi devas aldoni por esti elfinita kaj perfekta.

Ĉar, kiel ni supre diris, ĉio, kion tie ĉi oni esprimas, estas kiel fari portreton aŭ pentraĵon, pri kio la pentristo ne faras la tabulon; sed sur la tabulon, kiun oni prezentas, kaj oni donas al li, li desegnas la profilojn, kaj poste li kolorigas, kaj altigante la helecojn en iliaj lokoj, kaj malaltigante la ombrojn, kie ajn ili decas, li alvenigas al perfekteco sian bildon. Kaj sammaniere, Dio, ĉe la honesteco de la virino, kiu estas kiel la pleto, kiun Li antaŭsupozas reala kaj vera, Li al ŝi aldonas belegajn virtajn kolorojn, ĉiujn, kiujn oni bezonas por elfari tiel belegan pentraĵon. Kaj tio estu, la unua.

La dua, ĉar Dio ne parolas tie ĉi pri tiu ĉi fido, ĉar Li volas, ke tiu ĉi honesta kaj pura afero, tiel staru en brustoj de la virinoj, ke eĉ ili ne pensu, ke tio povas esti kontraŭe. Kaj, kiel oni diras pri Solon'o, tiu, kiu donis leĝojn al la atenanoj, kiu difninte por ĉia kulpo ĝian penon, ne asignis penon por tiu, kiu mortigis sian patron, nek nomis tian krimon; ĉar li diris, ke ne konvenas, ke la homoj konsideru ebla, nek okazonta, tian malbonaĵon: tiel, tial, tie ĉi ne rekomendas Dio al la edzino, ke ŝi estu honesta kaj fidela, ĉar Li ne volas, ke

tra ŝia cerbo, trapaŝu la ideo, pri tio, ke eble ŝi povas esti malbona.

Ĉar verdironte, malhonesto estas, ĉe la ĉasta virino, pensi, ke ŝi povus ne tia esti, aŭ, ke estante tia, ŝi faras ion, kio devas esti al ŝi dankita. Ĉar, kiel al la birdoj flugi, estas natura afero, tiel la edzinoj devas konsideri, kiel naturan kondiĉon, kiu ne povas esti rompebla, esti bonaj kaj honestaj, kaj ili devas esti konvinkitaj, pri tio, ke la kontraŭa estas malaminda, kaj malfeliĉa okazo, kaj monstra ago; aŭ, por pli bone diri, ili devas pensi, ke okazi kontraŭe estas kvazaŭ fajro estus malvarma, aŭ neĝo varma. Ili komprenu, ke rompi la fidon al sia edzo, estas same kvazaŭ perdis steloj sian lumon, kaj falus la ĉielo, kaj rompus natureco, siajn leĝojn, kaj ĉio sinturnus, al tiu antikva kaj unua konfuzo.

Eĉ ankaŭ ne, tio ĉi devas esti, kiel kelkaj el ili pensas, ke gardante la tutan korpon por la edzo, ili sin difinas liberaj, pri tio, kio rilatas babildojn kaj aliajn gestojn kaj malgrandajn aĝetojn; ĉar ne estas honesta tiu, kiu ŝajnas tia esti kaj ne estas tia. Kaj, kiom ŝi estas for de la malbono, tiom ŝi devas esti apartigita de ĝia bildo aŭ ŝajnaĵo. Ĉar, kiel bone diris ia latina poeto, nur tiu estas ĉasta, ĉe kiu, nek famo mensogante, kurtaĝas meti malbonan noton. Kaj certe, kiel al tiu, kiu oni metas sur la vojon al Santiago (1) kvankam ĝis Santiago ĝi ne alvenu, ja, pro tio, ni nomas lin pilgrimanto; tiel, sendube, estas komencanta prostitulino, tiu, kiu donas al si permeson por pritakti tiujn aferojn, kiuj estas la alvojo.

Sed se ĝi ne estas ĉi tio, kia fido estas tiu, pri kiu Dio parolas en tiu ĉi loko? Pro tio, kio Li diras poste, oni ĝin komprenas, ĉar Li aldonas. «*Senigoj ne senkreditigos lin.*»

Kelkaj komprenas, ke Li nomas senigojn, tion, kion ni per hispana lingvo nomas juveloj, kaj domaj ornamaĵoj,

(1) Hispana urbo en kies katedralo staras la korpo de Apostolo Santiago.

sed mi kredas, kiel plej certe, ke Li nomas senigoj, la gajnojn, kiujn oni akiras komerce.

Ĉar oni scias, ke la homoj faras renton, kaj sin nutras, kaj vivas, aŭ pro la terkulturo, aŭ pro la trakto kaj kontrakto kun aliaj homoj.

La unua maniero renthavi estas naiva gajno, kaj sankta gajno, ĉar ĝi estas pure natura; tiel, ĉar la homo manĝas per sia laboro, ne malprofitante, nek insultante, nek tion farante por elspezo aŭ malgajno al alia; kiel ankaŭ, ĉar sammaniere, kiel la patrinoj nature nutras per lakto la infanojn, kiujn ili naskis, kaj al la infanoj mem, gviditaj de ilia inklino, ankaŭ estas nature alkuri al la mamoj; tiel nia naturo kondukas kaj klinigas nin eltiri el la tero, kiu estas nia komuna patrino kaj naskinta, tion, kio konvenas por nia nutro.

La alia gajno, kaj akirmaniero, kiu ricevas frukton, kaj riĉiĝas el la malpropraj bienoj, aŭ per volo de ĝiaj mastroj, kiel faras la komercaĵistoj, kaj majstroj kaj artistoj de aliaj metioj, kiuj vendas siajn agaĵojn, aŭ trude kaj nevolonte, kiel okazas ĉe milito, estas ne natura gajno, kie plejmultfoje interhelpas iom da maljusteco kaj forto, kaj ordinare personoj, je kiuj oni negocas, donas malplaĉe kaj malkontente, tion, kion ili donas.

Pro kio, ĉio, kio per tiu ĉi pero oni gajnas, estas dece nomita senigoj. Ĉar el tio per kio komercaĵisto plenigas sian domon, tiu alia de kiu je li komercis, restas malplena kaj senigita, kaj kvankam ne per milito, sed kvazaŭ pro milito, kaj ne ĉiam tre justa.

Do, nun diras la Sankta Espirito, ke la unua parto, kaj la unua ago per kiu perfektiĝas edzino, estas fari ŝian edzon konfidema kaj certa, pri tio, ke havante ŝin por teni sian domon provizumitan kaj riĉan, li ne bezonas trairi la maron, nek iri militon, nek pruntedoni monon procente, nek sin intermiksi je malnoblaj kaj maljustaj traktoj, sed nur per laboro de siaj terhavoj, preninte ilian frukton, kaj havante ŝin, kiel gardistino kaj kiel

profitistino de tio rikoltita, li havas sufiĉan riĉecon. Kaj apartenu al edzinofico, kaj estu parto de ŝia perfekteco tiu gardo kaj tiu lerteco; des pli, ke la Sankta Spirito tion instruas, ankaŭ tion pruvas la prudento.

Car certe, naturo ordonis la homedzecon, ne nur por la celo ĉiamigi per la gefiloj, idaro, kaj familiaj nomoj, sed ankaŭ por ke ili mem konservu siajn animojn kaj personojn; kio ne estas eble al ili, nek al homo per si mem, nek al la virino sen la homo; ĉar por vivi, ne sufiĉas gajni bienojn, se tion, kion oni gajnas oni ne gardas; ĉar se tion, kion oni akiras oni perdas, estas tiel kvazaŭ oni ne ĝin akiris.

Kaj la homo kiu havas forton por polverigi terbuloj, kaj por rompi kampon, kaj por iri tra la mondo kontrakti je la homoj, negocante sian havon, ne povas atenti sian domon, ĝian gardon, nek taŭgas por tio lia kondiĉo; kaj kontraŭe, virino, kiu estante nature malforta kaj malvarma, kliniĝas al senmovo kaj al malsufiĉo, kaj estas bona por gardi, samkaŭze ŝi ne taŭgas por ŝviti kaj akira laboro.

Kaj tiel, naturo, kiun ĉion antaŭgardas, ilin kunigis, por ke pruntedonante unu al la alia sian kondiĉon, ili konservu unu al la alia, tion, kion ili ne povus al si konservi apartigitaj.

Kaj el tiel malsamaj inklinoj, per mirinda arto, kaj, kiel oni faras ĉe muziko, per malsamaj kordoj, ĝi faris profitan kaj dolĉan armonion, por ke kiam la edzo estu en la kampo, virino restu en la domo, kaj konservu kaj daŭrigu unu, tion, kion la alia akiris.

Pro kio, bone diras poeto, ke la fundamentoj de domo estas la virino kaj la bovo; la bovo por plugi kaj la virino por gardi.

Tiamaniere, ke ŝia naturo mem faras, ke tiu ĉi ofico estu virina, kaj devigas al ŝi, tiun ĉi virton kaj parton de ŝia perfekteco, kiel al precipa kaj grava parto. Kion oni konas pro la bonaj kaj multaj efikoj kiujn ŝi faras;

el kiuj estas unu, tiu, kiun tien ĉi metas Salomon'o; kiam li diras, ke *al ŝi konfidas la koro de ŝia edzo kaj, ke senigoj ne senkreditigos lin*. Kio estas diri, ke je ŝi, li kontentiĝas per la terhavo kiun li heredis de sia gepatroj, kaj je ĝia plugado, kaj frukto, kaj se li ne kompromitigas, ne malpi li kunligiĝas al danĝero kaj sentrankviliĝo de aliaj gajnoj kaj traktoj, tio, kio, kie ajn oni rigardu, estas tre granda bono.

Ĉar se ni rilatas al konscienco, vivi el terbieno estas naiva, kaj senpeka vivo, kaj al ceteraj traktoj maloftege mankas peko. Pri kvieteco, la terlaboristo ripozas ĉe sia domo; la aliaj, plimulton el sia vivo, ĉe gastejoj aŭ vojoj. La riĉeco de unu ofendas neniun, tiu de la alia estas cenzurata kaj malamata de ĉiuj. La unu manĝas el la tero, kiu neniam laciĝas, nek malplaĉiĝas donante al ni siajn bonaĵojn; al tiu alia senigas ilian estimon, tiuj, kiuj mem lin riĉigas.

Do, se ni rigardas la honoron, certe ne estas afero, pli malnobla, nek pli malinda por homo, ol trompi kaj mensogi, kaj certe, mirinde estas, ke al iu el tiuj traktoj manku trompo. Kio mi diros, pri gefila institucio, kaj pri la familia ordo, kaj pri la bona aranĝo de la korpo kaj de la kuraĝo, sed nur, ke ĉio okazas sammaniere? Ĉar neceso estas, ke, kiu forestadas ĉe sia domo, tiu havu en ĝi multajn malordigojn, kiuj, estas naskitaj kaj kreskas, kaj fortikiĝas pro la foresto de la mastro; kaj estas nepre, ke tiu estu trompita, kiu pretendas, trompi, kaj, ke multaj malbonaj moroj gluiĝu al tiu, kiu kontraktas kaj interrilatas ruzajn kaj diversmorajn personojn.

Sed kontraŭe, la kampara vivo; kaj laborado, per si mem, siajn terbienojn, estal tiel, kiel lernejo de senkulpeco, kaj vereco; ĉar ĉiu lernas el tiuj je kiuj negocas kaj interparolas.

Kaj, kiel la tero estas fidela je tio, kio al ĝi oni konfidas, kaj pri ne ŝanĝiĝo estas konstata kaj nobla, kaj



malfermita pri elburĝono kaj eltiro eksteren de ĝiaj riĉaĵoj, kaj por fari bonon liberala kaj provizumita; tiel ŝajnas, ke ĝi naskas kaj fiksas en la brustojn de tiuj, kiuj ĝin plugas, apartan bonecon, kaj manieron de simpla stato, kaj interrilaton, veran, kaj fidelan, kaj energiplenan, kaj de bonaj kaj malnovaj moroj, kiujn malfacile oni trovas en la ceteraj homklasoj. Plie, ke ĝi ilin igas sanaj, kaj kuraĝemaj, kaj gajaj, kaj pretaj por kiu ajn klaso de bonfaro.

Kaj la radiko el kiu naskiĝas kaj kie sin nutras ĉiuj, tiuj ĉi profitoj, estas la bona gardado kaj la lerteco de la virino pri kiu ni diras. Sed estas vidinda el kio konsistas tiu ĉi gardado.

Ĝi konsistas el du aferoj; ke ŝi ne estu multekosta, kaj ke ŝi estu laborema.

Kaj ni diru pri ĉio.

Perfekta edzino ne estu multekosta nek elspezema, ĉar ŝi ne havas tialon por tia esti; ĉar ĉiuj elspezoj kiujn oni faras estas por provizi, aŭ bezonon, aŭ plaĉegon; por ripari la naturajn difektojn pri malsateco aŭ nudeco, kun kiuj ni estis naskitaj, aŭ por provizumi la apartajn kapricojn kaj gustojn, kiujn ni faras al ni pro nia malvirto. Do, al virinoj, natureco metis pri tio unu grandan takson, kaj pri tio alia, devigis ilin, ke ili mem ĝiu metu.

Ĉar, se ni diras veron kaj ni rigardas senartecon, la mankoj kaj bezonoj de virinoj estas multe pli malgrandaj, ol tiuj de homoj: ĉar, pri manĝado, malmulte sufiĉas al ili, pro tio, ke ili havas malpli naturan varmon. Kaj tial estas ĉe ili tre malagrabla esti frandemaj aŭ manĝemaj. Kaj nek pli nek malpli pri vestaĵoj, ĉar natureco faris al ili unuflanke nefaremajn por ke ili rompu malmulte, kaj aliflanke puremajn por ke al ili la malmulto elmontru multon.

Kaj tiuj, kiuj pensas, ke nur per sufiĉego da sintendoj kaj vestoj, ili fariĝos belaj, ili vivas tre trompitaĵ,

ĉar tiu, kiu, estas bela malaranĝita ankaŭ estas tia, kaj tiu, kiu ne estas bela, neniamaniere ŝi tia estos, nek ŝajnos tia, kaj, ju pli ŝi sin ornamas, des pli ŝi estas malbela.

Precipe, ke la bona virino, pri kiu ni pritraktadas, ia ajn ŝi estu, malbela aŭ bela, ŝi ne devas deziri, ŝajni alie kiel ŝi estas, laŭ oni diros ĉe ĝusta loko.

Tiel, pri necesajoj, natureco liberigis la virinoj de multaj elspezoj, kaj pri plaĉego kaj kapricemo, ĝi ligis ilin per tre severaj devigoj, por ke ili ne estu multekostaj.

Kaj unu el tiuj devigoj estas la timemo kaj modesteco, kaj sobreco, kiujn ili devas al sia naturo; ĉar kvan-kam la malordo kaj la plieco kaj malstreci la bridon al vana kaj nenecesa deziro, estas mallaŭdinda ĉe kiu ajn klaso de gentoj, ĉe tiu de virinoj, kiuj estis naskitaj por regiteco kaj humileco, ĝi estas multe pli malvirta kaj mallaŭdinda.

Kaj malgraŭ tio, mi ne scias kiamaniere okazas, ke ju pli ili estas devigataj akcepti tiun bridon, tiom pli, kiam ili ĝin rompas, ili senbridigas sin pli ol la homoj, kaj preterpasas la limon multe plie, kaj ne havas mezuron nek finon ilia apetito. Kaj tiel, tiu estu la dua kaŭzo, kiu devigas ilin esti moderatoj pri la elspezoj de iliaj kapricoj, ĉar se ili komencas malmoderiĝi, ili malmoderiĝas sen limo, kaj estas, kiel senfunda puto, al kiu nenio sufiĉas, kaj kiel lignomordista vermo, kiu senĉese mordetas, kaj, kiel kaŝita flamo, kiu senbrue ekbruliĝas tra la domo, kaj tra la havo, ĝis kiam ĝi estingas. Ĉar ne estas ŝia, elspezo nur unu taga, sed ĉiutaga elspezo; nek elspezo, kiun oni faras unu fojon dum la vivo, sed kiun oni daŭras dum la tuta vivo: nek estas, kiel oni kutimas diri, multaj malmultaĵojn sed multaĵoj kaj multaj. Ĉar se ili kutimiĝas frandaĵi, tuta ilia vivo estas la matenmanĝo, kaj la vespermanĝeto, kaj la fruktejo, kaj la amikino, kaj la tago, kiu estas bona;

kaj se ili trafas ornamiĝemon, la afero preterpasas pasión, kaj alvenas ĝis nekredebla nesaĝeco kaj frenezeco; ĉar hodiaŭ veston, kaj morgaŭ alian, kaj por ĉia festo, malsaman; kaj, kion ili faras hodiaŭ, morgaŭ ili malfaras, kaj kiom ili vidas, tiom ili deziregas.

Kaj ankoraŭ preteriras la pasiego. Ĉar ili fariĝas majstrinoj kaj elpensintinoj de novaj elpensaĵoj kaj vestoj, kaj honoras sin je vidigante, tion, kio neniam estis vidita. Kaj kiel ĉiuj gemajstroj ŝatas havi aliĝantojn, kiuj ilin imitu, tiel la virinoj estas tiel nekorekteblaj, ke se ili vidas ĉe aliaj siajn elpensaĵojn, ili malamas ilin, kaj lernas, kaj penas fari aliajn elpensaĵojn. Kaj la frenezeco pli kreskas, kaj jam ne plaĉas al ili eleganteco kaj beleco tiel multe, kiel multekosteco kaj estimegateco, kaj la ŝtofo devas alveni mi ne scias el kie, kaj la orŝtofo *el tiu je pli da altigoj* kaj la ambresenco devas bani la ganton kaj la jaketon kaj ankaŭ eĉ la ŝuon, kiu, kiel hararanĝo devas ankaŭ ore brili, kaj la mantelo devas esti pli brodita ol la jupo; kaj ĉio nova, kaj ĉio freŝa, kaj ĉio hieraŭa farita, por ĝin vesti hodiaŭ kaj ĝin forĵeti morgaŭ.

Kaj, kiel ĉevaloj, neregitaj de brido, ju pli ili kuras des pli ili iras senrege; kaj, kiel ŝtono, kiu el supre falas, kiu ju pli ĝi subiras des pli ĝi akceliĝas; tiel soifo de tiuj ĉi virinoj kreskas ĉe ili per la trinkado; kaj granda malsaĝigo kaj eksceso kiun ili faras, estas al ili komenco de alia pli granda, kaj, ju pli ili elspezas, des pli al ili plaĉas elspezi.

Kaj, ankaŭ, ĉe ĉio estas alia granda malbono, ke la homoj, se okazas al ili esti elspezemaj, plimulton el la fojoj ili tiaj estas ĉe aferoj, kvankam ne bezonaj, sed honoraj aŭ longedaŭraj, aŭ kiuj havas iom da uileco aŭ profito, kiel tiuj, kiuj luksege konstruas, kaj, tiuj, kiuj provizas sin per granda servistaro, aŭ, kiel tiuj, kiuj ŝatas havi multajn ĉevalojn; sed la virinelspezo estas ĉio ĉe la aero, la elspezo tre granda, kaj tio pri kio oni

elspezas, nek valoras, nek elmontriĝas; ili elspezas pri ĉirkaŭjupaj ornamoj, kaj gantoj kaj *parfumkandeletoj* kaj *parfumkaseroletoj*, kaj nigrambro, kaj vitroj, kaj juvelaĉoj, kaj aliaj vendejaj objektetoj, kiujn nek oni povas vidi sen naŭzo nek movi sen haladzo.

Kaj multefoje, ne tiom elspezas advokato pro aĉetado de libroj, kiel iu sinjorino por blondigo de siaj haroj.

Dio gardu nin je tiel granda ruino; kaj mi ne volas ĉion difini al ilia kulpo, ĉar mi ne estas tiel maljusta; ĉar granda kvanto da tio ĉi estas naskita el la malbona pacienco de iliaj edzoj. Kaj nun mi dediĉus la plumon, diri ion pri ili, se ne haltigus al mi, kompato, kiun mi sentas al ili; ĉar se ili estas kulpaj, ili pagas punon sepoble.

Do, ne estu perfekta edzino multekosta, nek kreu honora elspezi pli ol ŝia najbarino, sed ŝi havu sian domon pli provizita ol ŝia, kaj pli riparita, kaj ŝi faru per sia aranĝo kaj per sia pureco, ke antikva vesto estu al si kvazaŭ nova, kaj, ke per purigo, kiu ajn vestaĵo, kiun ŝi metu sur sin, ŝajnu al ŝi tre bone, kaj uzita kaj vulgara vesto, akiru per ŝia purigo, prijuĝo de neuzata nek komuna. Ĉar, elspezado ĉe la virino, estas kontraŭa al ŝia ofico, kaj tro por ŝia bezono, kaj por kapricoj malvirta, kaj tre malhonesta, kaj senfina afero, kiu ruinigas la domojn, kaj malriĉigas ĝiajn loĝantojn, kaj ilin kunligas al milo da ŝuldoj, kaj senkuraĝigas kaj malnobligas ilin, kaj, al tiu sama fino celas kaj apartenas tio, kio sekvas.

## IV

**Pri la devo, kiun havas la geedzoj, sin ami kaj sin helpi reciproke.**

*Ŝi pagis al li per bono, kaj ne per malbono, dum ĉiuj tagoj de sia vivo (1).*

Kio estas diri, ke virino devas studi, ne ŝuldigi sian edzon kaj meti lin en malplaĉojn kaj zorgojn, sed lin liberigi el ili, kaj esti al li ĉiama kaŭzo de gajeco kaj helpo.

Ĉar, kian vivon havas tiu, kiu vidas konsumigantan sian heredan proprajon, pro kapricoj de sia virino, kaj, ke ĉiujn liajn laborojn enportas rivero, aŭ por plibone diri, malpurakvakonduko, kaj, ke prenante ĉiutage novajn procentdevigojn kaj dum kreskas senĉese liaj ŝuldoj, li vivas malnobla sklavo ĉenligita al juvelisto kaj al komercajisto? Kiam Dio volis edzigi la homon, donante al li virinon, diris *Ni faru al li unu helpanton, lian similulon (2)*; el kie oni komprenas, ke la precipa ofico de virino, kaj la celo por kiu Dio ŝin kreis, estas por tio, ke ŝi estu helpantino de sia edzo, kaj ne lia bedaŭro kaj malfeliĉo; helpantino kaj ne detruantino. Por ke ŝi lin malpezigu de penoj, kiuj kun si portas la edza vivo, kaj ne por ke ŝi aldonu al li novajn malĝojojn. Por disdoni inter si reciproke la maltrankvilecojn, kaj por ke ŝi prenu sian parton, kaj ne por forlasi ĉiujn, pligrandigitajn kaj plimultigitajn, al la malfeliĉulo.

Kaj, fine, ne ilin Dio kreis por ke ili estu ŝtonegoj, kie rompiĝu la edzoj, kaj pereu la vivoj kaj havoj, sed

(1) Prov., ĉap. XXXI, ver. 12.<sup>a</sup>

(2) Gen., ĉap. II, ver. 18.<sup>a</sup>

por ke ili estu deziritaj kaj senriskaj havenoj, kie la edzoj, revenante hejmen, ripozu kaj ripariĝu je turmentaj aferoj, kiuj okazas for el ĝi. Kaj tiel, kiel estus plendinda okazintaĵo, se okazus al komercaĵisto, ke suferinte en marveturado, kun grandaj riĉaĵoj, kaj preterpasinte multajn promontorojn, kaj venkinte multajn fluojn, kaj navigaciinte en multaj lokoj danĝeraj kaj kiujn neniu ŝipiris, estante el ĉio liberigita de Dio, kaj venante jam en sia ŝipo senmanka kaj riĉa, kaj ĝojplena, por ripozi en la haveno, en tiu ĉi, ĝi rompiĝus kaj superakviĝus; tiel estas bedaŭrinda tiu malfeliĉo de homoj, kiuj brakagitas kaj baraktaj ĉiutage kontraŭ la fluoj de la penoj kaj hazardoj de tiu ĉi vivo, kaj ilin vadas, kaj pereas en la havenoj de siaj domoj; kaj la gardo estas al ili ruinigo, kaj la helpo pli granda zorgo, kaj la kvieteco marventegaj ondoj, kaj la ŝirma kaj senriskita loko, Scila'o kaj Karibdis'o, kaj malglata kaj malmola ŝtonego.

Pro kio, tio justa kaj natura estas, ke ĉiu estu tio sama por kio li estas; kaj ke la gardo estu gardanta; kaj la helpo, paco; kaj la haveno, sendanĝereco; kaj la virino, dolĉa kaj ĉiama malvarmetaĵo, kaj kora gajeco, kaj kvazaŭ delikata dorloto, kiu senĉese altiru volonton kaj nobligu bruston de ŝia edzo, kaj senigu liajn zorgojn: kaj, kiel diras Salomon'o: *«Ĝi devas pagi bone, kaj ne malbone, dum ĉiuj tagoj de sia vivo.»*

Kaj li diras, ne sen mistero, ke ŝi devas pagi bone al li, por ke oni komprenu, ke tio ĉi ne estas favoro kaj libereco, sed justeco kaj devigo, ke virino ŝuldas al sia edzo, kaj ke ŝia naturo difinis ŝin, kreante ŝin por tiu ĉi ofico, kiu estas plaĉi, kaj servi, kaj gajigi, kaj helpi en la penoj de la vivo, kaj en la konservado de la bienoj al tiu, kun kiu ŝi edziniĝas; kaj ke, same kiel li estas devigita al akirlaboro, tiel virino havas devigon konservi kaj gardi: kaj ke tiu ĉi gardo estas kvazaŭ pago kaj salajro, kiun rajte oni ŝuldas al tiu servo kaj ŝvitado; kaj, ke same kiel li estas devigata sin okupi pri eksterdomaj

penoj, tiel ŝi devas lin toleri kaj amuzi, kiam li reven-  
domen, sen tio, ke iu senkulpigo liberigu ŝin je tio.

Treĝustrilata al tio ĉi, estas ekzemplo, kiun Sank-  
Basilio pritraktas, kaj tio, kion pri ĝi, li diras (1).

«Vipero, li diras, besto kruelega inter la serpentoj,  
iras diligente edziĝi kun mara petromizo: alveninte,  
fajfas, kiel avizante, ke ĝi estas tie, por tiel altiri el la  
maro petromizon al edza ĉirkaŭpreno. Petromizo obeas,  
kaj kunigas sin, sentime, kun la kruelega besto. Kion  
mi diras en tio ĉi? Kion? Ke eĉ se edzo estas plej mal-  
afabla kaj fierkondiĉa, estas necese, ke virino lin toleri  
kaj, ke ŝi ne permesu, ke pro ia okazo rompiĝu pa-  
—Tamen, li estas kruela!—Sed li estas via edzo—Li estas  
ebriulo!—Sed edza banto faris al li kaj vi, nur unu—  
estas malafabla, malĝentila!—Sed jam via membro, kaj  
plej precipa membro. Kaj por ke la edzo aŭskultu ank-  
tion, kion konvenas al li, tiam vipero, respektante  
kuniĝon kiun ĝi faras, apartigas el si sian venenon; kaj  
ĉu vi ne forlosos la nehumanan krudecon de via naturo  
pro honoro de la edzeco?» Tio ĉi estas el Bazilio.

Kaj krom tio, la diro de Salomon'o, ke bona virino  
*pagas bone, kaj ne malbone*, al sia edzo, estas avizo  
li, ke ĉar tio devas esti pago, li tion meritu unue, trakti  
ante ŝin honore kaj ame; ĉar, kvankam estas vero, ke  
natura kaj stato metas devigon en la edzimon, kiel ni  
diras, atenti sian domon, kaj gajigi, kaj senzorgigi, senĉe-  
se, sian edzon, ĉe kio nenia lia malbona kondiĉo sende-  
igas ŝin; sed ne pro tio la edzoj devas pensi, ke ili havas  
permeson por esti al la virinoj leonoj kaj por ilin fari  
sklavinoj; kontraŭe, kiel en ĉio cetera, homo estas  
kapo, tiel ĉiu tiu ĉi ama kaj honora trakto devas esti  
komencita de la edzo; ĉar li devas kompreni, ke ŝi estas  
lia kunulino, aŭ por plipone diri, parto el lia korpo, kaj  
malforta kaj mola parto, kaj al kiu, pro tio mem, oni  
devas apartan zorgon kaj kareson.

(1) In Hexaem. Homil. VII, de Reptilibus.

Kaj tion ĉi Sankta Paŭlo, aŭ Jesuo Kristo per Sankta Paŭlo, tiel ordonas, kaj uzas por la ordono samfundamenton, dirante (1):

« Vi, edzoj, amu viajn edzinojn; kaj kiel al pli malforta vazo, metu pliparte vian zorgon por honori kaj bontrakti ilin. »

Ĉar, tiel, kiel vazon bonegan kaj bonlaboritan, se ĝi estas el vitro, ni ĉirkaŭias per *vazingo*, kaj, kiel ni vidas, ke ĉe korpo, natureco provizis per pli grandaj defendaĵoj la membrojn pli molajn kaj pli riskajn ricevi difekton, tiel, dome, al la virino, kiel al parto malpliforta, oni devas pli bonan trakton.

Plie, ke la homo, kiu estas la saĝeco, kaj la kuraĝo, kaj la prudento, kaj la majstro, kaj la tuta bona ekzemplo de sia domo kaj de sia familio, devas trakti sian virinon, same kiel li volas, ke ŝi traktu lin, kaj instrui al ŝi per sia modelo, tion, kion li volas, ke ŝi faru pri li mem, farante, ke de lia bona maniero, kaj de lia amo, ŝi lernu peni por komplezi lin. Ĉar se li, kiu havas pli da prudento kaj pli kuraĝa koro, kaj scias konsenti pri iaj aferoj kaj pacience suferi kelkajn aliajn, en ĉio, prave kaj malprave, li volas esti malpacienca kaj furioza, kia mirindaĵo estas, ke la malforteco, kaj la malmulta saĝeco, kaj la eta kuraĝo de la virino fariĝu malfeliĉa kaj pena?

Kaj ankoraŭ estas en tio ĉi alia pligranda kontraŭaĵo, ke, kiel la virinoj estas mem timemaj per si, kaj malmulte klinitaj al gravaj aferoj, se oni ne ilin kuraĝigas, kiam ŝiaj edzoj ilin ofendas, kaj ilin malestimas, ili ankoraŭ pli malkuraĝigas, kaj falas al ili flugiloj de ilia koro, kaj ili ne povas enmeti nek siajn manojn nek sian penson en aferon kiu estas bona, el kie ili trafas akiri malnobleĝajn malvirtojn.

Kaj sammaniere ol saĝa terkulturisto, al kreskaĵoj, kiuj rigardas kaj kliniĝas teren, kaj, kiuj, se oni ilin forlasus, ili kuŝiĝus treniĝante sur ĝi, ne permesas ilian

(1) Ad[Ephes., ĉap. V.<sup>a</sup>, ver. 25.<sup>a</sup>



falon, sed per forketoj kaj vergetoj, kiujn al ili li apudmetas, li ilin rektigas kaj starigas, por ke ili kresku al la ĉielo; nek pli nek malpli, saĝa edzo ne devas premi nek humilegigi, per malbonaj agoj kaj vortoj, la koron de la virino, kiu ĝi estas per si mem falema kaj limigita; sed kontraŭe, per amo kaj honoro, li estas plialtigonta kaj kuraĝigonta ŝin, por ke ŝi ĉiam ekkomprenu honorajn pensojn.

Kaj, ĉar virinon, kiel ni supre diris, oni donis al la homo por malpezigi liajn penojn, kaj por ripozo, kaj dolĉeco, kaj komplezeco; prudento mem kaj natureco petas, ke ŝi estu traktata de li, dolĉe kaj kompleze. Ĉar, kie oni toleras, ke iu malestimu sian helpon, nek, ke iu malplezurigu sian ripozon, nek, ke li faru senĉesan kaj kruelan militon, al tio, kio havas pacan nomon kaj oficon? Aŭ, kial oni permesas, ke ŝi estu devigata pagi al li servon kaj ĝojon, kaj, ke li ne devigu sin, tion meriti?

Do, debetu li tion, kaj tion ŝi pagu, ĉar tion ŝi ŝuldas al li; kaj kvankam ŝi ne ŝuldu, ŝi pagu. Ĉar, kvankam li, ne sciis tion debeti, kion ŝi ŝuldas al Dio kaj al sia ofico, tio metas sur ŝin tiun ŝuldon, ĉiam plaĉi al sia edzo, gardante lian personon kaj lian domon, kaj ne estante al li, kiel supre estas dirita, multekosta kaj elspezema, kio estas la unua el la du aferoj, el kiuj, kiel ni diris, konsistas tiu ĉi gardo. Kaj kontentigante nin je tio, kion pri ŝi ni skribis, ni venu nun al la dua, kiu estas, ke ŝi estu laborema, al kio apartenas tio, kion Salomono aldonas, dirante:

## V

Kial la Sankta Spirito uzas terkulturistan virinon por modelo de la perfektaj edzinoj; kaj, kiel ili, ĉiuj, eĉ estante plej riĉaj kaj noblaj, devas labori kaj esti laboremaj.

*Ŝi serĉis lanon kaj linon, kaj laboris per la sciado de siaj manoj (1).*

Ĝi ne diras, ke edzo aĉetis al ŝi linon, por ke ŝi laboru, sed, ke ŝi ĝin serĉis. Por montri, ke la unua parto esti laborema, estas, ke ŝi estu profitema, kaj, ke el la branoj de sia domo, kaj el la restaĵoj kiuj ŝajnas perditaj, kaj tion, kion ne kalkulas la edzo, ŝi trovu valora, por provizi sin je lino, kaj je lano, kaj je ceteraĵoj, kiuj estas kiel tiuj ĉi; kiuj estas kvazaŭ armiloj kaj kampo, kie bona virino malkovras sian virton.

Ĉar aldonante sian arton al tio, kaj tion helpante per la vesperlaboro, kaj per sia lerteco kaj tiu de siaj servantinoj, ŝi ne farante novan elspezon, kaj kiel neavertite, kiam malpli ŝi pensos, ŝi trovos sian domon provizita, kaj plena je riĉaĵoj.

Sed eble diros la nunaj delikataj sinjorinoj, ke tiu ĉi pentraĵo estas kruda, kaj, ke tiu ĉi edzino estas edzino de iu terlaboristo, kiu ŝpinas kaj teksas, kaj virino de stato malsama ol ilia, kaj, ke tiel, Li ne parolas al ili. Al kio ni respondas, ke tiu ĉi edzino estas perfekta modelo de ĉiuj edzinoj, kaj mezuro al kiu, same la edzinoj de altaj, kiel tiuj de malaltaj statoj, devas sin alĝustigi, kiom al ĉiu estos eble, kaj estas rememorenskribo de tiu ĉi virto, al kiu, tiu, kiu pli sin apudigas estas pli perfekta. Kaj sufiĉa pruvo el tio estas, ke la

(1) Prov., ĉap. XXXI.<sup>a</sup>, ver. 13.<sup>a</sup>

Sankta Spiritu, kiu faris nin kaj konas nin, volinte instrui al edzino ŝian staton, priskribas ŝin per tiu ĉi maniero.

Sed, por ke tio restu pli komprenita, ni prenu l'akvon de ĝia komenco, kaj ni diru tiel.

Tri manieroj de vivoj estas, en kiuj oni dividas kaj je kiuj oni kompendias ĉiuj vivmanieroj eblaj inter tiuj, kiuj vivas edzigitaj. Ĉar aŭ ili terlaboras, aŭ ili provizas sin el iu komerca trakto kaj ofico, aŭ ili luas siajn terbienojn al aliaj, kaj senokupe vivas el sia rento. Kaj tiel, unu vivmaniero estas tiu de la plugantoj, kaj ni nomu ĝin terkultura vivo, kaj alia tiu de la komerctraktantoj, kaj ni nomu ĝin kontrakta vivo: kaj la tria, de tiuj, kiuj manĝas el siaj terbienoj, sed kulturigitaj per la ŝvito el la aliaj, kaj ĝi havu kiel nomo senlaca vivo.

Al la terkultura vivo apartenas, ne nur plugisto, kiu per paro da bovoj plugas sian malgrandan terporcion, sed ankaŭ tiuj, kiuj per multaj bovparoj, kaj per sufiĉega kaj fortika servantaro, rompas la kampojn kaj paŝtas grandajn brutarojn.

La alia vivo, kiun ni nomis kontrakta vivo, rilatas malriĉan komerctraktanton, kaj pogranda komercaĵiston, kaj meĥanikan oficiston, kaj artefariston, kaj la soldaton, kaj fine, kiun ajn, kiu vendas, aŭ sian laboron, aŭ sian arton, aŭ sian spriton.

La trian vivon, senokupan, la uzado faris nun propra de tiuj, kiujn oni nomas nobeloj, kaj kavaliroj, kaj sinjoroj, kiuj havas aŭ luantojn aŭ vasalojn, el kiuj ili eltiras siajn rentojn.

Kaj se iu demandus nin, kiu el tiuj tri vivoj estas la plej perfekta kaj la plej bona vivo, ni diros, ke tiu de la terkulturo estas la unua kaj la vera: kaj, ke la du ceteraj, pro la parto per kiu ili apudiĝas al ĝi, kaj kiome ili ŝajnas al ĝi, ili estas bonaj; kaj laŭ tio, kiom el ĝi ili deflankiĝas, ili estas danĝeraj. Ĉar oni devas kompreni, ke en tiu ĉi unua vivo, kiun ni nomas terkul-

tura, estas du aferoj, gajno kaj okupo: la gajno estas naiva kaj natura, kiel ni diris supre, kaj sen ofendo aŭ malpropra malplezuro; okupo estas laŭdinda kaj necesa, kaj majstro de ĉiu virto.

La dua vivo de kontraktado komunikas kun tiu ĉi per la dua afero, ĉar ankaŭ estas, kiel ĝi, okupacia vivo; kaj jen estas tio, kion ĝi havas bona; sed ĝi diferencas en la unua afero, kiu estas gajno, tial, ke ĝi tiun ĉi gajnon kolektas el la malpropraj bienoj, kaj la pliparton el la fojoj kun bedaŭro de iliaj posedantoj, kaj malmultefoje sen ia trompa miksaĵo. Kaj tiel, pri tio ĉi, ĝi havas iom da danĝero, kaj estas malpli bone reputaciita.

Ĉe la tria kaj lasta vivo, se ni rigardas pri gajno, ĝi estas preskaŭ same kiel la unua, almenaŭ ambaŭ elvenas el sama fonto, kiu estas terlaboro, kvankam kiam ĝi alvenas al tiuj de la vivo, kiun ni alnomas senokupa, pro minejoj kiujn ĝi trapasas, kelkajn fojojn ĝi prenas ian malbonan koloron de la lueco kaj de la lurentisto, kaj de la malegaleco, kiu, en tio laŭkutime estas; sed fine, por la plimulto, kaj preskaŭ ĉiam, estas gajno, kaj sendanĝera kaj honora rento, kaj en tiu ĉi flanko, la tria vivo estas bona vivo; sed se ni rilatas, al la okupo, ĝi estas tute malsame al la unua, ĉar tiu estas tre okupanta, kaj tiu ĉi estas tre senokupa, kaj, pro sama kaŭzo, tre riska al malutiloj kaj gravegaj malbonoj; maniere, ke la perfekteco kaj natureco ĉe tio ĉi, pri kio ni paroladas, estas la terkultura trakto.

Kaj mi povus nun, tie ĉi, pli skribigi la plumon laŭdante ĝin; sed mi tion forlasos por ne forgesi mian celon, kaj tial, ke ĝi estas afero jam juĝita de la antikvaj scienculoj, kaj por kies sentenco jam ne estas apelacio; kaj ankaŭ, ĉar al ni, kiuj scias, ke Dio metis homon en tiun ĉi vivon, kaj ne en alian, kiam Li kreis lin, kaj antaŭ ol li pekis, kaj kiam Li pli al li donacis kaj estimis, sufiĉas al ni tio, por scii, ke el ĉiuj vivmanieroj supre diritaj, tiu ĉi estas la plej natura kaj la plej bona.

Do, forlasinte tion ĉi, kiel aferon konsentitan, ni aldonas, antaŭenirante, ke ĉe ĉiuj aferoj, kiuj estas samdevenaj, kaj komuniĝantaj per sama tialo, se okazas, ke inter ili estas malsamaj gradoj de perfekteco, kaj, ke tio mem, kion ili ĉiuj havas, estas ĉe unuj pli senmanka, kaj ĉe aliaj malpli, prudento petas, ke tiu plej preferinda kaj perfekta, estu kiel regulo kaj modelo de la aliaj; kio estas diri, ke ĉiuj el ili devas rigardi la plej preferindan, kaj apudiĝi al ĝi, kiel eble plej, kaj, kiu pli alproksimiĝos al ĝi, tiu estos plibona klaso.

Klaran ekzemplon pri tio ni havas ĉe steloj kaj ĉe suno, kiuj, ĉiuj estas plenumaj korpoj, kaj suno havas pli da lumo ol ĉiuj ceteraj, kaj ĝi estas la plej luma kaj rebrila, kaj tial, tiu, kiu havas la prezidon ĉe la lumo, kaj, kiun ĉiuj lumajoj rigardas kaj sekvas, kaj el kiu ili des pli prenas siajn lumojn, ju pli ili apudiĝas al ĝi.

Do, mi diras nun, ke kiel inter ĉiuj vivmanieroj, de la edzhomoj, terlaboro havas la pli grandan kaj perfektan gradon de sendanĝereco kaj boneco, kaj ĝi estas, kie estas pruvite, la mezuro kaj la regulo kiun devas imiti ceteraj statoj, kaj celtabulo, kien ili devas rigardi kaj sin alproksimigi, kiel eble plej; neniamaniere decis, ke la Sankta Spirito, kiu volas meti tien ĉi unu, kiu estas modelo de edzinoj, metus, aŭ unu komercajedzinon edzinon el tiuj, kiuj vivas per kontraktado, aŭ tre zorgitan sinjorinon kaj edziniĝitan kun senokupa kavaliro. Ĉar unu kaj alia stato, estas malperfektaj statoj kaj malpli bonaj ol tiu, kaj, pro sama kaŭzo, neutilaj por esti prezentitaj kiel ĝenerala ekzemplo kaj por modelo. Sed Li elektis la pli bonan staton, kaj en ĝi Li faris pentraĵon de perfekta virino, kaj metis sin kvazaŭ antaŭ la okulojn de ĉiuj virinoj, tiel al la havantaj tiun vivmanieron kiel al tiuj de malsamaj statoj, por ke ŝi estu komuna al ĉiuj; al tiu de sama stato, por ke ili tute alĝustigu sin al ŝi, kaj al tiuj de malsama stato, por ke ili sin alproksimigu kaj fariĝu, kiel eble, similaj al ŝi.

Ĉar kvankam ne rilatu al ĉiuj, la lino, kaj la lano, kaj la ŝpinilo, kaj la teksaĵo, kaj esti vigla por servantinoj, kaj disdoni al ili la taskojn kaj la manĝopartoj; sed ĉe ĉiuj estas aliaj aferoj, kiuj ŝajnas al tiuj ĉi, kaj kun kiuj ili havas parencecon, kaj pri kiuj devas vigli kaj zorgegi la bonaj edzinoj, per tiu ĉi mem atento, kiun oni diras tie ĉi. Kaj al ĉiuj, sen ia escepto, estas bone, kaj apartenas, laŭ ilia maniero, ne esti nezorgemaj kaj elspezemaj, kaj esti laboremaj kaj pliigemaj pri siaj bienoj.

Kaj, se la nuna komforto kaj malbona uzo konvinkis, ke malzorgo kaj senokupo estas kondiĉo de nobeleco kaj majesteco, kaj se tiuj, kiuj nomas sin sinjorinoj, faras oficon, el tio, fari nenion kaj ĉion malzorgi, kaj se ili kredas, ke la terindustrio kaj terkulturo estas afero humilega kaj kontraŭa al tio, kio estas sinjoreco, bone estas, ke ili maltrompu sin per la vero. Ĉar, se ni turnas la okulojn malantaŭen, kaj se ni disrigardas sur la tempojn pasintajn, ni trovos, ke ĉiam, kiam la virto regis, la terkulturo kaj la ŝtato staris frate kaj kune. Kaj ni trovos, ke vivi el la terindustrio de bienoj, estis uzata vivo, kiu liveris reputacion al la princoj kaj gravaj sinjoroj.

Abraham'o riĉega homo, kaj patro de la tuta vera nobeleco, rompis la kampojn (1). Kaj Daviĉ'o, glora kaj nevénkebla reĝo, ne nur antaŭ ol regadi paŝtis ŝafojn (2), sed poste, kiam li estis reĝo, la mamoj el kiuj li sin nutris, tio estis liaj terlaboroj kaj liaj brutaroj. Kaj pri la romanoj, sinjoroj de la mondo, ni scias, ke de la plugado, ili iris al magistratestreco, kio estas same, al komando kaj regado de la tuta mondo, kaj post la magistratestreco, ili revenis al plugado (3). Kaj se ne estus tiu ĉi, vivo de nobeloj, ne nur uzita kaj traktita de ili, sed ankaŭ devigita kaj konvena al ili, neniam la poeto Homero en sia poeziaro, kiu estis viva imago de tio, kio al ĉiu persono

(1) Genes., ĉap. XXI.

(2) Lib. I, Reĝ., ĉap. XVII.

(3) Cic. pro Rosc. Amerin. Plin., lib. XVIII, *Historiæ Nat.*, ĉap. 3.<sup>a</sup>

kaj stato konvenas, estus metinta Elenon, nobela reĝino, kiu, kiam eliris vidi Telemakon, sidiĝanta sur sia seĝo, ŝia servistino metas apud ŝi en bonegan korbeton lanflok-ojn, jam pretajn por ŝpini, kaj ŝpinilojn plenajn je lanfadeno, kaj la ŝpinmaŝinon por ke ŝi ŝpinu (1). Nek Alcinoo, princo de sia riĉega popolo, en sia palaco estus farinta, kiel li faris, kvindek ŝpinistinojn el la cent sin-jorinoj kiujn li havis por sia servado (2). Kaj la ŝtofo de Penelope'o princino de Itaka'o, kaj ŝia teksado kaj mal-teksado (3), ne elpensus la prudento de tiel grava poeto, se la ŝtofo kaj teksado estus malpropra de la estraj virinoj. Kaj Plutarko skribas (4), ke en Romo al ĉiuj virinoj, eĉ se ili estus plej altrangaj, kiam ili edziniĝis, kaj kiam edzo alkondukis ilin al sia domo, ĉe la unua eniro, sur la sojlo, oni metis por ili, kiel necesan cer-emonion, unu ŝpinmaŝinon, por ke tio, kion ili vidos unuafoje enirante en sian domon estu avizo de tio, pri kio ili devas ĉiam sin okupi en ĝi.

Sed, ĉu estas necese alporti ekzemplojn tiel pasintajn kaj antikvajn, kaj meti antaŭ la okulojn tion, kion pro tre malproksima, preskaŭ oni ne vidas? Ne elirante el niaj domoj, en Hispanujo mem, kaj preskaŭ en la epoko de niaj avoj, ni trovas klarajn ekzemplojn de tiu ĉi virto, kiel oni legas pri la Katolika Reĝino *Doña Isabel'o*, fel-iĉega princino.

Kaj se tiuj, kiuj nun sin kredas tiaj, kaj, kiuj, oni nomas dukinoj kaj reĝinoj, ne bone konvinkas sin per prudento, ili tion provu dum malmulte da tempo, kaj ili prenu ŝpinmaŝinon, kaj ili armu la fingrojn per kudrilo kaj fingringo, kaj ĉirkaŭitaj de siaj servistinoj, kaj meze de ili, ili faru, kune kun ili, bonegajn laborojn, kaj pasigu iom el la nokto per tiu ĉi ekzercaro, kaj ŝteliĝu el la

(1) *Odys.*, lib. IV.<sup>a</sup>

(2) *Odys.*, lib. VII.

(3) *Odys.*, lib. II.<sup>a</sup>

(4) *In Quæst. Romanis.*

malvirtema dormo, por sin dediĉi al ĝi, kaj ili okupu la junajn pensojn de siaj fraŭlinoj pri tiuj ĉi laboroj, kaj ili faru, ke ili kuraĝigitaj pro la ekzemplo de sia sinjorino, konkuru inter si, penante sin superi, reciproke, pri tio esti laboremaj; kaj, kiam por la aranĝo aŭ provizo de iliaj personoj kaj domoj, ne estu al ili necesaj tiuj ĉi laboraĵojn, (kvankam ne estas ia domo tiel granda, kaj tiel reala, kie tiaj faroj ne alportu honoron kaj profiton); sed, kiam ne por si, ili faru por provizo kaj ŝirmo de cento da malriĉuloj kaj milo da malpropraj bezonoj.

Tiel, la dukinoj kaj reĝinoj traktu linon kaj laboru silkon, kaj donu taskon al siaj servantinoj, kaj provu kune kun ili je tiuj oficoj, kaj ili metu en stato kaj honoro tiun ĉi virton, kaj mi kuraĝas atingi, de la mondo, ke ĝi laŭdu ilin, kaj de iliaj edzoj, la dukoj kaj la reĝoj, ke ili pro tio, ilin taksu kaj ilin estimu: kaj ankaŭ mi atingos el ili, ke por pago de tiu ĉi zorgo, ili senpekigu ilin pro aliaj mil ĝenaj kaj memorindaj okupoj, per kiuj ili turmentas siajn korpojn kaj vizaĝojn; kaj, ke ili ilin pardonu kaj antaŭgardu pri la legado de kavaliraĵaj libroj, kaj pri la portado de sonetoj kaj kantaĵoj en la brusto, kaj pri bileto, kaj pri sprito de parolmendoj, kaj pri amindumejo kaj luksbalo, kaj pri aliaj cent samkvalitaj aferoj, eĉ se ili neniam ilin faros.

Tiamaniere, do, la bona edzino, pri kiu ni paroladas en tiu ĉi artikolo, estante laborema kaj domema, ŝi devas esti, aŭ terkulturistedzino, laŭ formo kiu estas dirita, au simila al terkulturistedzino, kiel eble plej. Kaj, ĉar pri tio, ke ŝi estas laborema, ni diris, ke tio ĉi estas la unua parto, esti profitema, kaj, ke pro tio, Salomon'o ne diris, ke edzo aĉetis linon al tiu ĉi virino, sed, ke ŝi ĝin serĉis kaj ĝin aĉetis; estas rimarkinda tio, kio pri tio ĉi okazas, ke kelkaj, kiuj sin disponas esti laboremaj, pro manko de tiu ĉi parto, esti profitemaj, estas pli multekostaj kaj penaj laborante, ol antaŭe ili estis malprofitemaj ne laborante. Ĉar, kiom ili faras kaj laboras,



ĉio devas elveni el la domo de juvelisto, kaj el la komercaĵisto, aŭ garantie, aŭ aĉetita per pligrandaj prezoj; kaj poste volas sorto, ke post ricevado de multe da oro, kaj multe da silko kaj perletaro, la tuta arto kaj laboro finiĝas per maldika birdokaptila reto, aŭ per simila vanta afero.

Do, al tiuj ĉi, ordonu ŝiaj edzoj, ke ili ripozu kaj ne laboru, aŭ ili tion faros sen ordono, ĉar ili estas multe malpli malbonaj por la domo, ol por la laboro kaj maldormo; ĉar granda parto de la domemeco kaj labor-emeco de bona virino, konsistas el tio, ke neniam aĵo de ŝia domo estu malprofitita, sed, ke ĉio akiru valoron kaj kresku en ŝiaj manoj, kaj, ke nesciante el kio, ŝi fariĝu riĉa, kaj eltiru trezoron kvazaŭ ni diras, el la balaaĵoj de sia portalo.

Kaj se la subiro al malgrandaĵoj ne estus privatigi tiun ĉi doktrinon, kiun la Sankta Spirito volas, ke ĝi estu ĝenerala kaj komuna, mi kondukus nun vian Moŝton tra tuta via domo, kaj ĉe ĉiuj ĝiaj anguloj, mi diras al vi, kio estas profitema; sed via Moŝto bone tion scias, kaj tion faras plibone, kaj tiuj, kiuj emas tiun ĉi virton, per si mem tion komprenas; kiel kontraŭe, tiuj, kiuj estas malzorgaj kaj malprofitemaj, ju pli oni tion diras al ili, des malpli ili neniam tion lernas. Sed ni vidu tion, kio sekvas al tio ĉi.

## VI

Oni elmontras kio estas hejmema virino kaj kia maniere  
ŝi devas pligrandigi la bienon.

*Si estis kiel komercaŝista ŝipo kiu el malproksime  
alportas sian panon (1).*

Pano nomas la Sankta Skribo, ĉion, kio apartenas kaj helpas al la provizon de nia vivo. Ĉar, Salomon'o komparas tiun ĉi, sian edzinigitan, kun komercaŝista ŝipo provizita kaj riĉa. Per kio, bele kaj efike, li klarigas la agon kaj la profiton de tio ĉi, pri kio ni traktas kaj nomas hejmema kaj laborema ĉe la virino. Ŝipo, je unuflanke, trakuras maron tra diversajn lokojn, trapasas multajn golfojn, alvenas en malsamajn terojn kaj provincojn, kaj ĉe ĉiu el ili, ĝi prenas tion, kion ĝi trovas bona kaj malkara, kaj nur prenante tion en sin, kaj tion transigante al sia lando, ĝi plikarigas tion, kaj duobligas, kaj triobligas la gajnon.

Plie ol tio ĉi, riĉeco, kiu enhaviĝas en ŝipo, kaj komercaĵoj, kiujn ĝi enhavas, ne estas riĉeco, kiu sufiĉas al nur unu homo, aŭ al aparta gento, sed estas plena provizo por unu urbo kaj por ĉiuj la malsamecoj de personoj, kiuj estas en ĝi: ŝipo enkondukas tolojn kaj silkojn, kaj orŝtofojn, kaj belajn oficoferaĵojn, kaj ĉiumanierajn provizojn, kaj da ĉio grandan sufiĉegon. Do, tio ĉi mem okazas al la hejmema virino, kiu, tiel, kiel ŝipo iras al diversaj landoj serĉante gajnon, tiel, ŝi devas traesplori ĉiujn angulojn de sia domo, kaj kolekti ĉion, kio ŝajnas esti tie perdita, kaj tion aliformigi en utilecon kaj profiton kaj palpi la diligentecon de sia industrio, kaj kvazaŭ ĝin provi, tiel ĉe malgrandaĵoj, kiel ĉe precipaĵoj.

Kaj, tiel kiel tiu, kiu marveturas Hindujojn, per

(1) Prov., ĉap. XXXI, ver. 14.<sup>a</sup>

kudriloj, kiujn li enkondukas, kaj per aliaj similaj objektoj, kiuj tie ĉi malmulte valoras, kaj la hindoj tre ŝatas, alportas riĉan oron kaj multekostajn ŝtonojn, tiel, tiu ĉi ŝipo, kiun ni pentradas, devas aliformigi per riĉeco, tion, kio ŝajnas pli foriginda, kaj tion aliformigi, sen ŝajno, ke ŝi ion faras, sed nur prenante tion mane, kaj, tion tuŝante, kiel faras ŝipo, kiun sen ŝajno, ke ĝi moviĝas, ĝi neniam ripozas; kaj, kiam la aliaj dormas, ĝi marveturas, kaj pligrandigas, nur per la aerŝanĝo, la valoron de tio, kion ĝi ricevis. Kaj tiel, la laborema virino, sidanta, ne estas kvietaj; dormanta, maldormas; senokupa, laboras; kaj preskaŭ ne sentante, kiel aŭ kiamaniere, ŝi fariĝas riĉa.

Via Moŝto kredeble vidis ian virinon, kiel tiu ĉi, kaj interne de via domo devas esti ne malgranda ekzemplo de tiu ĉi virto. Sed, se vi ne volas pri si rememori, kaj volas vidi per kiom da deco kaj vero domvirino estas ŝipo, vi metu antaŭ viajn okulojn virinon, kiu trakuras sian domon, kaj, kiu, de tio, kio ŝajnas perdita, ŝi faras monon, kaj aĉetas lanon kaj linon, kaj kune kun siaj servantinoj ŝi tion aranĝas kaj laboras; kaj vi vidis, ke ŝi sidadante kun siaj servantinoj, turnigante ŝpinilon en mano kaj rakontante fabelojn (kiel ŝipo, kiu ne ŝajnante, ke ĝi traslokiĝas, ĝi iras navigaciadante, kaj pasigante unu tagon kaj sekvigante alian, kaj per la veno de noktoj, kaj per la ektagiĝo de matenoj, kaj kurante kvazaŭ la afero ne moviĝas) oni teksas la tolon, kaj oni laboras la drapon, kaj oni elfinas la bonegajn laboraĵojn, kaj, kiam malpli ni pensas, plenigitaj la veloj je prospero, tiu ĉi, nia ŝipo, eniras en havenon, kaj komencas malfaldi siajn riĉaĵojn, kaj el tie eliras malvarma ŝirmilo por geservistoj, kaj vesto por gefiloj, kaj ŝiaj belvestoj, kaj la ornamaĵoj por ŝia edzo, kaj la litaj tolaĵoj riĉe broditaj, kaj la ornamoj por muroj kaj salonoj, kaj la belaj brodaĵoj, kaj la provizumo de ĉiuj domaj valoraĵoj, kio estas senplanka trezoro.

Kaj diras Salomon'o, ke tiu ĉi ŝipo alportas panon el malproksime; ĉar se via Moŝto komparas la komencon de tiu ĉi ago kun ĝia fino, kaj bone mezuras la vojojn tra kiuj oni venas en tiun ĉi havenon, apenaŭ vi komprenos, kiel oni povis alveni al ĝi, nek kiel estis eble, el tiel maldikaj kaj malproksimaj komencoj, fariĝi poste akvomulta rivero.

Sed ni pasu al tio, kio post tio ĉi sekvas.

## VII

Oni trograndigas la edzindevon frumateni, kaj oni konvinkas pri tio, per belega priskribo de la ravoj, kiujn kutimas alporti kun si la mateno. Oni avizas ankaŭ, ke la fruleviĝo el la lito, devas esti por aranĝi la geservantojn kaj provizi la familion.

*Ŝi frumatenis kaj disdonis al siaj helpaŝtistoj manĝporciojn, taskon al siaj fraŭlinoj (1).*

Tiu ĉi edzino, kiun la Sankta Spirito pentras kaj metas tien ĉi, por ekzemplo de la bonaj edzinoj, estas, kiel ni diris, edzino de homo el tiuj, kiuj vivas je terlaborado. Kaj la kialo de tio, ke Ŝi metas por modelo, tian klason de virino, kaj ne je la aliaj manieroj, ankaŭ estas dirita. Ĉar, kiel en similaj domoj, estas bezone, ke servantaro, kiu devas iri al kampaj aferoj, ellitiĝu tre matene, kaj tial, ke ĝi ne revenas hejmen ĝis nokte, estas bezone ankaŭ, ke ĝi kunportu kun si provizon por tagmanĝo kaj matenmanĝo, kaj, ke oni disdonu al ĉiu, tiel la porcion por sin nutri, kiel la aferojn kaj lokojn, en kiuj ĝi devas fari sian laboron tiun tagon; do,

(1) Prov., ĉap. XXXI, ver. 15.<sup>a</sup>

kiel tio, tiel estas, diras Salomon'o, ke lia bona model-edzino ne komisiis tiun ĉi atenton al iu el siaj servantinoj kaj ŝi restis ĝuante la matenandormon malzorge en sia lito, sed, ke ŝi leviĝis la unua, kaj, ke ŝi plifruigis ol la astro, kaj ekmontriĝis antaŭ ol la suno, kaj, per si mem, kaj ne per malpropra mano, provizis sian servantaron, tiel pri tio, kion ĝi devas fari, kiel pri tio, kion ĝi devas manĝi.

Ĉe kio, li instruas kaj ordonas al tiuj, kiuj estas tiaj, ke ili tiel faru, kaj al tiuj, kiuj estas alimaniere, ke ili uzu saman viglon kaj diligentecon; ĉar eĉ se ili ne havas por sendi al kampo helpaŝtistojn nek metiistojn, ili havas ĉiu en sia sorto kaj stato, aliajn aferojn, kiuj estas kiel tiuj ĉi, kaj, kiuj interesas al bona mastrumado kaj ĉiutaga kaj ordinara provizo de sia domo, kio devigas ilin vekigi, kaj malkuŝigi, kaj meti en tion sian zorgon kaj siajn manojn.

Kaj tiel, per tiuj ĉi, diritaj, kaj ĝenerale komprenitaj, vortoj, la Sankta Spirito avizas pri du aferoj, kaj aldonas al tiu ĉi edzinigita virino, kiun Li designadas, kvazaŭ du novajn kolorojn de perfekteco kaj virto. Unu estas, ke ŝi estu frumatenema, kaj tiu alia, ke frumatenante ŝi provizu tuj, kaj per si mem, tion, kion ordo de sia domo postulas. Kiuj ambaŭ estas tre gravaj aferoj.

Kaj ni diru pri la unua. Multe trompiĝas tiuj, kiuj pensas, ke dum ili, kies estas la domo, kaj kiujn ĝuste koncernas ĝia bono kaj ĝia malbono, dormas kaj malatentas, zorgos kaj viglos la servantino, kiun tio ne koncernas, kaj, kiu fine ĉion rigardas kiel malpropra. Ĉar se mastro dormas, kial vekigos la servanto? Kaj se sinjorino, kiu estas kaj devas esti la ekzemplo kaj la majstrino de sia familio, kaj el kiu devas lerni ĉiuj siaj servantinoj tion, kiokonvenas al lia ofico, ĉion forgesas; tial, kaj pli prave, la ceteraj estos forgesemaj kaj dormemaj.

Bone diris Aristotelo pri tiu ĉi sama afero (1), ke

(1) De cura rei familiaris, lib. I.<sup>a</sup>, ĉap. VI.<sup>a</sup>

*tiu, kiu ne havas bonan modelon, ne povas esti bona imitanto.*

Ne povos la servanto sin interesi pri la domo, se li vidas, ke ĝia mastro malzorgas ĝin.

Tiel, do, cdzino devas frumateni, por ke frumatenu ŝia servantaro. Ĉar ŝi devas kompreni, ke ŝia domo estas korpo kaj ke ŝi estas ĝia animo, kaj, ke kiel la membroj ne moviĝas, se ili ne estas movitaj de la animo, tiel ŝiaj servantinoj ne scios sin movi, se ŝi ne ilin movas, kaj ilin malkuŝigas, kaj ilin movas al iliaj laboroj.

Kaj, kiam la servantinoj frumetanus per si mem, dum dormas ilia mastrino, kaj ŝi ne ĉeestas por ilia okulzorgado kaj gardo, estas plimalbone se ili frumatenas; ĉar tiam, la domo dum tiu tempo estas kvazaŭ popolo sen reĝo kaj sen leĝo, kaj kvazaŭ komunumo sen kapo; kaj ili ne malkuŝigas por servi, sed por ŝteli kaj detrui, kaj tiu estas la ĝustatempo por kiu ili gardas siajn agojn; kial same, kiel en kastelo, kiu estas landlimo, aŭ en loko kie oni timas malamikojn, neniam viglo mankas, tiel ĉe domo bone mastrumita, dum maldormas la malamikoj, kiuj estas la geservantoj, ĉiam devas maldormi la sinjoro. Li estas tiu, kiu devas enlitiĝi la lasta, kaj la unua, kiu devas malkuŝiĝi el la lito.

Kaj sinjorino, kaj edzino, kiu tion ĉi ne faros, ŝi pretigu larĝe sian kuraĝon al sia granda malfeliĉo, konvinkita kaj certa, ke malamikoj eniros en la fortikaĵon, kaj iam ŝi sentos la malprofiton, kaj alian tagon, ŝi vidos la ŝtelon, kaj senĉese la malplaĉon, kaj malbonan kolekton kaj servon; kaj, ke al la malbono de la havo, akompanos, ankaŭ, la malbono de la honoro.

Kaj, kiel diras Kristo en la Evangelio (1), ke *dum familapatro dormas, malamiko disemas malamikecon*; tiel, ŝi, per sia malzorgo kaj dormo, enpenetrigos en sian domon la diboĉon kaj la malĉastecon, kiu malfermos la pordojn, kaj falsos la ŝlosilojn, kaj venkos la zorgojn,

(1) Math., ĉap. XIII.<sup>a</sup>, ver. 25.

kaj penetros ĝis la lastaj sekretoj, malpurigante la servistinojn, kaj ne sin haltigante ĝis tio, meti ĝian infekton en la filinojn; pro kio, sinjorino, kiu tiam ne sciis, nek volis, matene eljeti el la okuloj la dormon, nek iom ĝin forlasi, dolorita kaj vundita en la koro, trapasos, per maldolĉaj ekĝemoj, multajn noktojn maldormante.

Sed estas pena frumateni, kaj malprofita por sano. Kvankam tio ĉi estus, estante aliflanke, tiel utila kaj necesa por bona mastrumado de la domo, kaj tiel devigita al ofico de tiu, kiu sin nomas ĝia sinjorino, oni devas postmeti tiu malprofiton; ĉar pli devas homo al sia ofico, ol al sia korpo, kaj pli granda doloro kaj malsano estas senĉese konduki sian familion malordigitan kaj malzorgitan, ol iom suferi, aŭ pro malforteco en stomako, aŭ pro pezo en kapo. Sed kontraŭe; frumateni estas tiel saniga, ke nur la sana kaŭzo, kvankam ne vekus la zorgo kaj devo de la domo, devus malkuŝigi el la lito la edzinojn, tuj post tagiĝo.

Kaj Dio, ĉe tio ĉi, kiel ĉe ĉio cetera, gardas la dolêcon kaj malfortecon de sia saĝa regado, ĉar tio, kion Li devigas al ni, estas mem, kio pli konvenas al nia naturo, kaj, ĉar, kion Li ricevas por Sia servado, tio estas nia profito. Tiel, do, ne nur la domo, sed ankaŭ la sano petas de la bona virino, ke ŝi frumatenu.

Ĉar estas certe, ke nia korpo estas el metalo de la aliaj korpoj, kaj, ke la ordo, kiun gardas natureco por la bono kaj konservado de la ceteraj, tiu mem estas, kiu konservas kaj donas sanon al la homoj.

Do, kiu ne vidas, ke en tiu horo la tuta mondo vekigās? Kaj, ke la nova lumo elirante, malfermas la okulojn de ĉiuj bestoj? Kaj, ke se tiam estus malprofite forlasi dormon, naturo (kiu ĉe ĉiuj aferoj, ĝenerale, kaj ĉe ĉiu aparte, evitas kaj forkuras la malutilon, kaj sekvas kaj ŝatas la profiton, aŭ, kiu, por diri la veron, estas mem, kio al ĉiuj aferoj konvenas kaj estas profita) ne rompus, tiel baldaŭ, la vualon de la mallumoj, kiuj ek-

dormigas nin, nek elirigus tra la oriento la helajn radi-  
ojn de la suno, aŭ se ĝi ilin elirigus, ne donus al ili tiom  
da fortoj por nin vekigi? Ĉar, se lumo ne vekus nature,  
tiuj, kiuj estas prenitaj de la dormo, ne malfermus al  
ĝi la fenestrojn tiel diligente. Tiel, do, naturo, ĉar ĝi  
sendas al ni lumon, ĝi volas sendube, ke lumo veku  
nin. Kaj, ĉar ĝi vekas nin, al nia sano konvenas, ke ni  
vekiĝu.

Kaj ne kontraŭdiras al tio ĉi, la moroj de la personoj,  
kiujn la mondo nun nomas sinjoroj, kies precipa zorgo  
estas vivi por la ripozo kaj komforto de la korpo, kiuj  
estas en lito ĝis la dekdua horo de la tago. Kontraŭe,  
tiu ĉi vero, kiu oni palpas per la manoj, kondamnas  
tiam malvirton, el kiu, ĉu pro niaj pekoj, aŭ pro siaj  
pekoj mem, ili faras honoron kaj staton, kaj metas  
parton de sia grandeco en tio, ne gardi, eĉ en tio ĉi, la  
ordon, kiun Dio metis al ili.

Persono, kiun mi konis, punadis bone tiun ĉi malbon-  
aĵon kaj nomadis ĝin per ĝia inda vorto. Kaj kvankam  
ĝi estas tiel malnobla, kiel estas la ago, via Moŝto donos  
al mi permeson por ke mi ĝin metu tien ĉi, ĉar estas  
ĝusta vorto. Tiel, do, kiam iu diris al li, ke ĉe sinjoroj  
estas stato tiu ĉi dormado, li kutimis respondi, ke oni  
eraruzis la vorton, kaj, ke anstataŭ diri *bestejon* (1) ili  
diris *staton* (2).

Kaj tio, vere estas, ke tiu malordigo de vivo havas  
komencon kaj naskiĝas el alia pli granda malaranĝo,  
kiu estas en la animo, kaj ĝi ankaŭ estas kaŭzo kaj  
komenco de multaj aliaj malĉastaj kaj malbelaj mal-  
ordigoj. Ĉar sango kaj ceteraj materioj de la korpo, pro  
varmo de la tago kaj de la dormo, troe flamigitaj kaj  
difektitaj, ne nur malpurigas la sanon, sed ankaŭ ŝatigas  
kaj infektas malbele la koron.

Kaj estas admirindaĵo, ke estante tiuj ĉi sinjoroj, ĉe

(1) Hispane, estable.

(2) Hispane, estado.



ĉio cetera, grandaj daŭrigantoj, aŭ por pli bone diri, grandaj sklavoĵoj de sia ravo, nur ĉe tio ĉi ili ĝin forgesas, kaj perdas pro malvirta dormo, la plej ravan aferon el la vivo, kiu estas mateno. Ĉar tiam, lumo, kiel ĝi venas post mallumo, kaj oni ĝin trovas kvazaŭ post perditeco, ĝi ŝajnas alia, kaj frapas homan koron, per nova gajeco; kaj tiam, la ĉiela vidiĝo, kaj koloriĝado de la nuboj, kaj malkovriĝo de la tragraĝo (kiun ne malprave, poetoj (1) kronas per rozoj), kaj apero de la beleco de la suno, estas belegaj.

Nu, kia dubo estas, ke la birda kantado sonas tiam pli dolce? Kaj floroj kaj herboj, kaj la tuta kamparo, ellasas el si odoran trezoron. Kaj, kiel, kiam reĝo unuafoje eniras en ian urbon, ĝi aranĝiĝas kaj belegiĝas kie ajn, kaj urbanoj elmontras, kaj kvazaŭ paradas siajn pli bonajn riĉaĵojn; tiel la bestoj, kaj la tero, kaj la aero, kaj ĉiuj elementoj gajiĝas, kiam suno alvenas, kaj por ĝin ricevi belegiĝas, kaj pliboniĝas, kaj ĉiu el ili publikigas siajn bonaĵojn. Kaj, kiel la scivolemuloj kutimas meti zorgon kaj penon por vidi tiajn akceptojn, tiel la ordigitaj kaj saĝaj homoj, eĉ nur por plezuro, ne devas perdi tiun feston, kiun la tuta naturo faras matene al la suno. Ĉar, tio ne estas plezuro por nur unu sento, sed ĝenerala kontento de ĉiuj; ĉar, vido raviĝas pro luma naskiĝo, kaj pro malvarmeteco de aero, kaj pro la ŝanĝado de la nuboj; al la aŭdo, birdoj faras agrablan harmonion; por flarado, la odoro, kiun tiam kamparo kaj kreskaĵoj elĵetas, estas delikatega odoro; ĉar tiama malvarmeta aero moderigas per granda ravo, materion varmigitan pro dormo, kaj kreas sanon, kaj forlavas la korajn malgajecojn, kaj, mi ne scias kiel, ĝin vekas al diaj pensoj, antaŭ ol ĝi dronos en la tagajn aferojn.

Sed, se amo al mallumo, de tiuj mallumaj filoj, tiom

---

(1) Virgilio, lib. VI.<sup>a</sup>, *Æneid*, ver. 535.<sup>a</sup>. Garcilaso de la Vega, *Poemo II*.<sup>a</sup>

povas, ke eĉ de tago ili faras nokton, kaj perdas frukton de la lumo pro dormo, kaj nek ravo, nek sano, nek bezono kaj profito, pri kiuj ni diris, estas potencaj por ilin malkuŝigi, via Moŝto, kiu estas filino de lumo, sin levu kun ĝi, kaj malfermu la helecon de viaj okuloj, kiam malkaŝos la suno siajn radiojn, kaj kun pura brusto, vi levu viajn purajn manojn al Donanto de la lumo, prezentante al Li, per sanktaj kaj dankaj vortoj, vian koron; kaj tion farinte, kaj ĝuinte plezuron de la nova tago, returnante al la domaj aferoj, okupu vin pri via ofico, kio estas la dua afero, kiu la Sankta Spiritu petas ĉe tiu ĉi skribaĵo al la bona edzino, kiel fino, kion oni ordonis tio unue, kaj ni diris pri la frumateniĝo.

Ĉar oni ne komprenas, ke se edzinon frumatenas, ĝi estos por ke ŝi ĉirkaŭita de vazetoj kaj skatoletoj, kiel kelkaj faras, restu sidanta tri horojn, maldikigante la brovon, kaj pentrante la vizaĝon, kaj traktante kun sia spegulo, por ke ĝi mensogu kaj nomu ŝin bela. Kio havas, krom grava malbono, kiu estas en tiu ĉi malpropra artifiko kaj pri kiu oni diros ĝustaloke, tio estas, ne trafi la finon de ŝia klopodo, kaj tio estas, manki al ŝia domo, por okupi sin pri tiel nenecesaj aferoj, ke estus malpli malbone dormi.

Ŝi, do, malkuŝiĝu, kaj malkuŝiĝinta, regu sian servantaron, kaj rigardu tion, kion oni devas provizi kaj fari tiun tagon, kaj al ĉiu el siaj geservantoj donu ĝian oficon; kaj, kiel kapitano en milito, kiam laŭvice ordigas sian roton, metas ĉiun soldaton en lian propran lokon kaj ordonas al ĉiu, ke li gardu sian postenon, tiel ŝi estas disdononta al siaj geservantoj iliajn laborojn, kaj ilin ĉiujn ordigi. Ĉe kio, oni enhavas grandajn profitojn; ĉar, unue, oni faras tion, kio decas per sufiĉe da tempo kaj plezure; alie, por ke kiam iafoje okazas, ke malsano aŭ okupo, forestigu la sinjorinon, jam estas pretaj geservantoj, pro kutimo, kiel majstroj pri tio, kion ili devas fari; kaj kvankam la voĉon, kaj ordonon de ilia mastrino, al

kiu jam estas kutimigitaj iliaj oreloj, ili ne aŭdas tian ankoraŭ ĝi sonas en ili, kaj estas al ili kvazaŭ ŝi ĉeestante nevidate.

Kaj, krom tio ĉi, el la zorgo de la mastrino lernas servantinoj esti zorgemaj; kaj ili ne kuraĝas malestintion, ĉe kio ili vidas, ke ilia sinjorino uzas sian diligentecon kaj ordonon; kaj, kiel ili sentas, ke ŝia vido kaj ŝia provizo ĉie vastiĝas, ŝajnas al ili, kaj prave, ke ĉe ĉio, kiom ili faras, ili ŝin havas kvazaŭ okulvidantino ĉeestantino, kaj tiel, ili kuraĝas, ne nur plenumi fidelsiajn agojn kaj oficoj, sed, ankaŭ, speciale bonegiĝi por ili. Kaj tiel, kreskas bono, kiel ŝaŭmo, kaj pliboniĝas la havo, kaj regas ordo, kaj malplaĉo estas forigita.

Kaj fine, vidado, kaj ĉeesto, kaj voĉo, kaj ordonado de mastrino, faras al ŝiaj fraŭlinoj, ne nur, ke ili estu al ŝi profitaj, sed, ke ili ne sin faru malvirtaj, kio ankaŭ apartenas al ŝia ofico. Sekvas.

## VIII

**Perfekta edzino, ne nur devas zorgi provizi sian domon kaj konservi tion, kion edzo akiras, sed ŝi devas, ankaŭ, pligrandigi la havon.**

*Plaĉis al ŝi kampobieno kaj ŝi ĝin aketis, kaj frukto de ĝiaj palmoj, ŝi semis vinberujon (I).*

Tio ĉi ne estas ia nova ordono diferenca el la partintaj, nek alia virto pli aparta ol la diritaj, sed ĝi estas plibone, kiel afero kiun oni eltiras kaj estas maskita el ĉi.

Ĉar certe, edzino, kiu estas tiel limigita por sia elspezoj, kaj unuflanke tiel ne scivolema, kaj aliflanke tiel hejmema, kaj maldormema, kaj profitema, ne mal-

(1) Prov., ĉap. XXXI.<sup>3</sup>, ver. 16.<sup>3</sup>

konservos kion ŝia edzo akiras, sed ankaŭ ŝi, de sia flanko, tion pliigos, kaj, jen estas tio, kion tie ĉi nun oni diras. Ĉar el tiel granda lerteco kaj maldormo, frukto nur povas esti sed granda.

Tiel, do, al ceteroj titoloj, kiujn ni donis al bona virino, sekvante tiun ĉi Dian doktrinon, ni nun aldonas tiun ĉi, ke ŝi estu progresiganta sian havon, ne kiel titolo diferenca el la unuaj, sed kiel afero konsekvenca el ili, kaj kiu deklaras la fortikecon de tiuj pasintaj, kaj tion, kion ili povas, kaj ĝis kie, ili estas alvenontaj.

Kaj tiel, diri, ke ŝi aĉetis heredaĵon, kaj, ke ŝi starigis vinberujaron, per sia mana ŝvito, estas avizi ŝin, ke pri domemo kiun oni al ŝi petas, ŝia memestimo ne devas haltigi ĝis tio ĉi, kio estas, nur provizi sian domon, sed ankaŭ progresigi sian havon; ne nur sukcesi, ke tion, kio estas dominterne estu bone provizita, sed ankaŭ, ke nombre ŝi pliiĝu la eksterajn bienojn kaj posedaĵojn. Kaj estas al ŝi diri, ke ŝi pretendu kaj fierigiĝu povi malkaŝe diri, montrante, kvazaŭ per la fingro, iun el siaj posedaĵoj.—«Tiu ĉi estas frukto de miaj laboroj, mia lerteco aldonis tion ĉi al mia domo, pro miaj ŝvitoj fruktiĝis tiu ĉi havon»—tiel, kiel kelkaj tion faris en nia epoko.

Sed ili diros, ke tio ĉi estas multe peti. Sed mi demandas al kiuj, tion diras: kion en tio ĉi, ili kalkulas multa? Ĉu ili kalkulas multe, ke pro diligenteco kaj profiteco kaj laboro de virino, helpita de ŝiaj servantinoj, eliru aĵo tiel valora, kiel tio ĉi estas? Aŭ, ĉu ili kalkulas multe, ke ŝi volu elspezi tion, kion ŝi akiras per tiuj ĉi profitajoj kaj bienoj, kaj ne per ŝiaj kontentiĝoj kaj belornamoj?

Se la lasta estas, kio ŝajnas al ili multa, ĉe tiu ĉi doktrino ili malpravas, nek ankaŭ konsiderinte alian elspezon, kiel pli adekvata al ŝi, nek kiel pli kvieta kaj plaĉa, nek ankaŭ pensante, ke ĉe vendejo oni vendas aĵon, kiu aĉetita, povas beligi ilin pli, ol tiuj ĉi aĉetaĵoj.

Ĉar, tio pereas en la aero, kaj bono kaj honoro kaj kontento, kune kun bona nomo, kiun per tiu ĉi alia vojo oni akiras, kiel ĝi havas radikojn en la virto, estas longedaŭra kaj ĉiama.

Sed se tio, la unua afero, ilin timigas, ĉar ili ne konfidas pri tiom da bono el siaj manoj, unuflanke ili ofendas sin mem, kaj limigas malkuraĝe ilian povon, kaj tio aliflanke, ili scias, ke tio ne estas tiel, kaj, ke ili povas, se ili volas sin doni al tio, preterpasi tiun ĉi limon; ĉar, kien ne alvenos tiu, kiu povas fari, kaj tiu, kiu faros tion, kio sekvas?

## IX

**Kiom bona virino devas eviti senokupecon, kaj pri malvirtoj kaj malbonaj rezultatoj kiuj el ĝi devenas.**

*Ŝi zonis sin per fortikeco, kaj fortikigis sian brakon. Ŝi tre ŝatis profitigi; ŝia kandelo ne estingiĝis nokten. Ŝi metis siajn manojn en ŝpinilradeton kaj ŝiaj fingroj prenis ŝpinilon (1).*

Havu kuraĝon virino, kaj ŝi semos vinberujaron: Ŝi amu laboron, kaj ŝi progresigos sian domon; ŝi metu siajn manojn en tion, kio estas adekvata al ŝia ofico, kaj ŝi ne malestimu sin pro ĝi, kaj kreskos ŝiaj bienoj; ŝi ne sin malzonu, tio estas, ŝi ne moliĝu, nek faru kvazaŭ ŝi estas delikata, nek ŝi havu kvazaŭ honoro la senokupon, nek kvazaŭ stato la senokupecon kaj la dormon, sed ŝi metu forton en siajn brakojn, kaj ŝi kutimigu siajn okulojn al maldormo, kaj ŝi ĝuu ĉe la laborado, kaj ŝi ne malŝatu meti manojn en tion, kio rilatas al

(1) Prov., ĉap. XXXI.<sup>a</sup>, ver. 17.<sup>a</sup>, 18.<sup>a</sup>, 19.<sup>a</sup>

virinoŝoj, eĉ se humila kaj malgrandeta tio estas, kaj tiam ŝi vidos kiom valoras kaj kien alvenas ŝiaj agoj.

Tri aferojn petas tie ĉi Salomon'o, kaj ĉiu en malsama versikulo: ke ŝi estu laborema unue, kaj due, ke ŝi maldormu, kaj trie, ke ŝi ŝpinu. Li ne volas, ke ŝi regalu sin, sed, ke ŝi laboru.

Multaj skribitaĵoj estas de multaj personoj, laŭdantaj laboron, kaj ĉio estas malmulte por la bono, kiu estas en ĝi; ĉar ĝi estas salo, kiu antaŭgardas de malvirtigo tian vivon kaj nian animon; sed mi ne volas tie ĉi ion diri pri tio ĝenerala. Tion, kio eksklusive rilatas al elzinita virino, mi nur diros, ĉar, ĵu pli, per si mem, virino estas pli klinita al regalo kaj pli facila malfortiĝi kaj malligiĝi, pro senokupo, des pli laboro konvenas al ŝi.

Ĉar, se homoj, kiuj estas viroj, pro regalo ekprenas virinkuraĝon kaj virinkondiĉon kaj kvazaŭviriniĝas; kio okazos al virinoj, sed ne tio, kio hodiaŭ okazas al multaj el ili? Ke silko estas al ŝi malglata, kaj rozo malmola, kaj, ke ili malfortiĝas starante sur siaj piedoj, kaj pro aero, kiu bruas, ili svenas, kaj diri plenan vorton ilin lacigas, kaj eĉ, kion ili diras, tion ili abortas, kaj suno ne estas vidonta ilin, kaj ĉiuj ili estas mola ŝukaĵo kaj *koto*, kaj naŭzaĵo, kaj ili pardonu min ĉar ŝi difinas ilin per tiu ĉi nomo, kiu estas tiu, de kiu ili ili kuras; aŭ por pli bone diri, ili danku min, ĉar mi ŝi malsevere ilin nomu. Ĉar, kiu konsideras tion, kio ŝi devas esti, kaj tio, kio ili mem fariĝas, kaj, kiu rigardas la tecon de ilia naturo kaj malaltecon, en kiun ili men sin metas pro sia malbonmoro, kaj komparas unu kaj alian, malmulte li diras pro tiel ilin nomante; kaj se li nomus ilin *koto*, kiu putrigas kaj infektas aeron, kaj malamindan abomenaĵon, ankoraŭ li dirus malmulte. Ĉar havante prudentuzon, kaj estante kapablaj je virtaj kaj laŭdaj aferoj, kaj havante estaĵon, kiu povas ĉeesti en la ĉielo, kaj, kiu estas invitita al la Diaj bonfaroj, ili mem

ĝin tiel multe detruas kaj tiel multe ili infaniĝas per delikateco, kaj ili tiom humiligegiĝas, ke lacerteto, kajfluganta papilieto, havas pli da graveco ol ili, kaj plumo, kiu iras en la aero, kaj aero mem, estas pli densa kaj substanca.

Tiel, do, bona virino multe devas rigardi pri tio, estante certa, ke se ŝi malzorgas tion, ŝi neniigĝos. Kaj same, kiel tiuj, kiuj pro sia naturo estas emaj al kelkaj malsanoj, ili sin gardas zorge de tio, kio por tiaj malsanoj al ili malutilas, tiel ili sciu, ke ili vivas pretaj por tiu ĉi malsano de nuleco kaj delikataĉo, aŭ mi ne scias kiel ĝin nomi, kaj, ke en ĝi, regalo estas *arseniko*, kaj ili sin gardu de ĝi, kiel ili forkuras de la morto, kaj ili kontentiĝu pri ilia natura malmulteco, kaj ili ne aldonu al ĝi malhumilegecon, nek ili faru ĝin pli malgrandigita; kaj ili avertu kaj komprenu, ke ilia naturo estas virina, kaj, ke la senokupo per si men kvazaŭviriniĝas, kaj ne kunigu al la unua, la alian, nek ili volu esti du fojojn virinoj. Mi diris pri la nula ekstremo al kiu alvenas delikataj kaj regalitaj virinoj, kaj mi ne diras pri multego da malvirtoj, kiuj pro tio mem en ili naskiĝas, nek mi kuraĝas enmeti manon en tiun ĉi koton. Ĉar ne estas senmova kaj putra akvo, kiu naskas tiom da, kaj tiel malbonajn fibestetojn, kiel naskiĝas naŭzaj kaj malbelaj malvirtoj en brustoj de tiuj ĉi delikataj sinjorinoj, pri kiuj ni paroladas. Kaj ĉe unu el ili, kiun pentras la Sankta Spirito en *Proverboj* (1), oni vidas ion el tio ĉi: pri kiu Li tiel diras:

«Babilema kaj vagistino, kaj kiu ne suferas resti kvieta, nek scias teni piedojn dome, jam ĉe la pordo, jam ĉe la fenestro, jam ĉe la placo, jam ĉe strataj anguloj, kaj etendas kien ajn siajn retojn. Ŝi vidis junulon, kaj ŝi sin apudigis al li, kaj lin ekkaptis, kaj, per afekta mieno, ŝi diris al li afablaĵojn:—Hodiaŭ mi festas

(1) Prov., ĉap. VII,<sup>a</sup>, a. 10, ad. 18.

kaj mi eliris serĉi vin, ĉar mi ne povas vivi ne vidante vin, kaj fine mi ekkaptis vin. Mian salonon mi ornamis per belegaj retetoj, kaj mian dormĉambbron per egiptaj tapetoj: per rozoj kaj floroj, per mirĥo kaj aloo estas tegita la planko kaj la lito. Venu, kaj ni drinku la aman ebriecon, kaj ni ĝuu nin, reciproke, per dolĉaj ĉirkaŭprenoj, ĝis ekalveno de la taglumo.»

Kaj se ĉiuj senokupulinoj ne eliras al publikaj stratoj, kiel tiu ĉi eliris, iliaj kaŝitaj anguloj estas sekretaj atestantoj de iliaj heroaĵaĉoj, kaj ne tiel sekretaj, ke ili ne estu viditaj kaj komprenitaj. Kaj la tialo kaj natureco de la aferoj, tion postulas. Ĉar certe estas, ke kampo ne rompita nek kulturigita, produktas malbonajn herbojn, kaj, ke pro la senuzo, fero rustiĝas kaj konsumiĝas; kaj, ke senokupa ĉevalo kripliĝas.

Kaj krom tio ĉi, se edzino nek laboras nek okupas sin pri tio, kio apartenas al sia domo, kiajn aliajn lernadojn aŭ aferojn ŝi havas por sin okupi? Ne pre estas, ke se ŝi ne okupas sin pri siaj oficoj, ŝi okupu sian vivon en malpropaj oficoj kaj, ke ŝi kutimu esti fenestrema, vizitema, stratema, amikino de festoj, malamikino de sia angulo, de sia domo forgesanta, kaj de malpropaj domoj scivolema, eldemandanta pri ĉio, kio okazas kaj eĉ elpensinta de tio, kio ne okazas, babilema kaj malpacigema, dismovema de pledoj, ankaŭ ludema, kaj tute sindoninta al rido, kaj al konversacio, kaj al publika salono, kune kun cetero, kiu pro ordinara konsekvenco devenas, kaj pri kiu oni silentas nun tie ĉi, pro tio, ke ĝi estas malkaŝita kaj publika afero.

Tiel, do, en tuteco, kaj, kiel per unu vorto, laboro faras, ke virino estu, aŭ ne estu bona; ĉar sen ĝi, aŭ ŝi ne estas virino, sed naŭzo, aŭ estas tia virino, ke estus malpli malbone se ŝi ne estus virino.

Kaj, se pro tio ĉi, kion mi diris, ili konvinkiĝas labori, ne estos bezone, ke mi diru kaj instruu ilin, kiel ili devas teni ŝpinilon kaj ŝpinmaŝinon, nek estos al mi bezone



petegi ilin, ke ili maldormu, kiuj estas la aliaj du aferoj kiujn petas de ili la Sankta Spirito, ĉar ilia sama bona ŝato ilin montros al ili. Kaj tiel, forlasante tion ĉi, tie ĉi, ni pasos al tio, kio sekvas.

## X

**La perfekta edzino devas esti bonkora por malriĉuloj kaj bezonuloj; sed ŝi devas zorge vidi, kiun ŝi akceptas domen kaj kiun ŝi favoras.**

*Siajn manplatojn ŝi malfermis por malĝojulo, kaj siajn manojn ŝi etendis al bezonulo (1).*

Ĝustatempe Salomon'o metis tion ĉi, tien ĉi, ĉar, tiel ripetinte tion, kio apartenas al pligrandigo kaj profito. kaj konsilite al virino tiom da fojoj kaj per tiel trolaŭditaj vortoj, ke ŝi estu laborema kaj hejmema, Li forlasis ŝin, ŝajne, tre apuda al avareco kaj troŝparemo, kiuj estas malbonaĵoj, kiuj havas parencecon kun profitemo, kaj kiuj apudestas al ĝi ne malmultajn fojojn.

Ĉar, tiel, kiel estas kelkaj malvirtoj, kiuj havas ŝajnon kaj similecon al kelkaj virtoj, tiel estas ankaŭ virtoj, kiuj estas kvazaŭ riskaj al malvirtoj, ĉar, kvankam estas vero, ke virto konsistas el mezo, kiel tiu ĉi mezo ne estas mezurata laŭlonge, sed estas mezo kiun oni devas mezuri per prudento, multfoje ĝi malproksimiĝas pli de unu ekstremo ol de la alia, kiel okazas ĉe liberaleco, kiu estas virto mezurita de prudento inter la du ekstremoj de avarulo kaj de malŝparemulo, kaj ĝi apartiĝas multo malpli de malŝparemulo, ol de avarulo.

Kaj eĉ ankaŭ okazas, ke el virto kaj el marvirto,

(1) Prov., ĉap. XXXI.<sup>a</sup>, ver. 20.<sup>a</sup>

kiuj vere estas tre malsamaj fundamentoj ĉe publika vidado kaj ĉe tio, kio de ekstere ŝajnas, estas naskitaj tre similaj fruktoj. El multe malbono estas kaŝema aŭ el multe ĝi penas sin kaŝi por nia malbono, aŭ por plibone diri, el multa estas forto kaj bonego de la bono, kaj tiel ĝenerala ĝia profito, ke eĉ la malbono, por povi vivi kaj valori, alproksimiĝas al ĝi kaj sin vestas per ĝi, kaj deziras preni ĝian koloron. Tiel, ni vidas, ke saĝulo kaj honestulo forkuras de kelkaj danĝeroj, kaj timemulo kaj malkuraĝulo ankaŭ forkuras de ili, kie, kvankam motivoj estas malsamaj, estas unu kaj simila la forkuro. Kaj, samamaniere ni vidas, ke homo ordigita ekspluatas kaj plibonigas sian havon, kaj avarulo ankaŭ estas ekspluatisto; kaj, ke ili estas unu mem pri la ekspluatado, kvankam pri la ekspluatmotivoj ili estas diferencaj.

Kaj, tiom povas tiu ĉi parenceco kaj kaŝemo, ke, ne nur tiuj, kiuj rigardas de malproksime kaj nur vidante tion kio nur ŝajnas, trompiĝintaj, nomas kiel virton, tion, kio estas malvirto; sed ankaŭ tiuj mem, kiuj metas siajn manojn en tion, kaj tion ili faras, multajn fojojn ili ne komprenas sin mem, kaj ili konvinkiĝas, pri tio, ke devenas el virta radiko, tio, kio venas el malutila kaj malvirta celo. Pro kio, ĉio, kio estas simila, petas grandan averton, por ke la malbono, kaŝita je la bono, ne povu nin trompi.

Kaj, tiel, ĉar al Dio nur plaĉas virto, kaj, ĉar esti virino tre ekspluatema, povas deveni el avareco kaj el malvirto, por ke ŝi ne laciĝu senfrukto, kaj por ke ŝi ne ofendu Dion pri tio, per kio ŝi pensas al Li plaĉi, Li avizas ŝin, tie ĉi, ke ŝi estu almozdonema, kio estas diri al ŝi, ke, ja, Li ordonis ŝin, ke ŝi estu laborema kaj profitema, kaj maldormema, kaj amasigema, sed Li ne volas, ke ŝi estu malfeliĉa nek malsufiĉema, nek Li volas ke la tuta maldormado kaj akirado, estu por kofro kaj por blato, sed por provizo kaj vestado, ne nur de

ŝiaj, sed ankaŭ de bezonuloj kaj malriĉuloj, ĉar neniel Li volas, ke ŝi estu avarulino. Kaj tial, Li elegante diras, ke ŝi malfermu manplaton, kiun avareco fermas, kaj antaŭenirigu kaj altiru la manon, kiun kutimas kuntiri malsufiĉeco.

Kaj, ja, ke esti pia kaj almozdona, estas virto, kiu konvenas al ĉiuj, kiuj konsideras sin homoj; sed, kun speciala motivo, virinoj devas tiun ĉi piecon al moleco de sia naturo; kaj, oni komprenu, ke esti virino de malmola kaj seka inklino por bezonemuloj, estas ĉe ŝi pli mallaŭdinda, ol ĉe iu homo.

Kaj, ne estas bona senkulpigo diri, ke edzo tion malpermesas, ĉar kvankam estas vere, ke respondas al li la bienan disdonon, ne oni komprenas, ke se li malpermesas al sia edzino, kaj trudas al ŝi leĝon, por ke ŝi ne faru aliajn senutilajn elspezojn, li volas ankaŭ fermi al ŝi la pordon, al tio, kio, estas pieco kaj almozo, al kio, Dio, per tiel ekspresa ordono kaj per tiel granda trolaŭdo, ĝin malfermas.

Kaj, kvankam edzo volus pri tio ĉi esti avareta, virino, se ŝi estas pri cetero, tiel, kiel ni tie ĉi ŝin priskribas, ŝi ne devas pro tio fermi la inklinton al almozo, kiu estas devigita al ŝia stato, nek malpli konfesprenanto tion ĉi malpermesu al ŝi. Ĉar se edzo ne volas, li estas devigita voli; kaj ŝia edzino, se ŝi ne obeas lin ĉe lia malbona kaprico, ŝi konformiĝas al volo, kiun li devas prave havi; kaj tion farante, ŝi traktas utile kaj profite lian animon kaj lian havon; ĉar unue, ŝi plenumas devon, kiun ambaŭ havas, helpi malriĉulojn; kaj alie, ŝi firmigas kaj pligrandigas liajn bienojn per beno, kiun Dio, kies propono ne povas manki, promesis al pieco.

Kaj, ĉar multaj, neniam bone fidis al tiu ĉi propono, tial multaj homoj estas krudaj kaj malfeliĉaj. Ĉar se ili konsideradus, ke ili ricevas el Dio, kion ili havas, ili ne timus al Li redoni parton da tio, nek ili dubus, ke tiu, kiu estas liberala, neniam povas esti maldanka; kaj mi

volas diri, per tio ĉi, ke Dio, kiu, nenion ricevinte el ili, liberale ilin faris riĉaj, se ili poste partigus kun Li siajn riĉaĵojn, Li ilin redonos al ili, kun granda gajno.

Tio ĉi, kion mi diris, rilatas al almozoj pli ordinaraj kaj komunaj, kiuj ĉiutage sin prezentas al la okuloj; ĉar ĉe tio, kio estas pligrava kaj aparta, virino ne devas preterpasi edzan leĝon, kaj ĉe ĉio ŝi devas lin obei kaj servi. Kaj mi fidas, ke neniu estos tiel mizera, nek tiel malbona, ke se ŝi estas el tiuj, kiujn mi diras, tiel hejmema, tiel laborema, tiel maldormema kaj tiel ordigita kaj profitema ĉe ĉio, li malpermesos al ŝi, ke ŝi bonfaru al la malriĉuloj. Nek iu estos tiel blinda, ke li timu malriĉecon pro almozo farita de tiu, kiu riĉigas lian domon.

Tiel, bona virino malfermu sian inklinon, kaj siajn brakojn kaj manojn al pieco, kaj ŝi montru, ke ŝia ekspluato elvenas el virto, ne esti avareta je tio, kio laŭ prudento estas ĝusta. Kaj tiel, kiel tiu, kiu kulturigas kampon, el tio, kio li el ĝi rikoltas, donas al Dio unuafruktojn kaj dekonojn, tiel ŝi el siaj laboroj kaj el tiuj de siaj servantinoj dediĉu parton, por vesti Dion per la nuduloj kaj Lin satigi per la malsatuloj, kaj ŝi voku Lin, kvazaŭ por doni al Li parton de siaj gajnoj, kaj malfermu, kiel tie ĉi oni diras, siajn manojn al dolorato, kaj al bezonulo siajn manplatojn.

Sed kvankam Li diras, ke ŝi malfermu sian manon kaj sian domon al malriĉuloj, oni devas multe averti, ke Li ne diras al ŝi, ke ŝi ilin malfermu, ĝenerale al tiuj, kiuj profesias esti malriĉaj. Ĉar vere, unu el la virtoj de bona edzino kaj virino, estas havi grandan honestecon pri personoj, kiujn ŝi aĉceptas en sia konversacio kaj al kiuj ŝi permesas eniron en sian domon; ĉar sub malriĉeca nomo, kaj sin teginte per pieco, foje eniras en domojn kelkaj sulkigitaj kaj blankharaj personoj, kiuj forrabas vivon, kaj makulas honoron, kaj malutilas animon de ĉiuj, kiuj loĝas en ili, kaj ilin malvirtigas,

sen ilia sento, kaj ilin infektas, ŝajninginte ke ili lekas kaj flatas ilin.

Sankta Paŭlo (1), preskaŭ montris per la fingro tiun ĉi klason de personoj, aŭ kelkajn personojn de tia klaso, dirante «*Ili havas, kiel oficon, iri senokupaj de unu al alia domo, kaj ne nur senokupaj, sed ankaŭ babilaj kaj scirolaj, kaj parolantaj, pri tio, kio ne konvenas.*»

Kaj jen, tio okazas, ke tiaj personoj, ordinare, nur domeneras por malbonigi ĉion bonan kion ili vidas, kaj kiam malpli malbonon ili faras, ili ĉiam faras tiun ĉi malutilon, kiu estas elforporti mensogojn, kaj malpacigojn, kaj alforporti ilin, pri tio, kion ili vidis, aŭ ŝajnas al ili, ke ili vidis, en domo kien ili eniras, per kio, ili maltrankviligas tiujn, kiuj aŭdas ilin kaj konfuzas iliajn korojn; de kio, multfoje naskiĝas malafableco ĉe gentoj, baroj kaj geamikoj, kaj materialo por malplaĉoj kaj malkonsentoj, kaj foje okazas mortigaj malpacoj.

Ĉe bone ordigitaj respublikoj, tiuj, kiuj antikve estis ordigis per leĝoj, nenion ili pli malpermesis, ol komunikiĝo kun la fremduloj kaj je malsamaj moroj. Tiel Mois'o, aŭ, por pli bone diri, Dio per Mois'o, al la elektita gento avizas pri tio, ĉe mil lokoj, per trolaŭdo (2). Ĉar tio, kion oni ne vidas, oni ne deziras; ĉar, kiel diras greka versajeto: «*el vido naskiĝas amo* (3).»

Kaj, kontraŭe, tio, kion oni vidas kaj oni traktas, ju pli malbona ĝi estas, des pli, pro nia malforteco, ĝi kuniĝas al ni.

Kaj tio, kio okazas ĉe ĉia respubliko, ankaŭ tie, samkaŭze okazas, ĉe sola domo. Kaj se tiuj, kiuj en ĝin eniras estas de malsamaj moroj, ol tiuj, kiujn en ĝi oni uzas, unuj per ekzemplo kaj aliaj per vortoj, aliformigas la bonajn ordigitajn intencojn, kaj, iom post iom, ilin

(1) I. ad Timoth., ĉap. V.<sup>a</sup>, ver. 13.<sup>a</sup>

(2) Levit., ĉap. XXII.<sup>a</sup>, ver. 25.<sup>a</sup>.—Numeror., ĉap. XVIII.<sup>a</sup>, ver. 4. l. Esd., ĉap. X.<sup>a</sup>, ver. 11.<sup>a</sup>

(3) Diogenian, apud. Erasmun, chil I. Adas, cent. 2, num. 79.

ellokas el la bono. Kaj alproksimiĝas maljunulinaĉo al orelo, kaj diras al filino kaj al fraŭlino, kial ili forkuras fenestron, aŭ, kial ili tiom amas la puntlaboran kuseneton; ke alia virino, kaj alia, ne tiel faras. Kaj ŝi instruas al ili malbonan ornamon, kaj al ili rakontas malembarason de iu homo; kaj mensogojn, kiujn ŝi vidis aŭ elpensis ŝi metas antaŭ ili, kaj ŝi al ili renversas prudenton; kaj ŝi ekkolorigas per tio ĉi, la simplan kaj naivan bruston; kaj ŝi faras, ke penso imagu tion, kio nur pro pensiteco malpurigas; kaj difektinte la penson, poste oni tentas deziron, kiu, ekbruliĝinte per malbono, tuj malvarmiĝas por bono; kaj tiel, poste, oni komencas malŝati tion bonan, kaj tion ordigitan; kaj, paŝo post paŝo, ili alvenas al tio, tute forlasi ĝin, laste.

Pro kio, pri Eŭripd'o (1), bone diras, tiu kiu diras:

«Neniam, tute neniam, ĉar mi ne kontentigas min, tion dirante nur unu fojon, prudenta edzo toleros eniron en sian domon, al kiuj ajn virinoj por konversacii kun sia edzino, ĉar ĉiam ili faras multajn malbonojn. Unuj, pro sia intereso, penas malvirtigi liajn edzinojn pri edziĝa fido; aliaj, ĉar ili kulpiĝis, ŝatas havi kunulinojn en iliaj kulpoj; aliaj, pro sia malmulta scio kaj plena malprudento. Do, kontraŭ tiuj ĉi virinoj, kaj similaj al tiuj ĉi, konvenas al edzo tre bone provizi je baroj kaj rigliloj siajn domajn pordojn. Ĉar neniam tiuj ĉi strangaj eniroj en domon, metas en ĝin ion puran, sed ĉiam ili faras diversajn malbonaĵojn.»

Sed ni jam vidu tion, kio sekvas post tio ĉi.

(1) Eŭrip., in *Andromache*.

## XI

Pri bona trakto kaj kvieta karaktero, per kiu devas konduiti sinjorinoj kun siaj helpantinoj kaj servantinoj.

*Sia familio ne timos neĝon, ĉar tuta sia anaro estas vestita per duoblaj vestoj (1).*

La bona trakto kontraŭ ŝia familio kaj al ŝia servantaro, ne estas la malpli granda parto de la virto de tiu ĉi perfekta edzino, kiun ni pentras, nek tio, kio donas malpli laŭdon al tiu, kiu estas mastrino de sia domo; pli bone, tio estas kvazaŭ montraĵo, kie klare oni konas bonan ordigon, per kiu oni mastrumas ĉion ceteran. Kaj, do, Salomon'o estis montrinta al ŝi, per tio, kio estas antaŭ tio ĉi, esti almozdonema por la fremduloj, konvenis, ke li ŝin avertu nun, kaj li faru ŝin kompreni, ke tiu ĉi zorgo kaj pieco estas komencota ĉe ŝiajn; ĉar, kiel diras Sankta Paŭlo (2). «*Tiu, kiu malzorgas provizon, de tiuj, kiujn li havas dome, estas idolano, kaj pli malbona, ol idolano.*»

Kaj kvankam Salomon'o tie ĉi parolas pri vestado, ne nur parolas pri ĝi; sed pro tio, kion li diras, pri tiu ĉi afero, li instruas tion, kio ŝi devas esti ĉe ĉio cetera, kio apartenas al bona stato de ŝia servantaro. Ĉar tiel, kiel sinjoro utiligas ĝian laboron, tiel li devas zorge provizi ĝian bezonon, kaj kompensi tion unuan kaj tion duan, kaj bone mezuri ambaŭ aferojn, por ke nek manku al ili ĉe tio, kion ĝi bezonas, nek ĉe tio, kion ĝi devas fari, li ĝin tro ŝarĝu; laŭ avizas kaj elmontras la saĝo

(1) Prov., ĉap. XXXI.<sup>a</sup>, ver. 22.<sup>a</sup>

(2) I. ad. Timoth., ĉap. V.<sup>a</sup>, ver. 8.<sup>a</sup>

en la XXXI.<sup>a</sup> ĉapitro de la *Predikanto*. Ĉar, la unua estas maljusteco, kaj la dua malsufiĉo, kaj ĉio, krueleco kaj malboneco.

Pekado de gesinjoroj ĉe tio ĉi, kontraŭ siaj geservantoj, ordinare devenas de fiereco, kaj de tio, ke la mastroj ne konas sin mem. Ĉar se ili konsiderus, ke, tiel ili, kiel siaj servantoj estas sammetala, kaj, ke ŝanco, kiu estas blinda, kaj ne la provizita naturo, ilin diferencigas, kaj, ke ili estis naskitaj el samaj elvenoj, kaj, ke ili havos saman finon, kaj, ke ili vojiras vokitaj por samaj bonoj; kaj se ili konsiderus, ke morgaŭ aero povas esti ŝanĝita, kaj al tiuj, kiuj nun servas, ili poste servi, kaj se ne ili, iliaj filoj aŭ iliaj nepoj, kiel ĉiutage okazas, kaj, ke fine, ĉiuj ni, tiel gemastroj, kiel geservantoj, servas saman Sinjoron, Kiu mezuros nin, kiel ni estos mezurantaj; tiel, do, se ili tion ĉi konsiderus, ili apartigus kuraĝon kaj uzus afablecon, kaj traktus geservantojn kiel parencojn, kaj ilin komandus, kiel tiu, kiu ne ĉiam estas komandonta.

Kaj ĉe tio ĉi konvenas, ke virinoj enpenetrigu pli la okulojn, ĉar ili fanfaronas pli facile, kaj estas kelkaj, tiel vantaj, ke preskaŭ ili nekonas sian karnon, kaj ili pensas, ke ilia karno estas karno de anĝeloj, kaj tiu de iliaj servantinoj estas karno de hundoj, kaj ili volas esti amegataj de ili, kaj ne rememori ĉu ili naskiĝis, kaj se ili malfortiĝas pro ilia servado, kaj se ili pasigas sendormajn noktojn, kaj se ili estas tage genue antaŭ ili, ĉio ŝajnas al ili malmulte, kaj nenion, por tio, kion oni suldas al ili, aŭ ili konjektas, ke estas al ili devigo. Ĉe kio, krom tio, ke ili multe ofendas Dion, ili faras sian vivon pli mizeran ol ĝi estas; ĉar ili fariĝas malamindaj al siaj, kio estas grandega mizero; ĉar nenia malamikeco estas bona, kaj tiu de geservantoj, kiuj loĝas interne de la domo de la gemastroj, kaj konas la domajn sekretojn, kaj estas iliaj okuloj, kaj, malgraŭ ilia malpiaĉo, ili estas de ilia vivo okulvidantoj, estas danĝera kaj malbonega malamikeco. Kaj el tie ĉi, ordinare eliras la murmuroj



kaj la malveraj atestoj, kaj plejmulte da fojoj, tiuj veraj, kaj tiu ĉi estas kaŭzo, per kiu, multaj trovas, kiam ili ne pensas pri tio, placojn plenajn je siaj sekretoj.

Kaj, kiel estas danĝera malfeliĉo, aliformigi fidelajn geservantojn, pro nedecaj traktoj, tiel, ilin bone trakti, ne nur estas senriskeco, sed honoro kaj bonnomo. Ĉar sinjoroj devas kompreni, ke iliaj geservantoj estas kvazaŭ parto de ilia korpo, kaj ke ilia hejmo estas kvazaŭ kunmetitaĵo, kie ili estas kapo kaj servantaro estas membroj; kaj, ke samokaze, ke ili ĝin traktas bone, ili traktas bone kaj honore sian personon mem. Kaj tiel, kiel ili honoras sin, per tio, ke en iliaj trajtoj kaj pozo, ne estu, nek malrekta membro, nek figuraĵo malplaĉanta, kaj, kiel ili aldonas al ĉiuj siaj membroj ĉion, kio estas per si beleco, kaj ili penas ilin vesti per deca koloro, tiel ili devas sin glori, ke ĉe tuta ilia anaro rebrilu ilia multa liberaleco kaj boneco.

Tiel, do, la anoj de ilia domo, nek estu en ĝi manke, nek ili eliru el ĝi plendaj.

En tiu ĉi regno mi konis sinjorino, kiu mortiĝis, aŭ, por pli bone diri, kiu vivas en la ĉielo; kaj de la historia Troja'a ĉevalo, ne eliris tiom da kuraĝaj homoj, kiel de ŝia domo virgaj servantinoj kaj aliaj provizitaj kaj honoraj virinoj. Al kiu, ĉar okazis al ŝi forpeli el sia domo, pro unu malordigo, unu sian servantinon, ne tiel bone provizitan kiel la ceterajn, mi aŭdis ŝin diri multafoje, ke ŝi ne povas sin konsoli, kiam ŝi pensas, ke el personoj, kiujn Dio al ŝi donis, tiel ŝi diris, estas elirinta el ŝia domo unu, kun malfeliĉo kaj malmulte da rimedoj.

Kaj mi scias, ke por tiu ĉi bonfaro, ŝi elspezis tre grandajn kvantojn, kaj, ke ŝi farante tiujn ĉi elspezojn kaj aliajn similvirtajn, ne nur konservis kaj subtenis nevendebajn heredaĵojn de siaj gefiloj, kiuj estis sub ŝia zorganteco, kaj venis al ili de multaj praavoj el antikva nobeleco, sed, ke ankaŭ, ŝi ilin pliiĝis kaj

plinobeligis, per novaj kaj riĉaj kunigoj; kaj tiel, ŝi estis benita de ĉiuj.

Honoraj virinoj devas, do, ami tiun ĉi benon, kaj se ili volas esti estimataj kaj amataj, tiu ĉi estas tre certa vojo.

Mi ne volas diri, ke ĉio estu delikateco kaj regalo; ĉar ni bone vidas, ke bonordo postulas iajn fojojn severecon; sed, ĉar ordinare la gemastroj pekas pri tio ĉi, esti malzorgemaj pri bona konduto, kontraŭ tiuj, kiuj ilin servas, tial ni parolas pri tio, kaj ni ne parolas pri tio, kiel per kio, ili devas ilin okupi; ĉar pri tio, ili zorgas. Sekvas.

## XII

La vestoj kaj vestmaniero de perfekta edzino devas esti konforma al tio, kion petas honesteco kaj prudenteco. Oni mallaŭdas uzi ŝmirajojn, kaj oni malaprobas belvestojn kaj ornamojn, ne nur per kialoj prenitaj el naturo mem de la aferoj, sed ankaŭ per diroj kaj sentencoj de la patroj de la Eklezio kaj aŭtoritatoj de la Sankta Skribo.

*Ŝi faris por si litafaron; el holanda tolo kaj el purpuro ŝi vestis sia vesto (1).*

Ĉar Li parolis pri la pieco, kiun ŝuldas bonaj edzinoj al malriĉulo, kaj pri zorgo, kiun ili devas al bona provizo de sia anaro, Li rilatas nun pri traktado kaj bona ornamo de ŝiaj personoj mem.

Kaj ĝis tie ĉi alvenas la Dia indulgo, kaj la dolĉa maniero de Lia rimedo kaj regado, ke Li humiliĝas trakti pri edzinaj vestoj, kaj pri tio, kiel ŝi devas ornamo kaj purigi sian personon, kaj cedante iel al ŝia naturo,

(1) Prov., ĉap. XXXI, ver. 22.<sup>a</sup>

kvankam al Li ne plaĉas eksceson, ankaŭ ne plaĉas al Li negliĝon kaj malbonan purigon, kaj tial Li diras: *Purpuro kaj holanda tolo estas ŝia vesto*. Kio estas diri, ke el tiu ĉi perfekta edzino ankaŭ estas parto ne esti ĉe traktado de sia persono iu negliĝanta kaj flikita, sed kontraŭe, kiel ŝi devas esti gajnonta en la administrado de la bieno, kaj por malriĉuloj pia, kaj por sia anaro ne avareta; tiel same, sian personon, ŝi devas konservi purigitan kaj bone traktitan, ornaminte ĝin honeste, laŭ maniero kiu ŝia stato postulas, kaj sin kondukante konforme al sia kvalito, tiel ĉe tio ordinara, kiel ankaŭ ĉe tio eksterordinara. Ĉar tiu, kiu, per sia bona ordo kaj mastrumado, donas lumon kaj brilon al cetero de sia domo, nenia kialo permesas, ke ŝi estadu ĉifita en si mem.

Sed estas sciinde, kial Salomon'o vestis ŝin per holanda tolo kaj per purpuro, kiuj estas la ŝtofoj el kiuj en la malnova leĝo oni faris la veston de la Pastrestro (1), ĉar, sendube, tio enhavas en si ian grandan misteron.

Mi diras, do, ke Dio volas elmontri, ĉe tio ĉi, al la bonaj virinoj, ke ili ne surmetu sur siajn personojn, sed nur tion, kion oni povas surmeti sur altaron; tio estas, ke ilia plenvesto kaj plenornamo estu sankta, tiel en intenco, laŭ kiu oni ĝin surmetas, kiel en sobereco, laŭ kiu oni ĝin faras.

Kaj Li diras al ili, ke, kiu estas vestonta ilian korpon, tiu ne estu malhonesta penso, sed bona ordo de prudento; kaj, ke el sekreta sengardemo de animo estas naskota ekstera bona vesto, kaj, ke tiun ĉi veston, oni ne devas tranĉi laŭ kapriĉo aŭ laŭ mallaŭdinda kaj monda uzo, sed konforme al tio, kion petas honesteco kaj honto. Tiel estas, ke Dio montras, tie ĉi, sanktan veston, por malaprobi malhonestecon.

Li diras purpuron kaj holanda tolon, sed Li ne diras brodaĵojn, kiujn oni nun uzas, nek altbrodaĵojn, nek

(1) Exod., ĉap. XXVIII, ver. 6.<sup>a</sup>, 7.<sup>a</sup>

oron tiritan laŭ maldikaj fadenoj. Li diras vestojn, sed Li ne diras diamantojn ned rubenojn. Li montras tion, kion oni povas teksti kaj labori en domo, sed ne perlojn, kiuj sin kaŝas en mara profundegajo. Li konsentas vestaĵojn, sed Li ne permesas frizojn, nek levharojn, nek ŝmiraĵojn. Korpo estu vestita, sed kapo ne estu harmalordigita nek frizita, pronogzante ĝian grandan mizeron.

Kaj ĉar ĉe tio ĉi, kaj precipe ĉe vizaĝaj ŝmiraĵoj, estas granda eksceso, eĉ ĉe virinoj, kiuj en cetero estas honestaj; kaj ĉar tiu ĉi estas adekvata loko, bone estos, ke ni ion diru, tie ĉi, pri ili. Kvankam, dirante veron, mi certigas vian Moŝton, ke, kio invitas min trakti tion ĉi, kio estas la eksceso, tio mem timigas min.

Ĉar, kiu ne timos kontraŭstari kontraŭ afero tiel akceptita? Aŭ, kiu havos kuraĝon por kuraĝi konvinki virinojn pri tio, ke ili volu ŝajni tio, kio ili estas? Aŭ, kia prudento kuracos malbonigaĵon de sublimato? Kaj, ne nur estas malfacila tiu ĉi traktado, sed ankaŭ ĝi estas danĝera; ĉar ili tuj malamas tion, kiu, tion ĉi forprenas de ili. Kaj tiel, se mi volas nun tion ĉi forpreni de ili, estos vekti kontraŭ mi eskadronon da malamikinojn. Sed, kio al ili estas grava, se mi ilin malaprobu, dum ili, ja, havas tiom da aliaj, kiuj ilin senkulpigos?

Kaj se ili amas tiujn, kiuj konsentante kun ilia gusto, akceptas ilin naŭzaj kaj malbelaj, tre pli juste estas, ke ili eĉ ne malamu min, sed, ke ili aŭdu min egale kaj atente; ĉar, kiom nun, ĉe tio ĉi, mi volas al ili diri, estos nur ilin instrui por ke ili estu belaj, kio estas tio, kion ili precipe deziras. Ĉar mi ne volas trakti pri peko, kiun kelkaj trovas kaj difinas en la ŝmiraĵo, sed nur mi volas ĝin konigi al ili, pruvante al ili, ke ĝi estas ruza trompanto, kiu al ili donas la malon de tio, kion ĝi al ili promesas, kaj ke, kiel ĉe ludo, kiun faras infanoj, tiel dirante, ke ĝi ilin pentras, ĝi ilin mokas kaj makulas; por ke ĝin koninte tia, kia ĝi estas, ili faru justecon al ĝi, kaj ili ĝin metu, por publika honto, kun ĉiuj ĝiaj

boteletoj ĉirkaŭ ĝia kolo. Ĉar mi ne povas pensi, ke iu virino vivu tiel trompita en tiu ĉi afero, ke kvankam ŝi difinu kiel bona la ŝmiraĵon, eĉ ŝi ne komprenu, ke ĝi estas malpura, kaj, ke ŝi ne lavu siajn manojn, per kiuj ŝi ĝin manuzis, antaŭ ol manĝi. Ĉar ĝiaj materialoj, la plej multo estas naŭzigaj; kaj la miksaĵo de tiel malsamaj aferoj, kiel estas tiuj, kiujn oni kunigas por tiu ĉi falsiĵo, estas patrino de tre malbonaodoro, kion tre bone scias kofretoj, kiuj tenas tiun ĉi trezoron, kaj la vitrobotelojn kaj ĝiajn ceterajn juvelojn. Kaj se ĝi ne estas malpuraĵo, kial kiam alvenis nokto ili ĝin forprenas, kaj ili diligente al si lavas vizaĝon, kaj, se ili sin donis al taga mensogo, ili volas almenaŭ pasigi la nokton puraj? Sed, por kio estas tialoj? Do, kvankam oni tion al ni neus, al tiuj, kiuj tion al ni neus, ni povus montri al iliaj okuloj, iliajn dentojn kaj iliajn dentokarnojn, nigrajn kaj pli malpurajn ol sterkejo, kun la restaĵoj, kiujn en ili postlasis ŝmiraĵo. Kaj se ĝi ilin malpurigas, kiel vere ĝi tion faras, kiel ili povas sin konvinki, ke ĝi beligas ilin? Ĉu pureco ne estas fundamento de beleco, kaj ĝia unua kaj plej granda parto?

Beleco alproksimigas kaj invitas al si, kaj malpureco apartigas kaj forigas.

Do, kiel povas enhaviĝi en unu afero beleco kaj malpureco? Ĉu ne estas propra ago el beleco, saĝi bone kaj ravigi la okulojn? Do, kiaj okuloj estas tiel blindaj aŭ tiel mallertaj pri vido, ke per tiu ĉi ne trairu la surmetitan tolon, kaj, ne komparu tion, kion oni malkovras, kun tio kovrita, kaj vidante kiom malbone ili konsentas inter si mem, ili ne ofendiĝu pro senproporcio? Kaj ne estas necese, ke okuloj trairu tiun vualon; ĉar ĝi per si mem, kiam korpo varmetiĝas, diafaniĝas, kaj oni malkaŝas, tra blankaĵo, ion malhelan kaj verdinegran, kaj duonbluan duonviolkoloran; kaj nuanciĝas la tuta vizaĝo, kaj speciale kavaĵoj de la belegaj okuloj, per diverseco de malbelegaj koloroj;

kaj eĉ foje kuras fanditaj la gutoj, kaj, per siaj riveretoj, plugas vizaĝon.

Sed, se ili diras, ke tio ĉi okazas al tiuj, kiuj ne estas bonaj majstrinoj, mi diras, ke neniu estas tiel bona, ke se ŝi, ja, trompis okulojn, ŝi povu trompi nazojn. Ĉar ŝmiraĵaodoro, se plej multe oni ĝin parfumas, ĝi antaŭiras ilin, publikigante kaj dirante, ke tio, kio rebrilas ne estas oro, kaj, ke ĉio estas naŭzigo kaj trompo; kaj ĝi iras deflankigante, kvazaŭ per mano, la personojn, tuj kiam pasis tio, kion mi ne volas nomi.

Prenu mian konsilon tiuj, kiuj estas por tio ĉi blindulinoj, kaj ili faru maskojn kun bonaj figuroj, kaj al si metu ilin; kaj lako pentru tolon, kaj ne haŭton, kaj ili ĉerpos milon da profitoj. La unua, ĉar plaĉas al ili esti belaj falsitaj, ili almenaŭ restos puraj. La alia, ke ili ne timos, ke ilin sensmirigu, nek suno, nek polvo, nek aero. Kaj la lasta, ke per tiu ĉi artifiko, ili povos kaŝi ne nur brunan koloron, sed ankaŭ la malbonajn trajtojn.

Ĉar certa afero estas, ke beleco ne tiom konsistas el elektita koloro, kiom el tio, ke trajtoj estu, ĉiu per si mem, bone figuritaj, kaj ĉiuj reciproke proporciaj. Kaj kompreneble, ŝmiraĵo, kvankam ĝi estas trompinta pri koloro, ĝi ne povas en figuroj fari reformojn; ĉar ĝi, nek plilarĝigas mallarĝan frunton, nek grandigas malgrandajn okulojn, nek korektas malordigitan buŝon.

Sed oni diras, ke koloro multe valoras. Mi demandas al kiu ĝi valoras? Ĉar tiuj de bonaj figuroj, kvankam ili estus brunaj, ili estas belaj, kaj mi ne scias ĉu pli belaj ol estante blankaj; tiuj de malbonaj, kvankam ili sin aliformigas en neĝon, fine ili restas malbelaj; sed oni diros, ke malpli malbelaj; mi diras, ke pli; ĉar antaŭ la lakado, se ili estis malbelaj, ili staris puraj; sed post ĝi, ili restas malbelaj kaj malpuraj; kio estas la plej malaminda malbeleco el ĉiuj.

Sed multe valoru bona koloro, se vere ĝi estas bona koloro; sed tiu ĉi, nek estas bona koloro, nek preskaŭ

estas koloro, sed kolora trompo, kiun ĉiuj konas, kaj aldonajo, kiu senĉese falas, kaj naŭzajo, kiu ofendas ĉiujn, kaj mokaĵo, kiu promesas unu aferon kaj donas alian, kaj, kiu malbeligas kaj malpurigas.

Kia frenezo estas doni nomon de bono, al tio, kio estas malbono, kaj peni por propra malprofito, kaj serĉi per propra turmento esti malamitaj; kio estas tio, kion ili plej malamas? Kio estas celo de ornamo kaj kuraco de vizaĝo, sed bone ŝajni kaj plaĉi al rigardantoj? Do, kiu estas tiel mankhava, ke li ŝatas tiujn flikojn? Aŭ, kiu estas, kiu ne ilin malaprobas? Kiu estas tiel malprudenta, ke li volas esti trompita, aŭ tiel mallerta, ke, ja, li ne konas tiun ĉi trompon? Aŭ kiu estas tiel senigita je prudento, ke li kredas vizaĝa beleco, tion, kion kompreneble li vidas, ke ne estas de la vizaĝo; tion, kion li vidas, ke estas surmetita, aldonita kaj malpropra?

Mi volus scii el tiuj ĉi almozetantaj belecon, se ili kredus bela, manon havantan ses fingrojn. Ĉu, ili ne ĝin kaŝus al okuloj? Ĉu ili ne farus ian gantelpenson por tegi tiun aldonitan fingron? Do, se ili kredas malbela unu kroman fingron en mano, ĉu, ili povas kredi, ke tri fingroj da graso sur vizaĝo, ĝin beligas?

Ĉiuj aferoj havas naturan takson kaj mezuron, kaj iliaj bonaj aranĝoj kaj ŝajno konsistas en tio, esti ĝustaj pri tio ĉi; kaj, se el tio ĉi, io mankas aŭ supermezuras, tio estas malbeleco kaj mallerteco; el kio, oni konkludas, ke tiuj ĉi pri kiuj ni parolas, aldonante metaĵojn kaj preterpasante tion naturan, se okaze ili estus belaj, ili fariĝas malbelaj per siaj propraj manoj.

Bone kaj saĝe konsilas, rilate, antikvan poeton (1), patro al sia filino, kaj diras al ŝi:

«Ne havu, filino, ŝaton al oraĵoj, nek vi ĉirkaŭu vian kolon per perloj aŭ hiacintoj, per kio, la malmulte saĝaj fanfaronas; nenian bezonon vi havas, pri tiu ĉi vanta ornamo; ankaŭ ne, vi rigardu vin en spegulon por

(1) Naumach, apud Stobaeum serm. LXXIV.<sup>a</sup>

aranĝi vian vizaĝon; nek per diversmanieraj bantoj, vi kunligu viajn harojn; nek vi alkoholpentru nigre viajn okulojn; nek vi kolorigu viajn vangojn; ĉar naturo ne estis malsufiĉa por virinoj, nek donis al ili korpon malpli belan ol tio, kio al ili decas aŭ konvenas.»

Do, kio ni diros pri la malbono trompi kaj ŝajnigi, al kiu ili kliniĝas, kaj kvazaŭ iamaniere sin provas kaj kutimiĝas per tio ĉi? Kvankam tiu ĉi tialo ne estas tiom por ke virinoj konvinku sin, ke sin ŝmiri estas malbone, kiom por ke edzoj konu, kiom ili estas devigataj ne permesi ŝmiradon de siaj edzinoj. Ĉar ili devas kompreni, ke per tio, edzinoj komencas sin montri al ili aliajn, ol ili estas, kaj kaŝi al ili la veron, kaj, per tio, ili komencas provi iliajn kondiĉojn, kaj ilin kutimigi al trompo, kaj se ili vidas, ke edzoj estas toleremaj pri tio ĉi, ili tiel leviĝos al pligrandaj trompoj.

Bonĉe diras Aristotelo en tiu ĉi sama celo (1), ke *«kiel ĉe vivo kaj moroj, virino devas, pri sia edzo, sin konduki simple kaj sen trompo; tiel, pri sia vizaĝo kaj ĝiaj ornamoj, ŝi devas esti pura kaj sen ŝmirajo.»* Ĉar la bonulino pri nenio devas trompi, tiun kun kiu ŝi vivas, se ŝi volas konservi lian amon, kies fundamento estas bonfarado kaj vero, kaj nenio sin kaŝi reciproke, tiuj, kiuj reciproke sin amas.

Ĉar tiel, kiel ne estas ebla kunmiksiĝo de du odoraj akvoj, dum ili estas ĉiu en sia botelo, tiel dum virino fermas animon per tego de ŝajnigo, kaj per aldonajoj kaj ŝmirajoj kaŝas vizaĝon, inter ŝi kaj ŝia edzo ne povas kunmiksiĝi vera amo. Ĉar se ni supozas, ke edzo, tiel amas ŝin, kompreneble, en tiu ĉi okazo, li ne amas ŝin, sed la pentritan maskon, kiu montriĝas, kaj estas kvazaŭ li amus ĉe komedia reprezentado, tiun, kiu prezentas belan fraŭlinon. Kaj aliparte, ŝi, sin vidante tiamaniere amita, sammotive ne amas lin; kontraŭe ŝi komencas malmulte taksi lin, kaj ĉe ŝia koro ŝi vidas kaj males-

(1) Lib. I.<sup>a</sup> de cura rei familiaris, ĉap. 4.<sup>a</sup>



timas lin, kaj ŝi konas kiom facile estas trompi lin, kaj fine, ŝi trompas kaj ŝarĝas lin.

Kaj, tio ĉi estas tre konsiderinda, kaj pli, tio, kio postsekvas; kio estas, malutilo de konscienco kaj ofendo al Dio. Ĉar, kvankam mi promesis ne pritrakti ĝin, fine konscienco devigas min malplenumi tion, kion mi esprimis.

Kaj neniu diru al virinoj, nek ili tiel konvinku sin, ke, aŭ tio ne estas peko, aŭ estas tre malgranda peko, ĉar ĝi estas kontraŭe; ĉar, ĝi estas grava peko, pro si mem, kaj krom tio ĉi, ĝi kuniras kun aliaj multaj pektoj; unuj, kiuj estas naskitaj el ĝi, kaj aliaj, el kie ĝi estas naskita.

Ĉar apartigante ofendon, kiun ili faras al sia korpo, kiu ne estas ilia, sed de la Sankta Spirito, kiu ĝin sanktigis por si, en bapto, kaj, kiu sammotive devas esti traktita, kiel sankta templo per honoro kaj respekto; tiel, do, kvankam ni silentu pri tiu ĉi ofendo, kiun ili faras al siaj membroj, turmentante ilin kaj malpurigante ilin diversmaniere, kaj kvankam ni ne diru pri ofendo, kiun ili faras al Tiu, Kiu ilin kreis, farante korektaĵon en Lia ago, kaj kvazaŭ riproĉante, aŭ almenaŭ ne akceptante Lian decidon kaj konsilon (ĉar sciigita afero estas, ke tio, kion Dio faras, aŭ bela aŭ malbela, estas por celo de nia bono kaj sano) tiel, do, kvankam ni silentu pri tio ĉi, kio ilin kulpigas, la fino kiun ili celas, kaj tio, kio ilin movas kaj ilin incitas al tiu ĉi ofico, kvankam ili ĝin oru kaj purigu, oni povas nek purigi ĝin, nek silenti pri ĝi.

Ĉar, mi demandas: kial edzino volas esti pli bela ol tiel, kiel ŝia edzo volas, ke ŝi estu? Kion ŝi pretendas sin ŝmirante malgraŭ li? Kia flameco estas tiu, kiu movas siajn manojn por rebriligi haŭton kvazaŭ jungilaro, kaj meti arke la brovojn? Kien minacas tiu arko? Kaj tiu brilo, kiun blindigas? Ruĝa koloro, kaj blanka, kaj blonda, kaj ora; ĉiu, tiu artilerio, kion ĝi petas? Kion ĝi deziras? Kion ĝi laŭtvokas?

Ne demandas senkaŭze la komuna kanteto, nek estas pli kastila ol vera «*Por kio sin ŝmiras virino edzinigita?*» Kaj denove ĝi demandas, kaj trifoje ripetas demandante. «*Por kio ŝi sin ŝmiras?*» Ĉar se oni diras veron, la respondo al tiu *por kio*, estas, senmezura memamo, nesatigebla apetito de vanta supero, malbela avideco, malhonesteco enradikita en la koro, adulto, prostituado; krimo, kiu neniam ĉesas.

Kion, vi pensas, virinoj, ke estas, vin ŝmiri? Konduki pentritan, ĉe via vizaĝo, vian malbelan deziron. Sed ne ĉiuj sin ŝmirantaj deziras malbonon. Ĝentileco estas tion kredi. Sed, se per vizaĝohaŭto de la ŝmiraĵo vi ne malkovras vian malbonan deziron, almenaŭ vi incitas la malpropran. Tiel, do, per tiuj malpuraj aldonaĵoj, aŭ vi publikigas vian malpuran animon, aŭ vi malpurigas la animon, al tiuj, kiuj vin rigardas. Kaj ĉio estas ofendo al Dio.

Kvankam mi ne scias, kiaj okuloj vin rigardas, kiuj, se ili bone vin rigardas, ne vin malamam. Ho naŭzigo! ho maladzo! ho malhonesteco!

Sed—«kiel kolerigita!»—diros, kelkaj virinoj. Mi ne estas kolerigita, sed vera. Kaj se tiaj estas patroj, el kiuj ĉi malsaĝaĵo naskiĝas, kiaj estos fruktoj, kiuj de ĝi devenas, sed malplaĉoj, kaj senĉesa milito, kaj mortaj suspektoj, kaj laĉoj el homaĉoj, kaj danĝeroj, kaj faloj, kaj skandaloj, kaj morto, kaj mizera ruino?

Kaj se ankoraŭ mi ŝajnas al vi tre kolerigita, vi, kiuj tion diras, aŭskultu tuj, ne min, sed sanktan Ciprianon, kiu tiel diras (1):

«En tiu ĉi loko, timo kiun mi ŝuldas al Dio, kaj bonfarada amo, kiu kunigas min al ĉiuj, devigas min, ke mi avizu, ne nur al virgulinoj kaj al vidvinoj, sed ankaŭ al edzinoj, kaj universale al ĉiuj virinoj, ke neniel konvenas, nek estas permesite, ŝanĝi la Dian faron, kaj Lian fasonon, aldonante al ĝi, aŭ ruĝan koloron, aŭ nigregan

(1) Lib. De disciplina, etc. habitu Virginium.

alkoholon, aŭ koloritan ŝmirajon, aŭ kiun ajn miksaĵon, kiu ŝanĝas aŭ malĉastigas la naturajn figurojn.

»Dio diras (1): «Ni faru homon laŭ nia bildo kaj simile al ni», kaj ĉu estas iu virino kiu kuraĝas ŝanĝi por alia figuro, tion, kion Dio faris? Ili metas siajn manojn en Dion mem, kiam tion, kion Li agis, ili penas reformi kaj alifiguri. Kvazaŭ ili ne sciis, ke estas faro de Dio, ĉio, kio estas naskita, kaj de la demono, ĉio, kies naturajon oni aliigas.

»Se ia grava pentristo farus portreton per koloroj, kiuj trafus la veron, la trajtojn, kaj vizaĝon de iu, kun la tuta cetera sintenado de ĝia korpo, kaj jam finita kaj perfektigita la portreto, alia volus meti en ĝin siajn manojn, fanfaronante esti pli majstra, por reformi tion, kio jam estis farmita kaj pentrita; ĉu vi opinias, ke la unua pentristo havus ĝustan kaj gravan kaŭzon por indigni? Do, ĉu vi imagas ne esti punita pro kuraĝo de tiel malbonaganta frenezo, pro ofendo, kiun vi faras al dia Artefaristo? Ĉar, supozite, ke per kaŝeco de ŝmirajoj vi ne alvenas fariĝu kun la homoj malhonesta kaj adulta, vi estante malvirtigita kaj leĝrompinta, tion, kion Dio faris ĉe vi, vi restas konvinkita pri pli malbona adulto.

»Tio, kion vi pretendas beligi, tio, kion vi penas ornamu, estas kontraŭdiro, kiun vi faras kontraŭ Dia faro, kaj perfido kontraŭ vero. Diras la Apostolo (2), admonante nin:—*Forigu malfreŝan panfermentilon, por ke vi estu nova maso, tiel, kiel vi estas sen panfermentilo, ĉar nia Pasko estas Kristo oferita. Tiel, ni glori feston, ne kun malfresa panfermentilo, nek kun panfermentilo el maliceco kaj ruzeco, sed kun pureco de naiveco kaj vereco.*—Ĉu vi konservas tiun ĉi naivecon kaj verecon, kiam vi malpurigas la naivecon per falsaj koloroj, kaj vi ŝanĝas en mensogon la verecon, per ŝmiraj aldonoj?

(1) Genesis, ĉap. I., ver. 26.

(2) I. ad Corintb., ĉap. V.<sup>a</sup>, ver. 7.<sup>a</sup>, 8.<sup>a</sup>

»Via sinjoro diras (1), ke—«*vi ne havas povon por ŝanĝi en blankan aŭ nigran unu el viaj haroj;*» kaj vi pretendas esti pli pova, preterirante per maltima pretendo kaj sakrilegia malestimo, tion, kion via Sinjoro estas dirinta. Vi ruĝigas viajn harojn, kaj kun malbona antaŭsigno pri tio, kio estas al vi venonta, vi komencas ilin doni similan koloron ol fajra; kaj vi pekas per grava malbono en via kapo, tio estas, ĉe ĉefa loko de via korpo, kaj kiel pri sinjoro estas skribita (2), ke—«*Lia kapo kaj liaj haroj estis blankaj, kiel neĝo,*»—vi malbenas blankharecon kaj abomenas blankecon, kio estas simila al la Dia kapo.

»Mi petegas vin, virino, kiu tion faras: ĉu vi ne timas je la reviviĝa tago, kiam ĝi alvenos, kaj Artefaristo, Kiu vin kreis, ne vin konu? Kaj, kiam vi alvenos peti al Li, Liajn promesajn kaj premiojn, Li vin forigu, apartigu kaj elpelu? Kaj Li diru al vi per juĝista forto kaj severeco:—Tiu ĉi ago ne estas mia, nek tiu ĉi bildo estas la nia; vi malpurigis vizaĝhaŭton per falsa almeto, kaj vi aliformigis hararon per malhonesta koloro, vi faris militon kaj venkis vian vizaĝon, per mensogo vi malvirtigis ĝin; via figuro ne estas tiu, vi ne povos vidi Dion, ĉar vi ne kunportas okulojn, kiujn Dio faris ĉe vi, sed tiujn, kiujn, infektis demono; vi sekvis ĝin, vi imitis ĉe vi la pentritajn kaj brilantajn okulojn de la serpento; vi prenis demonan figuron kaj vi brulos kune kun ĝi.»

Ĝis tie ĉi, estas vortoj el Sankta Cipriano.

Kaj Sankta Ambrosio (3) parolas ne malpli malafable ol li, kaj tiel diras:

«El tie ĉi naskiĝas tio, kio estas vojo kaj incitilo de malvirtoj, ke virinoj pentras siajn vizaĝojn per malpropraj koloroj, timante malplaĉi homoj; kaj per adulto, kiun

(1) Math., ĉap. V.<sup>a</sup>, ver. 36.<sup>a</sup>

(2) Apocalip., ĉap. I.<sup>a</sup>, ver. 14.<sup>a</sup>

(3) Lib. I. de virginibus, ad marcelinam sororem.

ili faras el sia vizaĝo, ili sin provas por la adulto, kiun ili deziras fari el sia persono.

»Sed, kia, frenezo tiel granda estas tiu ĉi, elpeli naturan vizaĝon kaj serĉi pentritan! Kaj dum ili timas esti malaprobataj de siaj edzoj pro malbeleco, ili sin malaprobataj, kiel tiaj, al si mem; ĉar tiu, kiu penas ŝanĝi vizaĝon, kun kiu ŝi naskiĝis, pro tiu sama kaŭzo, ŝi donas sentencon kontraŭ si kaj ĝin malaprobataj pro ĝia malbeleco; kaj dum ŝi penas plaĉi al aliaj, ŝi unue malplaĉas sin mem.

»Diru, virino, kiun plibonan juĝiston de via malbeleco ni povas trovi, ol vi mem, ĉar vi timas esti vidata, tiel, kiel vi estas? Se vi estas bela, kial per ŝmiraĵo vi vin kaŝas? Se vi estas malbela kaj neregula, kial vi mensogas al ni, ke vi estas bela, se vi nek trompas vin, nek de trompo al alia vi ricevas frukton?; ĉar tiu alia, ĉe vi ŝmirita, ne amas vin, sed alian, kaj vi ne volas esti amata kiel alia. Vi, ĉe vi, instruis lin esti adulta, kaj se li metas sian amon ĉe alia, vi ricevas malplezuron kaj koleron. Vi estas malbona majstrino kontraŭ vi mem. Pli tolerebla estas parte esti adultulino, ol travivi ŝmirita; ĉar tie oni malpurigas ĉastecon kaj tie ĉi naturon mem.»

Tiuj ĉi estas vortoj de Sankta Ambrosio. Sed el ĉiuj, Sankta Klemento Aleksandrano estas tiu, kiu skribas pli vaste dirante (1):

«Virinoj, kiuj beligas, tion, kion oni malkovras, kaj malbeligas tion, kio estas sekreta, ne rigardas, ke ili estas, kiel konstruaĵoj, de egiptanoj, kiuj ornamas enirojn de siaj temploj per arbaroj, kaj zonas iliajn portikojn per multaj kolonoj, kaj konstruas iliajn murojn per belegaj ŝtonoj, kaj ilin pentras per elektitaj koloroj, kaj templojn mem ili beligas per arĝento kaj per marmoroj, alportitaj el Etiopio. Kaj sanktaĵoj de la temploj ili kovras per oraj tabuloj; sed en ilia sekretaĵo, se iu tien enirus, kaj kun akceldeziro vidi tion kaŝitan, li serĉus

(1) Lib. III,<sup>a</sup> Pedag., ĉap. 2.<sup>a</sup>

imagon de la Dio, kiu ĉe ili loĝas, kaj se ilia gardito aŭ iu alia pastro, per majesta vido, kaj unue kantante ian himnon, en sia lingvo, kaj ekmalkovrinte iomete vualon, li montrus al ĝi la figuraĵon, ĝi estas grandridinda afero vidi, tion, kion ili adoras; ĉar vi ne trovos tie, iun Dion, kiel vi esperis, sed katon, aŭ krokodilon, aŭ ian serpenton el la tero, aŭ alian similan beston, ne indan je templo, sed indegan je kelo, aŭ je kaŝejo aŭ je koto, ĉar, laŭ diris ilin antikvan poeto.

Estas sovaĝaj bestoj sur purpuro sidantaj,  
La dioj al kiuj servas la ciganoj.

Tiaj, do, ŝajnas al mi, virinoj, kiuj sin vestas per oro, kaj al si aranĝas la frizojn, kaj al si ŝmiras la vangojn, kaj al si pentras la okulojn, kaj al si tinkturas la harojn, kaj, kiuj metas ĉiun sian malbonan arton en tiun ĉi ornamon voluptan kaj troan, kaj ornamas tiun ĉi muron el karno, kaj vere ili faras kiel en Egipto, por altiri al si la malfeliĉajn amantojn. Ĉar se iu levus la vualon de la templo, ne, se li apartigus la kapornamojn, la tinkturon, la brodaĵon, la oron, la ŝmiron, tio estas, la vualon kaj la kovrilon kunmetitan el ĉiuj tiuj ĉi aferoj, por vidi ĉu li trovas interne de tio, kio vere estas bela, li abomenus ilin, sendube, laŭ mi komprenas. Ĉar li ne trovos en ilia sekretloko, kiel loĝanto, laŭ estus justa, la figuraĵon de Dio, kio estas tio valorinda, sed li vidus, ke anstataŭ Li, prostitulino kaj adultulino okupas la sekretaĵon de ŝia animo, kaj li trovos, ke ŝi estas vera sovaĝbesto, simiino per plumbablanko ŝmirita, aŭ trompanta serpento, kiu, glutante tion, kio estas prudenta en la homo, per deziro de vanta plezuro, ili havas animon kiel kelon; kie, miksan- te tutan ilian mortan domaĝigon, kaj elbordigante la venenon de sia trompo kaj eraro, tiu ĉi maklerista dragono interŝanĝas virinon je prostitulinon. Ĉar ŝmiri sin, estas afero de prostitulino kaj ne de bona virino, laŭ klare oni vidas; ĉar tiuj, kiuj zorgas pri tio, zorgas nen-

iam pri siaj domoj. Ilia zorgo estas mallaĉi poŝojn de siaj edzoj, kaj konsumi iliajn bienojn por siaj vanaj kapricoj, kaj por ke multaj atestu, ke ili ŝajnas belaj, sin okupi ĉiutage sidiĝantaj pri ŝmirarto, kun personoj por tio luitaj. Tiel, ili penas bone stufi sian karnon, kiel sengusta kaj malbonvida afero; kaj dum tago, pro ŝmiro, ili suferas en sia domo, pro timo, ke oni vidu, ke ilia floro estas imitita; sed kiam alvenis nokto, kiel aliaj kelloĝantoj, tuj eliras tiu ĉi falsita beleco, al kiu, tiam helpas, por esti iom taksita, la ebrieco kaj la lummanko. Menandro, la poeto, elpelas el sia domo la virinon, kiu sin blondigas, kaj diras:

*Iru for de tiu ĉi domo, ĉar bonulino  
Ne intencas blondigi harojn siajn.*

»Kaj li ne diras, ke ŝi lakis sian vizaĝon, nek ankaŭ, ke ŝi pentris siajn okulojn. Sed la mizerulinoj ne vidas, ke aldoninte ne naturecon, ili detruas belecon, naturecon kaj proprecon, kaj ne vidas, ke sin nuancigante ĉiutage, kaj detirante sian haŭton, kaj sin plastrigante per diversaj miksaĵoj, ili sekigas la korpon kaj konsumas la karnon; kaj pro la troeco de la mordetantaĵoj ili velkigas la propran floron; kaj, tiel, ili fariĝas flavaj kaj emaj al facileco, ke ia malsaneco forportu ilin, ĉar ili havas eluzitan per la ŝmiraĵoj la surpentritan karnon, kaj ili alvenas malhonori Fabrikiston de la homoj, kvazaŭ Li ne disdonis belecon laŭ Li devis; kaj ili estas prave neutilaj por zorgi sian domon, ĉar ili estas, kiel pentritaĵoj, sidantaj nur por esti vidataj, kaj ne faritaj por zorgaj mastrinoj.

»Pro kio, tiu bone estimata virino, pri la komika poeto, diris:

*Kian faron ni povas fari, virinoj, kiu estos preza, aŭ valora, se ni pentradante nin, kaj ornaminte nin, per floroj ĉiutage, ni forigas el ni mem, la bildon de kuraĝaj virinoj: kaj ni nur taŭgas kiel domaj meblaĉoj, kaj embaraso por la edzoj, kaj insultego al niaj filoj? Kaj*

tiel Antiphanes'o, ankaŭ komedia verkisto (1), mokas tiun ĉi virinan malordigon, metante la decajn vortoj al tio, kion ĝenerale ili ĉiuj faras, kaj diras:

*Ŝi alvenas, pasas, revenas, ne trapasas, venas, haltas, sin purigas, dismovas, sin repurigas, sin kombas, sin skuas, sin frotas, sin lavas, sin spegulmontras, sin odorŝprucigas; kaj fine, se io ne ebla, ŝi sin dronigas kaj mortigas.*

»Indaj, ne je unu, sed je ducentmil mortoj estas tiuj, kiuj sin kolorigas per krokodila sterko, kaj sin ŝmiras per la ŝaumo de la malhaladzeco, kaj, kiuj por la brovoj faras bistron, kaj plumboblankajon por laki la vangojn. Do, tiuj, kiuj tiel malplaĉas al la idolanoj poetoj, kiel la veneco ne for pelos kaj kulpigos ilin?

»Do, Aleĥi, alia komikisto, kion li diras, pri ili, riproĉante ilin? Mi, ja, skribos tion, kion li diris, penante hontigi, per la kuriozeco de siaj kialoj, ilian ĉiaman senhontecon, kaj, ke ne povis alveni tiom malproksime al kondirado; kaj vere, ke mi hontiĝus se mi povus ilin kondi per ia bona kialo, pro tio, ke komedio, tiel kondamnis ilin.

»Do, li diras: krom tio ĉi, ili neniigas siajn edzojn, ĉi unua kaj precipa zorgo estas ion eltiri el ili kaj plumiĝi la malgajajn monbezonojn; tiu ĉi estas ŝia pro, kaj kompare kun ĝi, ĉiuj ceteraj estas flankaj.

»Ĉu, iu el ili estas malgrandeta? Ŝi remburas siajn ŝuojn per korko: Ĉu alia estas altkreska? Ŝi uzas simplan alplandon kaj iras kun kapo metita en ŝultrojn, kaj ŝi ŝtelas tion ĉi al alteco: Ĉu mankas al ŝi karno? Ŝi sin remburas tiamaniere, ke ĉiu diras, ke nenio estas por peti: Ĉu kreskas ŝia ventro? Ŝi ĝin malvastigas per zonoj, kvazaŭ ŝi kunplektus hararon; je kio, ŝi iras sendekliniĝa kaj maldika: Ĉu ŝi estas maldikventra? Kvazaŭ per stangoj ŝi antaŭigas la veston: Ĉu ŝi estas fajro ruĝbrova? Ŝi la brovojn kovras per bistro: Ĉu eble ŝi estas bruna?

(1) In Malthaca.



Plumboblanko funkciadas eksterordinare: Ĉu ŝi estas troe blanka? Ŝi sin frotas per kamentuba supraĵo: Ĉu ŝi havas ion, kio estas bela? Ŝi ĉiam tion portas malkovritan. Ĉar se dentoj estas bonaj, nepre estas, ke ŝi ridadas. Kaj por ke ĉiu vidu, ke ŝi havas gracion buŝon, kvankam ŝi ne estas gaja, la tutan sanktan tagon ŝi ridas, kaj ĉiam ŝi tenas inter dentoj iun mirtan maldikan vergeton, por ke, vole ne vole, buŝo estu ĉiutempe malfermita.

»Tion ĉi mi estas citinta el la nereligiaj verkoj, kiel riparo kontraŭ tiu ĉi malbona artifiko kaj troa deziro pri ŝmirado, ĉar Dio penas pri nia sano per ĉiuj eblaj vojoj; sed poste mi insistos per la sanktaj tekstoj, ĉar publika malbonulo kompreneble sin apartigas el tio je kio li pekas, se li estas riproĉita pro honto kiun li suferas.

»Ĉar tiel, kiel bandaĝitaj okuloj, aŭ mano envolvita en plastroj, al tiu, kiu tion vidas, ĝi estas malsana monstro, tiel malpropra koloro kaj eksteraj ŝmiroj komprenigas, ke animo interne estas malsana.

»Admonas nia dia Guvernisto kaj Majstro, ke ni ne alvenu al malpropra rivero, figurante per la malpropra rivero, virinon malsobran kaj malhonestan, kiu estas por ĉiuj, kaj kiu, por ravo je ĉiuj, publikiĝas per voluptemaj sintenoj. *Detenu vin, li diras (1), de malpropra akvo; kaj el malpropra fonto, vi ne trinku;* admonante nin, ke ni forkuru el la fluo de tia ravo, se ni volas longe vivi; ĉar tion fari, aldonas jarojn al vivo.

»Grandaj malvirtoj estas tiuj, pri manĝado kaj drinkado, sed ne tiel grandaj, en multa parto, kiel troa ŝato al ornamo kaj ŝmiro. Por kontentigi guston, sufiĉas plena manĝtablo kaj sufiĉega taso; sed al la ŝatantinoj de oroj, karmezinaĵoj, kaj multekostaj ŝtonoj, ne sufiĉas, nek la oro, kiu estas sur tero, aŭ en ĝiaj internaĵoj, nek la Tiro'a maro, nek ĉio, kio venas el Etiopio, nek rivero Paktolo, kiu kurigas oron, nek

(1) *Eclesiast.*, ĉap. XXV.<sup>a</sup>, ver. 30.<sup>a</sup>

eĉ se ili fariĝus Midas'o, restus kontentigitaj kelkaj el ili, sed ĉiam malriĉulinoj kaj ĉiam pli dezirantaj, pretaj morti kun la havo. Kaj se riĉeco estas blinda, laŭ vere ĝi estas, tiuj, kiuj en ĝi metis ĉiun sian ŝaton kaj siajn okulojn, kiel ili ne estos blindulinoj? Kaj, tio estas, ĉar kiel ili ne finas sian malbonan avidecon, ili alvenas en senhontan diboĉon; ĉar estas al ili necesa la teatro, kaj la procesio, kaj la multo da vidantoj, kaj vagiri tra la preĝejoj, kaj sin altigi en la stratoj por esti rigardata de ĉiuj; ĉar estas certe, ke ili sin ornamas por plaĉi al la aliaj. Ĉar Dio diras per Hieremias'o (1): *Kvankam vi vin ĉirkaŭu per purpuro, kaj vi vin juvelornamu per oro, kaj pentru viajn okulojn per alkoholo, vanta estas via beleco.*

»Sed, kia grandega malordigo, ke la ĉevalo, kaj la birdo, kaj ĉiuj ceteraj bestoj de la herbo kaj de la paŝtejo, eliras ĉiu beligita per sia propra aranĝornamo; la ĉevalo per kolhararo, la birdo per diversaj pentraĵoj, kaj ĉiuj per sia natura koloro, kaj, ke la virino, kvazaŭ ŝi estus de pli malbona kondiĉo ol bestoj, sin mem kredas tiel grade malbela, ke ŝi bezonas malpropran belecon, aĉetitan aŭ surmetitan?

»Ili estas estimantaj la belecon de la vizaĝo, kaj ne zorgantaj pri la malbelecon de la koro. Ĉar sendube, kiel signifero, en vizaĝo de sklavo, montras, ke li estas forkuranto, tiel elektaj pentraĵoj en vizaĝo, estas signo kaj laŭta publikigaĵo de prostitutino. Ĉar la jupornamoj, kaj la malsamaj hararanĝoj, kaj la elpensajoj por kunplekti la harojn, kaj la gestoj, kiujn ili faras, nenumereblajn, kaj la multekostaj speguloj al kiuj ili sin turnas por ĉasi tiujn, kiuj, kvazaŭ ignoraj infanoj, enmetas okulojn en bonajn figurojn, aferoj estas de *senhontaj* virinoj, kaj tiaj, ke ne trompos sin tiu, kiu pli malbone ilin nomus, aliĝintaj siaj vizaĝoj en maskojn.

»Dio avertas nin, ke ni ne atentu al tio, kio ŝajnas,

(1) Hierem., ĉap. IV.<sup>a</sup>, ver. 30.<sup>a</sup>

sed al tio, kio sin kaŝas (1); ĉar tio, kion oni vidas, estas provizora, kaj tio, kio ne, ĉiama: Kaj ili freneze elpensas spegulojn, kie, kvazaŭ tio estu laŭdinda afero, oni vidu artefaritan figuron, al kiu trompo estus pli bone tego kaj vualo. Kaj, kiel rakontas la fablo, al Narciso ne estis profite esti rigardinta sian vizaĝon.

»Kaj se Moysen'o (2) malpermesas, ke homoj faru ian bildon, konkure kun Dio pri arto; kiel estos permesite al virinoj, ĉe siaj vizaĝoj mem, formi novajn gestojn eksiginte la faritan?

»Ŝajnite al profeto Samuelo, kiam Dio sendis lin por sanktoleĵi reĝen unu el la filoj de Josefo, ke la plej aĝa el ili, estas bela kaj lerta, kaj volinte lin sanktoleĵi, Dio diris al li: *Vi ne rigardu lian vizaĝon, nek vi atentu bonan sintenadon de tiu ĉi homo, ĉar mi malŝatas lin; ĉar homo rigardas okulojn, kaj Dio zorgas pri la koro* (3). Kaj, tiel, profeto ne sanktoleĵis tiun belkorpan, sed sanktigis tiun belaniman. Do, se korpbelecon, eĉ tiu, kiu estas natura, Dio takŝas tiel multe malpli ol animbelecon, kion juĝos pri malpropra kaj ŝajnigita beleco, tiu, kiu ĉion falsan forigas kaj malamas? *Je fido ni vojiras kaj ne je tio, kio estas evidenta al la vido* (4).

»Klarevidente montris al ni, Sinjoro, per Abraham'o, ke tiu, kiu lin sekvas, devos malŝati parencaron, teron, havon, kaj riĉaĵojn, kaj videblajn bonoj (5). Li faris lin pilgrimanto, kaj tuj kiam li malŝatis sian naturon kaj la bonon kiun li havis, Li nomis lin Lia amiko. Kaj estis Abraham'o tre nobla terhavanto kaj sufiĉega pri riĉeco; ĉar, kiel oni legas (6), kiam li venkis reĝojn, kiuj kaptis Loth'on, nur el sia domo li armis tricent-dek-ok personojn.

(1) II.<sup>a</sup> ad. Corinth., ĉap. IV.<sup>a</sup>, ver. 2.<sup>a</sup>

(2) Exod., ĉap. XX.<sup>a</sup>, ver. 4.<sup>a</sup>—Deuteron., ĉap. V.<sup>a</sup>, ver. 8.<sup>a</sup>

(3) Lib. I.<sup>a</sup> Regum., ĉap. XVI.<sup>a</sup>, ver. 7.<sup>a</sup>

(4) II.<sup>a</sup> ad. Corinth., ĉap. V.<sup>a</sup>, ver. 7.<sup>a</sup>

(5) Genes., ĉap. XIV.<sup>a</sup>, ver. 14.<sup>a</sup>

(6) Genes., ĉap. XIV.<sup>a</sup>, ver. 14.<sup>a</sup>

»Nur estas Ester'o (1) tiu, kiu laŭ ni scias, sin ornamis senkulpe, ĉar ŝi sin beligis mistere, kaj por la reĝo ŝia edzo; plie, tiu, ŝia beleco, estis liverigo de tuta ĉaro da personoj kondamnitaj morti; sekve, kion oni konkludas el ĉio tio, dirita tio estas, ke sin ŝmiri kaj sin beligi, de virinoj faras prostitulinojn, kaj de homoj, kvazaŭ virinojn kaj adultulojn, kiel la tragedia poeto bone ekkomprenigis kiam li diris:

El Frigio venis en Esparta'on tiu, kiu juĝis,  
 Laŭ tion diras la greka rakonto,  
 La diinojn. Belege vestita,  
 Ore brilanta, kaj ĉirkaŭita  
 Per fremda kaj stranga mantelo.  
 Li amis, kaj tiel foriris, kunportante forrabita  
 Tiun, kiu ankaŭ amis lin, en monton Ida'on,  
 Dum Menelao estis fordome.

»Ho, adulta beleco! La fremda aranĝornamo malordigis la tutan Grekujon. La honestecon el Lacedemonia'o malvirtigis la vestmaniero, la belegajoj kaj la vizaĝo. La troa kaj stranga ornamo faris prostitulinon el Jupitera filino. Sed ĉe tiuj, tio ne estis granda mirindaĵo, ĉar ili ne havis majstron, kiu kaptrancus lajajn malvirtajn dezirojn, nek malpli, kiu dirus al ili: *Vi ne faros kromedzajn kuniĝojn, nek deziros fari kromedzajn kuniĝojn*, kio estas diri: Vi ne vojiros al *kromedza kuniĝeco* per la deziro, nek vi ekbruligos ĝian apetiton per la ŝmiro, nek per eksceso de troa aranĝornamo.»

Ĝis tie ĉi, estas vortoj el Sankta Klemento. Kaj Tertuliano instruegita viro kaj epoknajbaro de Apostoloj, diras (2):

«Vi estas devigitaj plaĉi nur al viaj edzoj. Des pli vi al ili plaĉos, ju malpli vi penos ŝajni bone al aliaj. Vi

(1) Esther., ĉap. V.<sup>a</sup>, ver. 1.<sup>a</sup>

(2) Lib. de culto foeminarum.

estu certaj. Neniu estas malbela al sia edzo; kiam li ŝin elektis, tio al li plaĉis, ĉar ŝia figuro aŭ ŝiaj moroj faris ŝin al li aminda. Neniu pensu, ke se ŝi sin ornamas modere, ŝin malamos aŭ ŝin forĵetos ŝia edzo, ĉar ĉiuj edzoj ŝatas ĉastecon.

»Kristana edzo ne ŝatas bonan figuron, ĉar li ne ekscitiĝas per tio, kio idolanoj ekscitiĝas; idolano, nur ĉar afero estas nia, difinas ĝin kiel suspektan, pro tio, ke ĝi juĝas nin malbone. Do, diru al mi: vian belecon por kiu vi ornamas, se nek idolano ĝin kredas, nek kristano ĝin petas? Kial vi penegas plaĉi al suspektemulo aŭ al ne deziremuloj?

»Kaj mi ne diras tion ĉi por vin instigi al tio, ke kelkaj el vi estu malaranĝitaj kaj malafablaj, nek mi konvinkas al vi malpurigon, sed mi diras tion, kion postulas la honesteco, la bonmaniero, la celo, la modereco je kiu vi aranĝos vian korpon.

»Vi ne devas preterpasi tion, kion postulas la simpla ornamo, tion, kio plaĉas al Sinjoro; ĉar nedube ofendas Lin, tiuj, kiuj al si ŝmiraj, tiuj, kiuj makulas, per ruĝaŝmiro, la vangojn, tiuj, kiuj, per fulgalkoholo, pentras siajn okulojn; ĉar sendube al ili malplaĉas tio, kion Dio faras, kaj argumentante en si mem pri manko al la dia ago, korektas Artefariston, kiu faris nin ĉiujn. Ili Lin korektas, ĉar ili reformas, ĉar ili aldonas al Lia faro, ĉar tiujn ĉi aldonajojn ili prenas de Dia kontraŭulo, tio estas, de demono; ĉar, kiu alia estos majstro ŝanĝi korpan figuron, sed tiu, kiu aliformigis je malico la animan imagon? Li estas sendube, kiu elpensis tiun ĉi artifikon, por metante en ni siajn manojn, ilin meti en Dion, iamaniere. Tio, kun kio oni naskiĝas, estas Dia faro: tio, kion oni ŝajnigas kaj *artfaras*, estos demona faro. Do, kia malbono surmeti sur Dian faron, tion, kion elpensas la demono? Niaj geservantoj ne prenas, eĉ prunte, el tiuj, kiuj estas al ni malamikoj; bona soldato ne deziras premiojn el tiu, kiu al lia kapitano estas

kontraŭulo, ĉar estas perfide preni sur sin, malamikon de tiu, kiun oni servadas; kaj, ĉu kristano, ricevante helpon kaj favoron el tiu malbonulo, se mi bone lin nomas per tia nomo, ĉu li estas ankoraŭ de kristo? Pli li estas de tiu, kies instruadojn li lernas. Sed, kiom malpropra estas tio de la kristana lernado; de tio, kion vi vin devigas per la fido! Kiom malinda je la Krista nomo estas, ke uzas ŝajnigitan vizaĝon, tiuj, al kiuj oni ordonis, ke en ĉio ili gardu simplecon; ke mensogas per vizaĝo, tiuj, al kiuj oni malpermesas mensogi per lango; ke deziras tion, kion oni ne al vi donas, tiuj, kiuj devas sin deteni de malpropreco; ke penas bonan ŝajnon, tiuj, kiuj havas honestecon por ofico!

»Kredu min, benitaj; malbone vi gardos tion, kion Dio al vi ordonas, tial, ke vi ne konservas figurojn, tiujn Li al vi starigis. Kaj ĉeestas iuj, kiuj per safrano lanĝas harajn kolorojn. Ili hontas pri sia patrujo, ili plendas, ke ili ne estas naskitaj germaninoj aŭ anglinoj, kaj tiel, ili penas sin senpatrujigi eĉ ĉe la hararo. Malbonan antaŭsignon ili faras al si, kolorigante sian kapon per fajro. Ili sin konvinkas, ke estas al ili bone, tio, kion ili malpurigas. Kaj, certe, la kapoj mem suferas malbonon pro intenseco de la lesivoj. Kaj, kiu ajn akvo, eĉ se ĝi estas pura, kutimmetita sur kapon, detruas karbon, kaj plie, suna flameco per kiu ili sekigas kaj polikolorigas la harojn. Kia beleco povas esti ĉe tia malutilo, aŭ kia bonvido ĉe tiel grandega malpureco? Se kristanino metas safranon en sian kapon, tio estas kiel meti ĝin en idolon, kiu estas en altaro; ĉar, ĉe ĉio, kion oni prezentas al malbonaj spiritoj, ekcepte la necesajn kaj profitajn uzojn, al kiuj Dio ĝin difinis, ĝia uzo povas esti konsiderita kvazaŭ idola kulto.

»Plie diras la Sinjoro (1). «*Kiu el vi povas ŝanĝi nigran hararon, ĉu nigran en blankan, ĉu blankan en nigran?*» Kiu? Tiuj ĉi, kiuj kontraŭdiras Dion. Vidu, ili

(1) Math., ĉap. V.<sup>a</sup>, ver. 36.<sup>a</sup>

diras, anstataŭ ĝin ŝanĝi blankan en nigran, ni ĝin ŝanĝas en blondan, kio estas pli facila ŝanĝo. Krom tio, ke ankaŭ penas ĝin ŝanĝi blankan en nigran, tiuj, kiuj bedaŭras esti fariĝintaj maljunulinoj. Ho, eraro! Ho, frenezeco!, kredi hontema dezirindan aĝon, ne kaŝi deziron ŝteli jarojn, deziri pekan aĝon, rearanĝi kaj ripari okazon malbonfari. Dio vin gardu el tia granda sensencaĵo, vin, kiuj estas filinoj de saĝeco.

»Maljunuleco des pli malkaŝiĝas, ju pli oni ĝin penas kaŝi. Ĉu tiu devas esti, sendube, eternecon, kiun al ni oni promesas, kunporti junulan kapon? Ĉu tiu estas nemalpurigeco, per kiu ni nin vestos en la Dia domo, tiu, kiun donas naiveco? Bone vi rapidas al Sinjoro, bone vi rapidas por eliri el tiu ĉi malbonaganta mondo, vi, kiuj kredas malbela, esti najbarinoj de la mondeliro. Almenaŭ diru al mi: por kio taŭgas al vi, tiu ĉi peno, ornami kapon? Kial vi ne permesas ripozon al viaj haroj, ĉu plektitaj, ĉu malligitaj, ĉu disigitaj, ĉu alte levitaj? Ŝatas unuj ilin malkunigi per plektaĵoj, aliaj ilin forlasas senorde, por ke ili flugu malpezaj kun neniel bona simpleco; aliaj, krom tio ĉi, aldonas kaj kunigas al ili, mi ne scias kiajn monstraĵajn troaĵojn el malpropraj haroj, kelkafoje fasonitaj kvazaŭ ĉapeloj, aŭ kvazaŭ kapingo, aŭ kvazaŭ kovrilo de via kaparkaĵo, kelkafoje ĵetitaj sur dorson, aŭ sur kolpostajon altigitaj. Mirindaĵo estas, kiom vi penas vin ĵeti kontraŭ Dio: kontraŭdiri Liajn disponojn!

»Sentencdirita estas (1), ke «*neniu povas pliigi sian staturon.*» Vi, se ne al staturo, almenaŭ vi aldonis al pezo, metante ankaŭ sur viajn vizaĝojn kaj kolojn, mi ne scias kiajn salivajn kaj miksaĵajn krustojn. Se vi ne hontas pro tiel neregula afero, hontu almenaŭ pro afero tiel malpura. Ne metu, kvazaŭ egalaj, sur via sankta kaj kristana kapo, la senigojn de alia kapo, eble malpura,

(1) Math., ĉap. VI.<sup>a</sup>, ver. 27.<sup>a</sup>

eble kriminala kaj celita al infero. Kontraŭe, eljetu, el via libera kapo, tiun, kvazaŭ sklavan, aldonajon.

»Vane vi laboras, por ŝajni bone hararangitaj; vane vi komisiis, por aranĝo de via hararo, la mastrojn, kiuj plejbone ĝin aranĝas; kvankam Sinjoro ordonis, ke vi ĝin kovru (2). Kaj, mi kredas, ke Li tion ordonis, por ke iu el viaj kapoj neniam estu vidataj. Li volu, ke mi, la plej mizera el ĉiuj, en tiu publika kaj gaja tago de la kristana ĝojo, levu kapon, eĉ metita ĉe viaj piedoj; kaj tiam, mi vidos ĉu vi reviviĝas per plumboblanko, per ruĝaĵo, per safrano, per tiuj kapaj harkronoj. Kaj mi vidos ĉu tiun, kiu alvenos tiel pentrita, anĝeloj altigos sur nubojn al Krista akcepto. Se tiuj ĉi aferoj estas bonaj, se ili estas Diaj, ili ankaŭ tiam venos al korpoj, kaj ili reviviĝos, kaj ĉiu el ili konos sian lokon. Sed nur reviviĝos karno kaj spirito puraj. Do, aferoj, kiuj ne reviviĝos kun spirito nek kun karno, ĉar ili ne estas Diaj, kondamnitaj aferoj estas.

»Vin detenu, do, de tio, kio estas malpermesita. Tiel, Dio vin vidu nun, kiel Li estas vidonta vin tiam.

»Sed vi diros, ke mi, kiel viro, kaj kiel kontraŭseksa, malpermesas tion permesitan al la virinoj, kvazaŭ mi permesus ion el tio ĉi al homoj. Ĉu Dia timo kaj respekto al seriozeco, kiun oni devas havi, ne malpermesas multajn aferojn, ankaŭ al homoj? Ĉar sen ia dubo, tiel al homoj pro virinoj, kiel al virinoj pro rigardado de la homoj, venas, el ilia malvirta naturo, deziro bele ŝajni. Ĉar, ankaŭ nia sekso scias fari siajn mensogojn: ĝi scias tondi barbon, ĝin maldensigi, ordigi la hararon, ĝin beligi, kaj kolorigi la blankharojn; depreni la korpan vilon, tuj kiam ĝi komencas burĝoni, ĝin pentri en iaj lokoj per virinkvazaŭaj ŝmirajoj, kaj, en iaj lokoj, ĝin platigi iamaniere per pudroj; ĝi scias konsiliĝi kun spegulo ĉe kiu ajn okazo, aŭ sin rigardi en ĝi zorge.

»Sed la vero estas, ke la kono, kiun ni jam havas de

(2) I. ad Corinth., ĉap. XI.<sup>a</sup>



Dio, kaj la senigo pro deziri plaĉi, kaj la interrompo, kiun ni promesas de la malvirtaj eksceso, forkuras el tiuj ĉiuj aferoj, kiuj en si mem ne estas fruktodonaj, kaj al honesteco faras gravan malutilon. Ĉar tie, kie Dio estas, tie estas pureco, kaj kune kun ĝi, seriozeco, ĝia helpanto kaj kunulo. Ĉar, kiel ni estas honestaj, se ni ne penas pri tio, kio taŭgas al honesteco, kiel propra ilo, kio estas esti seriozaj? Aŭ, kiel ni konservos seriozecon, majstro de ĉio honesta kaj ĉio ĉasta, se ni ne konservas severecon, tiel ĉe vizaĝo, kiel ĉe ornamo, kiel ĉe ĉio, kion ĉe nia korpo oni vidas?

»Pro kio, ankaŭ ĉe vestado metu regulon diligente, kaj malakceptu ĉe vi, kaj ĉe ĝi, la troajn belvestojn; ĉar, por kio utilas prezenti vizaĝon honeste kaj aranĝitan per simpleco, kiun postulas nia profesio kaj doktrino, kaj la ceteron el la korpo ĉirkaŭitan de tiuj mokajoj de vestoj tranĉitaj, kaj pompaj, kaj bonegaj?

»Kiom estas facile vidi, kiel kune estas tiu pompo kun voluptemo, kaj kiel apartigita de honestaj reguloj; ĉar, ĝi proponas al ĉies apetito la vizaĝan ĉarmon, helpata per la bona ornamo; tiel certe, ke se tio ĉi mankas, tio ne plaĉas kaj restas kvazaŭ malaranĝita kaj perdita. Kaj kontraŭe, kiam vizaĝa beleco mankas, afektita vesto preskaŭ ĝin anstataŭas. Eĉ al aĝoj jam kvietaj kaj enmetitaj en la sobrega haveno, spriteco de afektitaj kaj riĉaj vestoj alieigas ilian trankvilecon kaj malestimindaj deziroj, ilian seriozan kaj severan maturecon; kaj pli pezas vesta ornamaĵo, ol malvarmeco de la jaroj. Tial, benitaj, la unua, vi ne donu eniron en vin al spriteco kaj riĉeco de la vestoj, ĉar ili sendube estas prostitulinaj komercistoj kaj malbonkaŝemuloj; la alia, kiam iu uzu tiajn ornamojn, altrudita al tio de sia familio, aŭ de sia riĉeco, aŭ de indeco de sia stato, ŝi uzu ilin modere, kiel eble plej, laŭ kiu profesas ĉastecon kaj virton, kaj ŝi ne malstreĉu bridojn al la diboĉo, per tialo, ke estas al ŝi trudo; ĉar, kiel ni povos plenumi humilecon, kiun ni

ekzercas, ni, kiuj estas kristanoj, se vi ne ŝirmas, kvazaŭ per tero, uzon de viaj riĉaĵoj kaj belvestoj, kiuj utilas al la fanfaroneco? Ĉar fanfaroneco, kuniras kun bieno.

»Sed vi diros:—Ĉu mi ne estas uzonta miajn aferojn? —Kiu, al vi malpermesas, ke vi ilin uzu? Sed ilin uzu konforme al Apostolo, kiu instruas nin (1), ke ni uzu tion ĉi mondon, kvazaŭ ni ne ĝin uzus. Ĉar, kiel li diras, *ĉio forflugas, kion en ĝi aperas. Tiuj, kiuj aĉetu, li diras, kvazaŭ ili ne estus posedontoj* (2). Kaj tio ĉi, kial? Ĉar li diris unue (3): *La tempo finiĝas.*

»Kaj se Apostolo montras, ke eĉ virinojn oni devas kredi ne posedataj, pro la mallongeco de la vivo, kio okazos al tiuj ĉi, iliaj vantaj juveloj? Ĉu ne estas multaj, kiuj tion faras, tiamaniere, ke ili sin metas en ĉastan vivon pro la gajno de la ĉielo, sin senigante, volonte, je necesita kaj tiel potenca plezurego? Ĉu iuj ne malpermesas al si la Diajn kreataĵojn, kaj sin detenas de la vino, kaj sin ekzilas manĝi viandon, kvankam ili povas tion ĝui sendanĝero nek peno, sed ili faras oferon al Dio, al sia propra malĝojo, pro la sindeteno de la manĝaĵoj? Troe vi jam ĝuis viajn riĉaĵojn kaj bontrovojn, troe al la frukto de viaj dotoj. Ĉu, eble, vi forgesis tion, kion instruas al vi la voĉo de la sano.

»Ni estas tiuj, je kiuj finiĝas la tempo (4). Nin, kiujn ordigitaj de Dio antaŭ la mondo, por eltiri profiton kaj malorigi la tempojn (5), instruas Li mem (6), ke ni punu, kvazaŭ ni dirus, ke ni kastru la tempon. Ni estas la generala cirkumcido de la karno kaj de la Spirito (7), ĉar ni plentranĉas ĉion mondan, de la karno kaj de la korpo. Ĉu Dio, sendube, devis instrui al ni, kiel oni kuirpretigus

(1) I. ad Corinth., ĉap. VII.<sup>a</sup>, ver. 31.<sup>a</sup>

(2) Ibid., ver. 30.<sup>a</sup>

(3) Ibid., ver. 29.<sup>a</sup>

(4) I. ad Corinth., ĉap. X.<sup>a</sup>, ver. 11.<sup>a</sup>

(5) Ad. Ephes., ĉap. I.<sup>a</sup>, ver. 4.<sup>a</sup>

(6) II. ad Corinth., ĉap. VI.<sup>a</sup>, ver. 9.<sup>a</sup>

(7) Ad Philip., ĉap. II.<sup>a</sup>, ver. 3.<sup>a</sup>

la lanojn, ĉu en herba suko, ĉu en oŝtra sango? Ĉu Li forgesis, kiam ĉion Li kreis, ordoni, ke estu naskitaj ŝafinoj ruĝkoloraj aŭ violkoloraj? Ĉu Dio devis elpensi la teksilojn, kie oni teksas kaj tekседesegnas la teksaĵojn, por ke ili teksu kaj tekslaboru la teksaĵojn delikatajn kaj malpezajn, kaj pezajn, nur pri la prezon? Ĉu Dio devis eltiri el tero tiom da orformoj, por lumo kaj ornamo de la multekostaj ŝtonoj? Ĉu Dio instruus trabori orelojn, per malbonaj vundoj, ne respektante la turmenton de Lia kreitaĵo, nek doloron de infaneco, kiu tiam komenciĝas dolori, por ke de tiuj truoj de la korpo, jam lutitaj la vundoj, pendu, mi ne scias, kiaj malbonaj grajnoj? Kiuj, la Partanoj enmetas en la tutan korpon, anstataŭ beleco. Kaj eĉ estas gentoj, kiuj, oron mem, el kiu vi faras honoron kaj gloron, ili uzas por malliberejoj, kiel oni skribas en la libroj de la idolanoj.

»Tiel, do, tiuj ĉi aferoj, pro sia malofteco estas bonaj, kaj ne pro ili mem. La vero estas, ke la malbonaj anĝeloj estis tiuj, kiuj ilin konigis: ili eltrovis la materion, kaj ili mem montris la arton. Kuniĝis kun malofta estaĵo, la delikateco de la artifiko, kaj el tie naskiĝis la prezo, kaj el la prezo la malbona avideco, kiun pri tio havas la virinoj, kiuj malvirtigiĝas pro la multeprezeco kaj multekosteco.

»Kaj, ĉar tiuj ĉi anĝeloj mem, kiuj eltrovis la riĉajn metalojn, mi diras arĝenton kaj oron, kaj kiuj instruis, kiel oni ilin devas ellabori, estis ankaŭ majstroj pri la tinkturoj, per kiuj oni beligas la vizaĝojn kaj oni kolorigas la lanojn, tial ili estis kondamnitaj de Dio, kiel pri Enoch'o oni rakontas.

»Do, kiamaniere ni plaĉos al Dio, se ni gloras nin per la aferoj de tiuj, kiuj vekis kontraŭ si la koleron kaj la punon de Dio?

»Sed, estu Dio tion instruinta aŭ permesinta, neniam Esai'o (1) diris malbone pri la purpuroj, pri la juveletoj;

(1) Ad Philip., ĉap. III.<sup>a</sup>

neniam li malakrigis riĉajn orajn pintojn; sed ne tial, flatante nian guston, kiel faras la idolanoj; ni devas kredi Dion, majstro kaj elpensinto de tiuj ĉi aferoj, sed juĝisto kaj elserĉanto de ilia uzo.

»Kiom pli bone kaj pli singardeme ni iradus, se ni konjektus, ke Dio ĉion provizis, kaj ĉion metis en vivo, por ke estu en ĝi, ia pruvo de la sobreco de tiuj, kiuj sekvas Lin! Tiel, do, meze de la permeso de la uzo, oni vidu pro sperto la sobrulon.

»Ĉu, gesinjoroj, kiuj bone mastrumas siajn domojn, ne forlasas ruze kelkajn aferojn al siaj geservantoj, kaj ilin permesas al ili, por pruvi kiamaniere ili ilin uzas, jen modere, jen bone, ĉar laŭdita tie estas, tiu, kiu suspektas la konsentemon de la mastro?

»Tiel, do, kiel diras la apostolo (1) *ĉio estas permesita, sed ĉio ne edifas*. Tiu, kiu timus pri tio permesita, kiom pli bone li timos tion malpermesitan!

»Diru al mi, kian kaŭzon vi havus por vin prezenti tiel ornamitaj, ĉar vi estas apartigitaj de tio, kion aliaj bezonas? Ĉar vi, nek iras en idoltemplojn, nek eliras al publikaj ludadoj, nek estas al vi la idolanaj festaj tagoj; kiam ĉiam, pro tiuj ĉi kunigoj, kaj por vidi kaj esti vidataj, oni elirigas la belvestojn, aŭ por ke komercu la malhonesteco, aŭ por ke fieriĝu la malhumileco, aŭ por fari la negocon de la malhonesteco, aŭ por progresigi la fierecon.

»Neniu motivo vi havas por eliri el via domo, se ĝi ne estas grava kaj severa, kaj ne postulas modestecon kaj timemon; ĉar aŭ estas vizito al ia malsana idolano, aŭ vidi Meson, aŭ aŭdi la Dian vorton.

»Ĉiu el tiuj ĉi aferoj, estas afero sankta kaj grava, kaj afero, por kiu oni ne bezonas veston kaj ornamon, nek eksterordinaran, nek delikatan, nek diboĉan.

»Kaj, ĉu bezono de la amikeco aŭ bonagoj, inklinigas vin al tio, ke vi vidu la idolanojn, mi demandas: kial vi

(1) I. ad Coriuth., ĉap. X.<sup>a</sup>, ver. 25.<sup>a</sup>

ne iros ornamitaj de tio, kio estas viaj armiloj; pro tio mem, ĉar vi iras al tiuj, kiuj estas malpropraj al via fido; por ke estu diferenco inter la servantinoj de la demono kaj tiuj de Dio? Por ke estu al ili, kiel ekzemplo kaj ili sin edifuu vidante vin. Por ke, kiel diras la apostolo, estu Dio laŭdata ĉe via korpo. Kaj ĝi estas laŭdata per la honesteco kaj per la vesto, kiu al honesteco decas.

»Sed iuj diras: Prefere, ke ili ne blasfemu de Lia nomo en ni, se ili vidas, ke ni deprenas ion, el tio, kion ni antaŭe uzis. Sekve, ni ne deprenu de ni, eĉ la pasintajn malvirtojn.

»Ni estu sammoraj, ĉar ni volas esti samvestaj; kaj tiam, vere, idolanoj ne blasfemos pri Dio.

»Granda blasfemo estas, certe, ke oni diru pri iu, ke ŝi sin vestas malriĉe estante kristanino!

»Ĉu iu timos ŝajni malriĉa, estante pli riĉa, aŭ ŝajni sen pureco estante pura?

»Mi demandas kristanojn: kiel konvenas al ili esti; laŭ gusto de idolanoj, aŭ laŭ tiu de Dio?

»Tio, kion ni devas klopodi, estas ne kaŭzi, ke prave oni blasfemu pri ni.

»Kiom estos pli inde je blasfemo, se tiuj, kiuj estas nomitaj pastrinoj de la honesteco, eliras vestitaj kaj pentritaj, kiel la malhonestaj sin vestas kaj ornamas? aŭ, kio plie faras tiuj mizerulinoj, kiuj sin oferas al publika plezuro kaj al malvirto, kiujn, se antikve, leĝoj apartigis el la nobelaj virtpatrinoj kaj el la vestoj, kiujn la nobelaj virtpatrinoj uzis, jam la malboneco de tiu ĉi jarcento, kiu ĉiam kreskas, ilin egalas, pri tio ĉi, al la honestaj virinoj, tiamaniere, ke oni ne povas ilin distingi sen eraro! Vere estas, ke tiuj, kiuj sin ŝmiras, kiel ili, malmulte sin diferencas de ili. Vere estas, ke la Sanktaj Skriboj diras al ni, ke la vizaĝaj ŝmiroj kuniras kun *voluptema* korpo, kvazaŭ devigita al ĝi kaj kvazaŭ ĝiaj parencoj.

»Tiu potenca urbo, pri kiu oni diras (1), ke ĝi pre-

(1) Apocalip., ĉap. XVII.<sup>a</sup>

zidas sur sep montoj, kaj kiu meritis, ke Dio ĝin nomis prostitulino, kia vesto, ni vidu, respondas al sia nomo? Sur karmezino sidiĝas, sendube, kaj sur purpuro, kaj sur oro, kaj sur multekostaj ŝtonoj, kaj ne povis esti estinta sen pentro, tiu, kiu estas malbenita prostitulino.

»La Thamar'o, ĉar ŝi ornamigis kaj pentrigis, laŭ Judas'a suspekto, ŝi estis difinita kvazaŭ virino, kiu vendas sian korpon (1). Kaj, kiel mantelo kovris ŝian vizaĝon, kaj, kiel ornamo ŝajnigis ŝin postitulino, li kredis ŝin tia. Li ŝin amis, kaj tion sciigis al ŝi, kaj metis lian prudenton en ŝin.

»El kio, ni lernas, ke decas ĉiumaniere bari la vojon, eĉ al tio, kio faras malbonan suspekton pri ni.

»Ĉar, kial la perfektecon de la ĉasta animo estas volonta, esti makulita de malpropra suspekto? Kial, oni esperos el vi, tion de kio vi forkuras kiel de la morto? Kial, mia vesto ne publikigos miajn morojn, por ke pro tio, kion diras la vesto, malĉasteco ne metu vundon en la animon, kaj por ke povu esti difinita kiel honesta, tiu, kiu ne amas esti malhonestaj?

»Sed, eble, iu diros: Mi ne bezonas kontentigi la homojn, nek mi celas esti aprobata de ili: *Dio estas, kiu vidas la koron* (2). Ni, ĉiuj, tion scias; sed ankaŭ ni memoras tion, kio Li mem per sia apostolo skribas: *La homoj vidu, ke vi vivas bone* (3). Kaj por kio, sed pro tio, ke la malbona suspekto ne vin tuŝu, kaj pro tio, ke vi estu bona ekzemplo al malbonaj, kaj ili donu ateston al vi? Aŭ, kio do estas, se tio ĉi ne estas? Lumu viaj bonaj agoj. Aŭ por kio la Sinjoro nomas nin tera lumo (4)? Por kio li komparas nin kun urbo surmetita sur la monton, se ni profundiĝas kaj ni ne volas lumi en mallumo?

(1) Genes., ĉap. XXXVIII.<sup>a</sup>, ver. 14.<sup>a</sup>, 15.<sup>a</sup>, 16.<sup>a</sup>, 17.<sup>a</sup>, 18.<sup>a</sup>

(2) I. Reg., ĉap. XVI.<sup>a</sup>, ver. 7.<sup>a</sup> Psalm. VII.<sup>a</sup>, ver. 10.<sup>a</sup>

(3) Ad Philippens., ĉap. V.<sup>a</sup>, ver. 14.<sup>a</sup>

(4) Math., ĉap. V.<sup>a</sup>, ver. 14.<sup>a</sup>

»Se vi kaŝus sub la *celèmin'o* (1) la kandelon de via virto, nepre estos, ke vi restos malhele, kaj, nepre, ektuŝos kun vi diversaj gentoj.

»La bonekzemplaj agoj, tiuj estas, kiuj nin faras lumajoj de la mondo; ĉar la plena kaj ĝusta bono ne ekdeziras mallumecon; kontraŭe, ĝi ĝojas esti vidata kaj gajas esti montrata.

»Al kristana ĉasteco ne sufiĉas esti ĉasta, sed ankaŭ ŝajni, ke ĝi tia estas; ĉar ĝi devas esti tiel perfekta, ke el animo fluu al vesto, kaj el la sekreto de la konscienco eliru al la supraĵo, por ke oni vidu de ekstere ĝiajn meritojn, kaj ili estu laŭ decas por ĉiame konservi fidon. Ĉar tre konvenas, ke ni forigu molecajn komfortojn, ĉar ilia moleco kaj supermezura troeco malfortigas fidan fortecon, kaj ĝin maldikigas. Ĉar mi ne scias certe, ĉu mano kutimita sin vesti per ganto toleros vundiĝi de ĉena malmoleco, nek mi scias ĉu kruro, kutimita al brodita piedvesto, toleros, ke kaptilo ĝin premu. Mi multe timas, ke kolo embarasita de perlaĵ kaj de smeraldaj bantoj, ne permesu uzon de glavo.

»Pro kio, benitaj, ni provu nin je tio plej malglata, kaj ni ne bedaŭros. Ni forlasu tion, kvietecon kaj gajecon, kaj poste, forlasos nin ilia deziro. Ni estu pretaj por kiu ajn harda okazo, sen tio, ke ni havu aferon, kiun ni timu perdi; ĉar tiuj ĉi aferoj, ligiloj estas, kiuj haltigas nian esperon. Ni forigu terajn festornamojn, se ni deziras la ĉielajn.

»Ne amu oron, kiu estis kaŭzo de la unua peko de Dia popolo (2). Vi estas devigitaj malami tion, kio estis pereco de tiu gento; tio, kion ĝi adoris, sin flankigante de Dio; kaj, ja, de tiam, oro estas fajra brulmeĉo. La tempiojn kaj fruntojn de kristanoj, en ĉiu epoko kaj speciale en la nuna, ne oro, sed fero traboras kaj enajlas. La martirecaj stoloj estas al ni diligentaj kaj pretaj.

(1) Hispana grena mezurkesto, enhavantebla 4 litrojn, 62 centilitrojn.

(2) Exodo., ĉap. XXXII.<sup>a</sup>

Angeloj ilin tenas en manoj, por ilin vesti al ni. Eliru, eliru ornamitaj per la ŝmiraĵoj kaj la belvidaj vestoj de la Apostoloj. Metu al vi la blankon de la naiveco, la ruĝon de la honesteco; alkoholu per honto kaj per modesta kaj silenta spirito viajn okulojn. En oreloj metu kiel orelingojn, la Diajn vortojn. Tuberligu al viaj koloj la Kristan jugon. Submetu viajn kapojn al viaj edzoj, kaj tiel, vi restos tre belaj. Okupu viajn manojn ĉe lano, ennajlu piedojn en vian domon, kaj tiel, ili pli plaĉos, ol se vi ilin ĉirkaŭus per oro. Vi vestu silkon el boneco, holandtolon el Sankteco, purpuron el ĉasteco kaj pureco; ĉar, tiel ornamitaj Sinjoro estos via enamiĝinto.»

Tio ĉi estas el Tertuliano. Sed ne estas necese riveretoj, ĉar ni havas la voĉon el Sankta Spirito, kiu per buŝo de Siaj Apostoloj Sankta Petro kaj Sankta Paŭlo malpermesas tiun ĉi malbonon, klare kaj malkaŝe.

Sankta Petro diras (1):

«La virinoj estu submetitaj al siaj edzoj, kaj ne uzu ekstere malkaŝitajn la harojn, nek ili ĉirkaŭu sin per oro, nek ili sin ornamu per ornamo de prezaj vestaroj, sed ilia ornamo estu interna en la homo, kiu estas kaŝita en la koro. La energio kaj la spirito kvieta kaj modesta, kio estas preza antaŭ Diaj okuloj: ĉar tiamaniere aliepoke sin ornamis tiuj sanktaj virinoj.»

Kaj Sankta Paŭlo skribas simile (2):

«La virinoj sin vestu konvene, kaj ilia ornamo estu modesta kaj sobra, sen frizitaj haroj, kaj sen oro kaj perloj, kaj sen prezaj vestoj; sed tiel, kiel decas al virinoj, kiuj ekzercas virton kaj bonajn farojn.»

Tiu ĉi, do, estu ilia vera ornamo, kaj pri tio, kio rilatas vizaĝon, ili faru, kiel faris ia sinjorino el tiu ĉi regno. Ili etendu siajn manojn, kaj en ili ricevu akvon elĉerpitan el kruĉego, kiun per kruĉo servantino ĵetas,

(1) I. Pet., ĉap. III.<sup>a</sup>, ver. 1.<sup>a</sup>, 3.<sup>a</sup>, 4.<sup>a</sup>, 5.<sup>a</sup>

(2) I. ad Timoth., ĉap. II.<sup>a</sup>, ver. 9.<sup>a</sup>



kaj ili alportu ĝin al vizaĝo, kaj ili prenu parton el ĝi en sian buŝon, kaj lavu dentokarnojn, kaj ili turnu siajn fingrojn al okuloj kaj al oreloj, kaj ankaŭ post oreloj, kaj ĝis kiam la tuta vizaĝo estu purigita, ili ne ĉesu; kaj poste, forlasante akvon, ili sin viŝu per malglata tuko, kaj tiel, ili restu pli belaj ol la suno. Li aldonas:

## XIII

**Bona virino devas esti feliĉo, gloro, feliĉa sorto kaj beno de sia edzo.**

*Sia edzo estos montrata ĉe la pordoj, kiam li sidiĝos inter vilaĝaj regantoj (1).*

Ĉe la urbaj pordoj estis antikve la placoj, kaj en la placoj estis tribunaloj, kaj sidejoj de juĝistoj kaj de tiuj, kiuj kunvenis por kunkonsiliĝi pri bona regado kaj ordigo de la vilaĝo. Li diras, do, ke ĉe placoj kaj publikaj lokoj, kaj kie ajn kolektiĝu ĉefaj homoj, homo kies virino estus, kiel estas tiu, kiun tie ĉi oni diras, estos per ŝi konata, kaj montrata, kaj estimata de ĉiuj.

Kaj Salomon'o diras tion ĉi, aŭ per Salomon'o la Sankta Spirito, ne nur por montri kiom valoras virto de bonulino, ĉar ŝi honoras sin kaj nobeligas sian edzon, sed por ŝin instrui pri tiu ĉi virto de la perfekta virino, pri kiu ni paroladas, kio estas ŝia plejo, kaj la streko ĝis kie ŝi devas alveni; kio estas, esti krono, kaj lumo, kaj beno, kaj grandeco de ŝia edzo; ĉar tiel estas, ke ĉiuj konas, kaj respektas, kaj riverencas, kaj kredas feliĉa kaj feliĉega, tiun, al kiu respondis tiu ĉi bona sorto: unue ĉar ĝi estas difinita al li; ĉar ne estas juvelo nek posedaĵo tiel multekosta nek tiel enviata kiel bona

(1) Prov., XXXI,<sup>a</sup>, ver. 23.<sup>a</sup>

virino: kaj due, ĉar li meritis, ke ĝi al li estu difinita; ĉar, tiel, kiel tiu ĉi bono estas multekosta kaj maloŝta, kaj dono propre donita de Dio, tiel nur ricevas ĝin de Dio tiuj, kiuj Lin timante kaj Lin servante, tion meritas per speciala virto.

Tiel, tion certigas Dio mem en la *Predikanto* (1): «*Bona sorto estas bona virino, kaj estas parto de bona premio de tiuj kiuj servas Dion, kaj ŝi estos donata al homo pro liaj bonaj agoj.*»

Tiel, do, tiu, kiu havas bonan virinon, estas estimata kiel feliĉa, ĉar li havas ŝin, kaj kiel virta, ĉar li estas meritinta ŝin.

El kio oni komprenas, ke la manko de tiu ĉi bono, ĉe multaj estas pro ilia kulpo. Ĉar vere, homo malvirta kaj diboĉa, kaj de malbonklinita kaj nekomprenebla naturo, kiu ludas sian havon, kaj estas leono ĉe sia domo, kaj sekvas tutlibere la malhonestecon, li ne atendu, nek volu havi bonan virinon; ĉar nek li tion meritas, nek Dio amas ŝin tiel malbone, ke Li volas ŝin kunigi kun akompano tiel malbona; kaj tial, ke li mem, pro sia malbona ekzemplo kaj malaranĝita vivo, malvirtigas kaj malpurigas ŝin. Sed revenas Salomon'o al hejmemeco de la virino, kaj diras:

---

(1) Prov., ĉap. XXVI.<sup>a</sup>, ver. 3.<sup>a</sup>

## XIV

**Lerteco kaj zorgo ĉe bona edzino devas trafi, ne nur tion, kio sufiĉas al ŝia domo, sed ankaŭ tion, kio malmankas.**

*Tolon ŝi teksis kaj vendis; garniturojn ŝi donis al kanaanano (1).*

Kanaanano li nomas la komercaĵiston kaj tiun, kiun ni nomas kolportisto, ĉar tiuj el tiu lando ordinare traktis pri tio ĉi; kvazaŭ ni dirus nun al portugalo.

Kaj li ĉiam aldonadas unu virton al alia virto, kaj enportas, iom post iom, al ĝia pleja perfekteco, tiun ĉi pentraĵon, kiun li faras, kaj li volas, ke lerteco kaj zorgo de la bona virino alvenu, ne nur al tio, kio sufiĉas en ŝia domo, sed ankaŭ al tio, kio malmankas, kaj, ke ŝi vendu la malmankojn, kaj ke ŝi ilin ŝanĝu en riĉecon sian, kaj en malpropran ornamon kaj provizon. Kaj jam sufiĉu tio, kion pri tio ni supre diris.

## XV

**Pri modereco kaj mezeco kiun devas plenumi perfekta virino en sia kondiĉo kaj trakto.**

*Fortikeco kaj bona gracio ŝia vesto; ŝi ridos ĝis la lasta tago (2).*

Kvankam tiu ĉi bona edzino devas taŭgi por multo, kio estas tio, kio tie ĉi Salomon'o nomas fortikecon, ne pro tio estas al ŝi permesite esti malafabla laŭ kondiĉo,

(1) Prov., ĉap. XXXI.<sup>a</sup>, ver. 24.<sup>a</sup>

(2) Prov., ĉap. XXXI.<sup>a</sup>, ver. 26.<sup>a</sup>

kaj malagrabla ĉe sia bonmaniero kaj trakto; sed kiel vesto zonas kaj ĉirkaŭas la tutan korpon, tiel ŝi, tute kaj ĉie, devas iri ĉirkaŭita kaj vestita per unu gracia kuraĝo kaj per unu kuraĝa gracio. Mi volas diri, ke nek diligenteco, nek maldormo, nek ĉeesto al la domaj aferoj, faru ŝin malafabla kaj timinda, nek malpli la bona gracio kaj la kvieta parolmaniero kaj la mieno, devas esti volupta nek malhonesta. Sed, ke miksanĉe unu la alian, ŝi konservu la mezon de la du aferoj, kaj faru el ambaŭ unu agrablan kaj bonegan miksaĵon.

Kaj, ŝi ne devas konservi, por unu tago aŭ por mallonga intertempo, tiun ĉi farmanieron, sed por la tuta vivo, ĝis ĝia lasta tago. Kio estas propra de ĉiuj aferoj, kiuj, aŭ estas virto, aŭ havas radikojn en la virto; esti persistaj, kaj preskaŭ ĉiamaj, kaj ĉe tio, ili sin diferencas de tiuj ne tiaj; ke tiuj ĉi, kiel ili naskiĝas el kaprico, daŭras por kaprico; sed tiuj, kiel ili sin fondas en firma kaŭzo, ili restas por multe da tempo. Kaj tiuj, kiuj vidis iun virinon el tiuj, kiuj alproksimiĝas al tiu ĉi, kiun tie ĉi oni diras, povos esti sentintaj unu kaj alian. La unua, ke ĉiutempe kaj ĉiuokaze oni trovas en ŝi dolĉan kaj agrablan akcepton; la dua, ke tiu ĉi, ŝia spriteco kaj dolĉeco, ne estas spriteco kiu senligigas la koron de tiu, kiu ŝin vidas, nek ĝin moligas, kontraŭe, ĝi metas en ĝin ordigon kaj estas al ĝi kiel virta leĝo, kaj tiel ĝi ĝin ravas kaj klinigas, ke ĝi kune ĝin purigas kaj perfektigas; kaj ĝi foriginte el ĝi la malgajaĵojn, ankaŭ lavas malhonestaĵojn; kaj ĝi estas spriteco, kiu eĉ sin mem naskas en la rigardantojn.

Kaj ĝia fortiko, kaj el kio ĝi precipe konsistas, tion elmontras pli plene kio sekvas.

## XVI

**Kiom estas grave, ke virinoj ne multe parolu, kaj, ke ili estu afablaj kaj dolĉekondiĉaj.**

*Sian buŝon ŝi malfermis je saĝeco, kaj pieca leĝo je ŝia lango (1).*

Du aferoj faras kaj kunmetas tiun ĉi bonon pri kiu ni paroladas, diskreta prudento kaj dolĉa parolmaniero. La unuan, li nomas saĝeco, kaj la duan pieco, aŭ por pli bone diri moleco.

Do, inter ĉiuj virtoj suprediritaj, aŭ por diri veron, precipe pri ĉiuj ili, bona virino devas zorgegi en tiu ĉi, kiu estas esti saĝa ĉe sia prudento, kaj kvieta kaj dolĉa ĉe sia parolmaniero. Kaj ni povas diri, ke per tio ĉi, ŝi brilos kaj havos, kvazaŭ vivo, ĉion ceteran el virto, kion oni metas en tiun ĉi virinon, kaj, ke sen tio, ĉio alia restos kvazaŭ sen vivo kaj perdita. Ĉar, virino malprudenta kaj babilema, kiel senintermanke estas la malprudentaj, eĉ se multajn aliajn bonojn ŝi havas, estas ne tolerebla afero. Kaj, nek pli nek malpli, tiun, kiu estas malagrabra kaj de kruda kaj malafabla konversacio, oni ne povas nek vidi nek toleri. Kaj tiel, ni povas diri, ke ĉio supredirita faras kvazaŭ korpon de tiu ĉi virto de la edzino, kiun ni desegnas; sed tio ĉi nuna, estas kvazaŭ animo, kaj estas perfekteco, kaj rando, kaj floro de ĉiu tiu ĉi bono.

Kaj pri la unua afero, kio estas prudento kaj diskreteco kaj saĝeco, kiel tie ĉi oni diras, tiu, kiu per si mem ne ĝin havas, aŭ ne ĝin estu ricevinta de Dia dono, malfacile ni ŝin konvinkos, ke ŝi ne ĝin havas, kaj, ke

(1) Prov., ĉap. XXXI<sup>a</sup>, ver. 26.<sup>a</sup>

ŝi ĝin serĉu. Ĉar tio plej propra el la malprudenteco estas ne sin koni kaj sin kredi saĝa. Kaj kvankam ni ŝin konvinkus, estos pligranda malfacileco ŝin meti en ĝustan scion, ĉar estas afero kiun oni malbone lernas, kiam oni ne ĝin lernas dum mamsuĉo. Kaj, pli bona konsilo kiun ni povas doni al tiaj, estas petegi ilin, ke ili silentu, kaj, ke ĉar ili estas malmulte prudentaj, ili penu esti multe silentaj. Ĉar, kiel diras la Saĝulo (1): *«Se malprudentulo silentas, iafoje li estos kredita saĝa aŭ prudenta.»* Kaj eble estos tiel, ke silentante kaj aŭdante, kaj pensante, unue por si, tion, kion ili estas parolontaj, ili trafos paroli tion, kio meritos esti aŭdota. Tiel, pri tiu ĉi malbono, tiu ĉi estas la plej certa kuracilo, kvankam estas nek sufiĉa kuracilo, nek facila.

Sed, kiel ajn ĝi estu, estas juste, ke ĉiuj sin gloru silenti, same tiuj al kiuj konvenas kaŝi sian malmultan scion, kiel tiuj, kiuj povas sen honto malkaŝi tion, kion ili scias; ĉar ĉe ĉiuj, silenti kaj malmulte paroli estas ne nur agrabla kondiĉo, sed devigata virto.

Kaj malfermi la buŝon saĝece, kiel saĝulo tie ĉi diras, estas ĝin ne malfermi, sed kiam bezono tion postulas, kio estas same kiel ĝin malfermi modere kaj malmulte da fojoj, ĉar estas malmultaj tiuj, kiujn bezoneco postulas. Ĉar, tiel, kiel naturo, kiel ni diris, kaj ni diros, faris virinojn por ke ili enfermitaj gardu domon, tiel ĝi ilin devigis fermi la buŝon; kaj tiel, kiel ĝi ilin liberigis de eksteraj kontraktoj kaj negocoj, tiel ĝi ilin liberigis de tio, kio decas al la kontraktado, kio estas la multaj konversacioj kaj vortoj.

Ĉar parolado elvenas el intelekto, kaj vortoj nur estas kvazaŭ bildoj aŭ signoj de tio, kion animo ekkomprenas en si mem; el kio, same kiel la bonan kaj honestan virinon, naturo ne faris por scienca lernado nek por malfacilaj aferoj, sed por unu sola ofico simpla kaj

(1) Prov., ĉap. XVII.<sup>a</sup>, ver. 28.<sup>a</sup>

doma, tiel ĝi limigis al ili intelekton, kaj tial, ĝi nombredifinis al ili la vortojn kaj tialojn; kaj tiel, kiel tio ĉi estas io, kion ŝia virina naturo kaj ŝia ofico petas, tiel samkaŭze tio estas unu el la aferoj, kiuj pli bone estas al ili, kaj pli bone ŝajnas. Kaj tial kutimis diri Demokrito (1), ke *ornamo de virino kaj ŝia beleco estis paroli malmulte kaj limigite*. Ĉar tiel, kiel ĉe vizaĝo, ĝia beleco konsistas el intertrajtaj proporcioj, tiel la viva beleco ne estas alia afero, ol tio, ke ĉiu agu konforme al tio, kion ĝia natureco kaj ĝia ofico al ĝi postulas.

Edzina stato, kompare kun edza stato, estas humila stato, kaj modereco kaj honto estas tiel, kiel natura doto de la virinoj, kaj neniam afero estas malpli alĝustiganta aŭ malkonformiganta al humileco kaj honteco, ol parolemeco kaj babilemeco. Plutarĥo rakontas (2), ke Fidias'o, nobela skulptisto, faris al elidanoj Veŭsus'an figuraĵon, kiu starigis sur testudon, kiu estas muta besto, kaj kiu neniam forigas sian konkon; komprenigante, ke virinoj estas sammaniere devigataj silenti kaj gardi domon. Ĉar vere, scii silenti estas ilia propra saĝeco, kaj tiu pri kiu parolas Salomon'o tie ĉi, kvankam por lerniteco, ĝi estas tre malfacila al tiuj, kiuj per ili mem ne tion havas, kiel ni diradis.

Kaj tio ĉi, pri la unua afero. Sed la dua, kiu rilatas al malafableco kaj malfeliĉeco de la kondiĉo, kio ĉe la plimulto elvenas pli el kutima volo, ol el erarinta naturo, tiu ĉi estas pli resanigebla malsano. Kaj bonaj virinoj devas multe atenti pri tio; ĉar se bone oni pripensas, mi ne scias ĉu estas afero pli monstra nek pli diferenca de tio, kio estas, ol virino kiu estas kruda kaj malafabla.

Krudeco estis farata por kasto de leonoj aŭ tigroj, kaj eĉ al homoj, pro sia natura kunmeto kaj pro premo de aferoj, pri kiuj ordinare ili sin okupas, estas permesite esti iom krudaj. Kaj malbonmieno kaj sulka interbrovo

(1) Apud Stobaeum, serm. LXIX.<sup>a</sup>

(2) Lib. de Praeceptis Conjugalibus.

kaj malafableco, foje estas bone ĉe ili; sed virino, se ŝi estas leonino, kio restas ĉe ŝi el virino? Ŝi rigardu sian tûtan fasonon, kaj ŝi vidos, ke ŝi naskiĝis por pieco. Kaj kiel al la panteroj, akraj ungoj, kaj longaj dentoj, kaj grandega buŝo, kaj sangaj okuloj, ilin invitas al krueleco, tiel al ŝi, la kvietaj figuro el tuta ŝia fasono ŝin devigas al tio, ke ŝia animo ne estu malpli modera, ol ŝia korpo ŝajnas mola.

Kaj ili ne pripensu, ke Dio ilin kreis kaj ilin donis al homo, nur por ke ili gardu lian domon, sed ankaŭ por ke ili lin konsolu kaj gajigu. Por ke en ĝi la edzo laca kaj malplaĉinta trovu ripozon, kaj la filoj amon, kaj geservantoj piecon, kaj ĝenerale ĉiuj agrablan akcepton.

La hebreo bone nomas la virinojn *«la doma gracia»*, kaj li tiel nomas ilin, en sia lingvo, per unu vorto, kiu kastile nek dirante gracion nek per aliaj multaj vortoj bon signifaj, apenaŭ ni komprenas ĉion, kion per ĝi oni diras; ĉar ĝi diras purecon, kaj diras belecon, kaj diras spritecon, kaj diras lumon, kaj raven, kaj ordigon, kaj kontenton, la vorto per kiu hebreo ilin nomas.

El kio ni komprenas, ke el bona virino estas havi ĉiujn, tiujn ĉi kvalitojn, kaj ni ankaŭ komprenas, ke tiu, kiu ne iras tiun ĉi vojon, ne devas esti nomata, nek la gracia, nek la lumo, nek la plezuro de sia domo, sed ĝia sentaŭgulino kaj malhelpo, aŭ por doni al ili ilian veran nomon, la *koboldo* kaj la *fantomo*, kiu ĉiujn konfuzas kaj timigas. Kaj jen okazas, ke kiel domojn, kiuj pro tio timigas, post kiam ili estas petegitaj, fine iliaj loĝantoj ilin forlasas; tiel en loĝejon, kie regas, en virina figuro, tiuj ĉi sovaĝaj bestoj, edzo timas eniri kaj servantaro deziras eliri el ĝi, kaj ĉiuj ĝin malamas, kaj kiel eble plej frue ili povas, ili faras la krucsignon kaj forkuras. Kion diras la Saĝo (1)? *«La malfeliĉo de lango de kruda virino disvastiĝas al ĉiuj; fieraj malplezuro estas ekkol-*

(1) Ecclesiast., ĉap. XXVII.<sup>a</sup>, ver. 9.<sup>a</sup>



*erema kaj drinkema virino, tio ĉi estas ŝia ĉiama malhonoro» (1).*

Mi konis virinon, kiu dum manĝado riproĉis, kaj kiam nokto alvenis, ankaŭ ŝi riproĉis, kaj suno, eliganta, trovis ŝin riproĉantan, kaj tion ĉi ŝi faris la dimanĉan tagon, kaj la tagon ne dimanĉan, kaj dum semajnojn kaj monatojn, kaj dum la tuta jaro ne estis alia ŝia ofico, ol riproĉi; ĉiam oni aŭdis la krion kaj la malafablan voĉon kaj la insultegan vorton kaj la senbridan malhonorigon, kaj jen sonis manbato kaj jen flugis domŝuo, kaj neniam mi ŝin aŭdis ne rememorante tion, kion diris la poeto (2).

Tesifone'o, zonita je krueleco,  
La eniron, ne dormante nokte nek tage,  
Ŝi okupas; sonas krio, la krudeco,  
La ploro, la maldelikata bato, la diskuto.

Kaj tiel, estis ŝia domo bildo de la infero pri tio ĉi, estante pri cetero paradizo, ĉar ĝiaj personoj estis ne por inklini al malafableco, sed por doni kontenton kaj ripozon al tiu, kiu bone pripensus. El kio, mi pripensante kelkajn fojojn pri tio, mi deduktis, ke por ĉiu tiu kriado kaj riproĉado oni ne povis trovi tialon kiŭ estus justa, kaj nur estis, ke ŝi, per tiu ekzerco, volis digesti la vespermanĝojn, en kiuj ordinare ŝi ekscesiĝis.

Kaj estas tiel, ke en tiuj ĉi malafablulinoj, se oni elserĉas ĉiujn kaŭzojn de tiu ĉi senbridigita kaj senĉesa kolero, ili ĉiuj estas malsaĝajaj tialoj; la unua, ĉar ŝajnas al ŝi, ke kiam ŝi riproĉas ŝi estas sinjorino; la dua, ĉar edzo malfeliĉigis ŝin kaj tion estas pagonta filino aŭ servantino; la tria, ĉar spegulo ne mensogis ŝin, nek hodiaŭ montris ŝin al ŝi tiel beleta kiel hieraŭ, pri ĉio, kion ŝi vidas, ŝi naskas laŭtvoĉaron. Unun malafabligas

(1) *Ibid.*, ver. 12.<sup>a</sup>

(2) Ovidio, lib. VI.<sup>a</sup>, *Metamorph.*

vino, alian ŝia ne plenumita deziro, alian ŝia malbona sorto. Sed ni transiru antaŭen. Li diras.

## XVII

**Ne devas esti virinoj stratamemaj, vizitemaj kaj vagir-  
emaj, sed ili multe devas ami rifuĝon kaj sin kutimi  
resti dome.**

*Ŝi vizitadis ĉiujn angulojn de sia domo, kaj ŝi ne  
manĝis panon senpage (1).*

Tio ĉi volas diri, ke tuj post malkuŝiĝo, virino devas provizi la aferojn de sia domo kaj ilin ordigi, kaj ŝi ne devas fari, kion multaj nunaj faras, ke kelkaj leviĝante, aŭ antaŭ ol leviĝi, tio estas, ankoraŭ en lito, okupas sin pri matenmanĝo, kvazaŭ ili estus pasigintaj nokton fosante.

Aliaj sidiĝas antaŭ spegulo por la afero de sia pentro, kaj restas en ĝi tri aŭ kvar horojn, pasas tagmezo, edzo venas manĝi, kaj nenia afero estas ordigita.

Kaj Salomon'o tie ĉi parolas pri tiu ĉi afero, ne ĉar antaŭe li ne estus parolinta pri ĝi, sed por ĝin fari, pro ripetado, pli daŭra en memoro kiel grava afero, kaj kiel kiu konas kiom malbone virinoj sin kutimas al zorgo kaj kiom klinitaj ili estas al komforto. Kaj ankaŭ li tion diras, ĉar dirante al virino, ke ŝi vizitadu sian domon, li volas ŝin instrui spacon kie virino devas movi siajn piedojn, kaj lokojn kie li devas paŝi, kaj kvazaŭ ni dirus, la kampon de ŝia ofico, kio estas ŝia propra domo, kaj ne stratoj, nek placoj, nek fruktejoj, nek malpropraj domoj. «*Ŝi vizitadis*, li diras, *la angulojn de sia domo,*» por ke oni komprenu, ke ŝia irado devas

(1) Prov., ĉap. XXXI.<sup>a</sup>, ver. 27.<sup>a</sup>

esti en ŝia domo kaj, ke ŝi devas ĉiam ĉeesti en ĉiuj ĝiaj anguloj; kaj, ĉar ŝi devas ĉiam ĉeesti tie, tial ŝi devas neniam foresti; kaj, ĉar ŝiaj piedoj estas por trapasi ĝiajn angulojn, ŝi komprenu, ke ŝi ne ilin havas por travagi la kampojn kaj la stratojn.

Ĉu ni ne diris supre, ke la celo por kiu Dio difinis la virinon, kaj ŝin donis por kunulino al edzo estis por ke ŝi al li gardu la domon kaj por ke tion, kion li gajnis en oficoj kaj eksteraj kontraktoj, kaj alportis domen, virino tenu garde, kaj ŝi estu kvazaŭ ĝia ŝlosilo? Do, se ŝi estas laŭ natura ofico doma gardistino; kiel oni pretendas, ke ŝi estu stratamema kaj vizitema kaj vagirema? Kion diras Sankta Paŭlo al sia instruato Tito, ke li instruu al edzinigitaj virinoj? *Ke ili estu saĝaj*, li diras, *kaj ke ili estu honestaj, kaj ke ili amu siajn edzojn, kaj ke ili zorgu pri siaj domoj* (1). Kie ni diras, *ke ili zorgu pri siaj domoj*, originalo diras tiel: *Kaj ke ili estu gardistinoj de sia domo*.

Kial Dio donis al virinoj nepotencajn fortojn kaj membrojn molajn, sed nur ĉar Li ilin kreis, ne por esti kuristinoj, sed por sidadi en ilia angulo? Virino stratamema, malvirtigas sian propran naturon. Kaj kiel fiŝoj, tuj kiam ili estas en akvo, disiras en ĝi kaj ili sin movas kaj naĝas rapide, sed se oni eltiras ilin el tie, ili restas senmove, tiel bona virino, kiom en sia domo ŝi devas esti preta kaj rapida, tiel ekstere ŝi devas sin kredi lama kaj mallerta.

Kaj, ĉar Dio ne dotis ilin pri la prudento, kiun postulas la gravaj aferoj, nek pri fortoj kiujn oni bezonas por milito kaj kampo, ili sin mezuru laŭ tio, kio ili estas, kaj ili kontentiĝu kun tio, kio estas ilia sorto, kaj sin okupu en sia domo, kaj ili iradu en ĝi, ĉar Dio ilin faris nur por ĝi. Ĥinoj, tordas piedojn al infaninoj, tuj kiam ili naskiĝas, por ke kiam ili estos virinoj, ili ne ilin havu

(1) Ad. Tit., ĉap. II.<sup>a</sup>, ver. 4.<sup>a</sup>, 5.<sup>a</sup>

por domeliri; kaj tial, ke por iradi dome, tiuj torditaj piedoj sufiĉas al ili.

Kio estas viroj por publikeco, tio estas virinoj por la privateco, kaj kiel estas el viroj paroli kaj sin malkaŝi, tiel estas el virinoj sin fermi kaj sin kaŝi.

Eĉ ĉe preĝejo, kien religia neceso kaj Dia servo ilin alportas, volas Sankta Paŭlo (1), ke ili estu tiel kovritaj, ke homoj apenaŭ ilin vidu; kaj ĉu li konsentos, ke pro sia kaprico ili flugu tra placojn kaj stratojn paradante sin? Kion faros ekster sia domo tiu, kiu havas neniam ecojn el tiuj, kiujn postulas la aferoj, kiujn oni traktas ekster ĝi.

Nepre estas, ke kiel spertado tion montras, ĉar ili ne havas scion por substancaj aferoj, ili traktu, elirinte, pri mizeroj kaj malgrandaĵoj, kaj nepre estas, ke ĉar ili ne estas por aferoj prudentaj kaj gravaj aferoj, ili okupu sin pri tio, kio estas vanta kaj malhonesta; kaj nepre estas, ke ĉar ne estas ilia ofico nek naturo, fari tion, kion postulas indo, ili faru kontraŭan oficon. Kaj tiel estas, ke tiuj, kiuj fermitaj kaj okupitaj en siaj domoj ilin plibonigas, irante for el ili ilin detruas. Kaj tiuj, kiuj vizitante siajn angulojn gajnos volojn kaj edifos konsciencojn de siaj edzoj, vizitante stratojn ili malvirtigas malproprajn korojn kaj malfortigas animojn de tiuj, kiuj vidas ilin; ili, kiuj pro ilia delikateco, estis faritaj por la ombro kaj la sekreto de iliaj muroj.

Kaj, se estas kondiĉo de malbona virino vagi tra stratoj, kiel tion diras Salomono ĉe la *Proverboj* (2), bone oni deduktas, ke estos kondiĉo de la bona, eliri publike malmultajn fojoj.

Bone diras iu rilate al poeto Menandro (3).

Al la bona virino estas propra bono,  
Senĉese ĉeesti en sia hejmo,  
Ĉar forvagi estas el la malvirtaj.

(1) I. ad Corinth., ĉap. XI.<sup>a</sup>

(2) Prov., ĉap. VII.<sup>a</sup>, ver. 10.<sup>a</sup>

(3) Apud. Stobeaum, serm. LXXIV.<sup>a</sup>

Kaj ne pro tio ili pensu, ke ili ne estos konataj aŭ estimataj se ili gardas sian domon, ĉar, kontraŭe, nenio estas pli ilin valoriganta, ol partopreni en ĝi ilian oficon, kiel oni skribas pri Teano la Pitagoro'a, kiu demandita de alia virino, kiel ŝi sukcesus esti rimarkita kaj notita, ŝi diris (1), ke ŝpinante, kaj teksante, kaj zorgante pri sia angulo. Ĉar ĉiam al tiuj, kiuj tiel faras, okazas tio, kion poste oni daŭrigas. Tio estas:

## XVIII

**Kiel apartenas al ofico de perfekta virino fari bona la edzon, kaj pri la devo kiun havas tiu, kiu estas patrino, mamnutri per si mem la gefilojn.**

*Ŝiaj filoj stariĝis kaj laŭdis ŝin, kaj ankaŭ ŝia edzo laŭdis ŝin (2).*

Ŝajnos al iuj, ke havi virino gefilojn kaj edzon, tiajn, ke ili laŭdu ŝin, pli bone estas ŝia bona sorto, ol parto el ŝia virto. Kaj ili diros, ke tiu ĉi ne estas, iu el la aferoj, kiujn ŝi devas fari por esti tio, kio ŝi devas esti, sed el tiuj, kiuj, se ŝi estus bona, okazus al ŝi.

Sed kvankam estas vero, ke al tiaj okazas tio ĉi, oni ne devas pensi, ke tiu ĉi estas sukceso, kiu venas al ili okaze, sed bone ĝi venas al ili, tial, ke ili ĝin faras kaj ĝin agas. Ĉar al ofico de bona virino apartenas, kaj tion ĉi instruas al ni Salomono tie ĉi, fari bonan edzon kaj eduki bonajn gefilojn, kaj tiajn, ke ne nur per devigataj kaj dankaj vortoj ili donu al ŝi laŭdon, sed multe pli per bonaj faroj kaj agoj. Kio estas peti al ŝi tiom da virto kiom ŝi bezonas, ne nur por si, sed ankaŭ por siaj gefiloj kaj por sia edzo.

(1) Sophocles in Phrixo.

(2) Prov., ĉap. XXXI.<sup>a</sup>, ver. 28.<sup>a</sup>

Tiel, do, ŝiaj bonaj agoj estu propraj kaj veraj laŭdoj al ŝi, kaj estu kiel vivaj voĉoj, kiuj, ĉe oreloj de ĉiuj, kantu ŝian laŭdon.

Kaj koncerne la edzon, certa estas la unua afero kiun diras Apostolo, ke multajn fojojn kristana kaj fidela virino, konvinkas edzon, kiu estas malfidela, kaj ŝi faras el li sian similan (1). Kaj tiel, ili ne devas pensi, ke peti al ili tiun ĉi virton estas peti al ili tion, kion ili ne povas fari, ĉar se iu allogas edzon, tiu estas nur lia edzino. Kaj se kristana bonfarado devigas fari bonon al malpropraj, kiel povas pensi virino, ke ŝi ne estas devigita allogi kaj plibonigi sian edzon?

Certe, estas du aferoj, kiuj inter ĉiuj havas efikon por konvinki: amikeco kaj prudento. Ni vidu, do, kiun el tiuj du aferoj mankas ĉe virino, kiu estas tiel, kiel ni tie ĉi diras; aŭ ni vidu ĉu estas iu alia kiu, eĉ malproksime, egaliĝu al ŝi en tio ĉi.

Amo, kiu estas ĉe du, edzino kaj edzo, estas la plej premligita, kiel estas sciigite, ĉar naturo komencas ĝin, kaj ĝin pliigas la favoro, kaj ĝin flamigas la kutimo, kaj ĝin mallarĝege kunligas aliaj multaj devoj.

Do, prudento kaj vorto de diskreta virino estas pli efika, ol nenia alia en la viraj oreloj, ĉar ŝia avizo estas dolĉa avizo, kaj kiel porkoraj kuraciloj, tiel ŝia voĉo sin ĵetas tuj al koro kaj sin alĝuas pli al ĝi.

Multaj viroj estus en Israelo tiel saĝaj kaj de tiel kaj pli diskreta prudento, ol la virino de Tekua'o; kaj por konvinki David'on kaj por induki lin, ke ili restarigu sian favoron al sia filo Absalon'o, Joab'o, lia kapitano generalo, lerte profitiĝis de la avizo de nur tiu ĉi virino, kaj li volis, ke nur tiu ĉi per sia bona prudento kaj dolĉa vorto moligu kaj turnu al pieco la reĝan koron, juste indignitan (2), kaj sukcesis lia intenco; ĉar, kiel mi diras, pliboniĝas kaj plifortiĝas multe kiu ajn bona tialo

(1) I. ad Corinth., ĉap. VII.<sup>a</sup>, ver. 14.<sup>a</sup>

(2) II. Reg., ĉap. 14.<sup>a</sup>

en dolĉa buŝo de saĝa kaj bona virino. Ĉar, kiu ne ŝatas plaĉi al tiu, kiun li amas? Aŭ, kiu ne fidas al tiu de kiu li estas amata? Aŭ, kiu ne kredas al amo kaj al prudento kiam ili kolektiĝas?

Prudento ne sin trompas, kaj amo ne volas trompi; kaj tiel, konforme al tio ĉi, bona virino estas preninta al sia edzo ĉiujn havenojn, ĉar li, nek pensos ke tiu trompiĝas kiu tiel diskreta estas, nek li suspektos ke tiu volas trompi lin, kiu edzine amas lin.

Kaj se bonfaroj kreas dankajn dezirojn en la volo de tiuj, kiuj ilin ricevas kaj ilin firmigas, por ke sen timo oni fidu al tiu de kiu oni ilin ricevis, kaj ambaŭ aferoj faras potencega la konsilon kiun donas la bonfaranto, kia bonfaro estas egalanta al tiu, kiun ricevas edzo de virino kiu vivas tiel, kiel tie ĉi oni diras?

Al nekonata homo, se ni aŭdis, ke li estas virta kaj klera, ni fidas pri lia opinio; kaj, ĉu dubos edzo obei virton kaj diskretecon kiun ĉiutage li vidas kaj spertas?

Kaj ĉar ni diras ĉiutage, havas ankoraŭ plie la edzinoj tiun ĉi ĝustokazon kaj aranĝon por atingi de siaj edzoj tion, kion ili volas, ĉar ili povas trakti kun ili ĉiutage kaj ĉiuhore, kaj en la horoj de pli bona ĝustatempeco kaj matureco.

Kaj multfoje, tio, kion prudento ne povas venki, tion venkas ĝeneco, kaj speciale tiu de la virino, kiu, laŭ diras la spertuloj, estas supera al ĉiuj.

Kaj vere, estas afero, mi ne scias ĉu nomi ĝin honta aŭ sprita, ke la bonaj edzinoj ne estas potencaj por ordigi siajn edzojn, dum la malbonaj estas kuraĝaj por ilin induki al malsaĝaj aferoj kiuj ilin detruas.

Virino, per si mem, multe povas, kaj virto kaj prudento ankaŭ, ĉiu en soleco, estas tre kuraĝa, kaj ambaŭ aferoj kunigitaj sin helpas reciproke kaj tiamaniere sin fortikigas, ke ĉion ili metas sub piedojn.

Kaj virinoj scias, ke mi diras veron, kaj, ke estas vero kiun oni povas pruvi per ekzemplo el multaj, kiuj

per sia bona konsilo kaj diskreteco, korektis milon da malbonaj moroj ĉe siaj edzoj, kaj gajnis ilian animon, kaj korektis ilian kvaliton, ĉe unuj malafabla, ĉe aliaj diboĉa, ĉe aliaj pro malsamaj kaŭzoj malvirta.

Tiel do, tiuj, kiuj nun plendas pri ili kaj pri ilia malbonordo, ili plendu unue pri si mem kaj pri sia zorgmanko, pro kio ili ne ilin havas kiel decas.

Sed, se pri edzo ili ne sukcesas, pri gefiloj kiuj estas parto el si, kaj kiujn ili tenas inter manoj de ilia naskiĝo, kaj estas al ili dum infaneco kvazaŭ vakso, kion ili povas diri, sed konfesi, ke iliaj malvirtoj kaj la malfeliĉegoj en kiujn ili enfalas pro siaj malvirtoj, plejmultparte estas kulpo de iliaj gepatroj?

Kaj ĉar ni nun parolas pri patrinoj, komprenu virinoj, ke se ili ne havas bonajn filojn, granda parto el tio okazas, ĉar ili ne estas por ili iliaj plenaj patrinoj. Ĉar ne devas pensi edzino, ke esti patrino konsistas el tio esti embriigita kaj naski filon; ĉar ĉe la unua ŝi nur sin plezuregigis, kaj la duan trudis al ŝi natura bezono. Kaj se ili nur tion farus por ili, mi ne scias al kio ili estus al ŝi devigitaj.

Kio sekvas la naskon, tio estas la pura patrina ofico, kio povas fari bona la filon kaj kio vere devigas lin.

Pro tio, tiu ĉi perfekta edzino akceptu, kvazaŭ al ŝi dirita, ke ŝi ne estos tia se ŝi ne nutras siajn gefilojn, kaj, ke devo kiun ŝi havas, pro sia ofico, ilin fari bonaj, tiu mem al ŝi devigas ilin nutri per siaj mamoj; ĉar per lakto, mi ne diras, ke oni lernu kio estus despli bone, ĉar kontraŭ tio malbone lernita, forgeso estas rimedo; sed mi diras, ke post eltrinko de la lakto, aliformiĝas en substancon kaj kvazaŭ en naturo, ĉio bona kaj ĉio malbona, kio estas en tiu el kiu oni ĝin ricevas; ĉar la moletan korpon de infano, elirintan el ventro kvazaŭ komencita, mamoj finas fari kaj formi. Kaj kiel estos bone formita la korpo, tiel alĝustiĝos poste al ĝi animo, kies moroj ordinare naskiĝas el ĝiaj emoj; kaj se gefiloj



similas al gepatroj el kiuj ili estas naskitaj, kiel ili ne similos al nutristinoj el kiuj ili sin paŝtas, se estas vera la hispana proverbo? Ĉu ni ne vidas, ke kiam infano estas malsana, oni laksigas nutristinon kiu ĝin mamnutras, kaj, ke per purigo kaj sanigo de ŝia malbona korpakvaĵo ni donas al ĝi sanon? Do, ni komprenu, ke kiel sano estas unu, tial estas unu la korpo, kaj se korpakvaĵoj estas unuj, kiel ne tio estos la emoj, kiuj, ĉar ili estas ĉiam fratigitaj kun ili, hispane prave ni nomas ilin *humores* (1)?

Tiel, do, se nutristino estas drinkema, ni devas esperi, ke malfeliĉuleto trinkos kun la lakto amon al vino; se kolerema, se malsaĝa, se malhonesta, se de malnoblaj pensoj kaj animo, kiel ili estas ordinare, infano estos sama.

Do, se ne mamnutri infanojn estas ilin riski al tiel komprenebla kaj elmontrita danĝero, kiel estas eble, ke edzino ne ilin mamnutranta, plenumu sian devon? Tio estas; tiu, kiu en plej bona parto el sia domo, kaj por kies celo precipe ŝi edziniĝis, metas tiel malbonan antaŭzorgon, por kio al ŝi profitas esti diligenta en ĉio cetera, se en tio, kio estas la ĉefa afero ŝi estas tiel malzorgema? Se filo estos malvirta, por kio profitos al ŝi la gajnita haveco? Aŭ, kia bono povas esti en domo, kies gefiloj por kiuj ĝi estas, ne estas bonaj?

Kaj se estas parto de tiu ĉi edzeca virto, kiel ni jam vidis, ĝenerala pieco por ĉiuj, kiuj estas tiel senpiaj, ke ili fordonas al nepropa virino la frukton de siaj internaĵoj, kaj la imagaĵon de virto kaj bono, kiu en ĝin estis komencata fari naturo, kaj permesas, ke alia ĝin neniigu, kaj permesas ke ŝi fiksu malvirtojn en tio, kio el ventro eliris kun komenco de bonaj emoj, tiuj certe, ne estas bonaj edzinoj, eĉ nek edzinoj, se ni devas paroli

---

(1) *Humor, humores* signifas en hispana lingvo *akvaĵoj de la korpo* kaj ankaŭ *humoro*.

kun vero; ĉar el virino estas naski gefilojn, kaj tion ĉi fari, estas ilin malvirtigi; kaj el virino estas naski legitimajn filojn, kaj tiuj, kiujn tiel oni nutras, bone ĝin rigardante, estas simple bastardaj.

Kaj por ke via moŝto vidu, ke mi parolas vere, kaj ne troe, vi devas kompreni, ke patrino en la filo, kiun ŝi naskas, nur metas unu parton el sia sango, el kiu vira povo, ĝin figurigante, faras karnon kaj ostojn. Do, nutristino kiu mamnutras faras same, ĉar lakto estas sango, kaj ĉe tiu sango, sampovo de la patro, kiu vivas en la filo, faras saman aferon; kaj nur la diferenco estas tiu ĉi, ke patrino donis tiun ĉi havon por naŭ monatoj kaj nutristino por dudekvar; kaj patrino, kiam naskitaĵo, estis ŝtupo sen ia sento, kaj infano amas kiam ĝi komencas jam senti kaj ekkoni bonon, kiun ĝi ricevas; patrino influas en korpon; nutristino en korpon kaj animon.

Tiel, do, bone kalkulante, nutristino estas patrino, kaj tiu, kiu naskis estas pli malbona ol duonpatrino, ĉar ŝi forigas el si sian filon, kaj bastardigas tion, kio estis naskita legitima, kaj estas kaŭzo, ke estu malbone naskita tiu, kiu povus esti nobela, kaj faras iamaniere ian specon de adulto malmulte malpli malbela kaj ne malpli malutila, ol la ordinara; ĉar en tiu, ŝi donas al edzo, kiel filon, tiun, kiu ne estas lia, kaj tie ĉi, tiun, kiu ne estas ŝia, kaj ŝi faras posteulon el sia domo, la filon de la mastro kaj el la servantino, kiu plejmultafoje estas malnobelino aŭ sklavino.

Bone konformiĝas kun tio ĉi, tio, kion oni rakontas pri iu romana junulo el Grako'a familio, kiu venke reveninte el milito kaj per multuj senigaĵoj riĉa, kiam eliris al lia renkonto, por lin ricevi, gajaj kaj ĝojaj, lia patrino kaj lia nutristino kune, turnita al ili, li disdonis al ili parton el kio li portis, kaj, ĉar al patrino li donis arĝentan ringon kaj al nutristino oran kolringon, kaj la patrino indignita plendis al li pro tio, li respondis al ŝi, ke ŝi ne estas prava;—«ĉar, li diris,—vi ne kunportis min

en ventro sed dum naŭ monatoj, kaj tiu ĉi nutris min per siaj mamoj dum du tutaj jaroj. Tio, kion mi havas el vi, estas nur la korpo, kaj, eĉ tiun ĉi, vi donis al mi per rimedo ne tre honesta; sed donacon, kiun mi havas el tiu ĉi, ŝi donis al mi kun pura kaj naiva volonto. Naskinte min, vi apartigis min el vi kaj forigis min el viaj okuloj; sed tiu ĉi, sin prezentante, ame akceptis min, malŝatitan, en siajn brakojn, kaj tiel traktis min, ke per ŝi, mi alvenis kaj estas en la momento kaj stato, en kiu mi nun estas.»

Sankta Paŭlo ordonas, en doktrino kiun li donas al edzinoj (1), ke ili amu siajn gefilojn. Nature estas al patrinoj ilin ami kaj ne estis por ke Sankta Paŭlo rekomendu per aparta regulo tiel naturan aferon; el kio, oni komprenas, ke diri, *ke ili ilin amu*, estas diri, ke ili ilin mamnutru, kaj, ke doni lakton al siaj gefiloj, Sankta Paŭlo nomas *ilin ami*, kaj tre ĝuste; ĉar ne ilin mamnutri estas ilin vendi kaj ilin fari ne propraj filoj, kaj kvazaŭ ilin senheridigi de sia natureco, kaj ĉiuj tiuj estas agoj el fiera malamo, kaj tiel fiera, ke ili venkas pri tio, eĉ al sovaĝaj bestoj; ĉar, kia besto ekzistas tiel kruda, ke ĝi ne nutras tion, kion ĝi produktas, ke ĝi konfidu al alia la nutrecon de tio, kion ĝi naskas? La braveco de leono toleras kviete al ĝiaj idetoj, ke ili ĝene sensukigu la mamojn, kaj tigro, soifanta sangon, donas gaje sian al la siaj. Kaj ĉu ni rigardas delikatajn estaĵojn, la malforta birdeto, por ne forlasi siajn ovojn, forgesas manĝi kaj maldikiĝas, kaj kiam idetoj eliras, ĝi flugante ĉirkaŭiras aeron, kaj gaje alportas en beko tion, kion ĝi deziras manĝi kaj ne manĝas por ke ili ĝin manĝu.

Sed, ĉu estas bezone eliri el nia domo? Naturo per si mem elmontras preskaŭ per kriegoj sian volon, sendante, tuj post la nasko, lakton al mamoj. Kian plej komprenblan signon ni esperas de tio, kion Dio volas, ol vidi

(1) Ad. Tit., ĉap. II.<sup>a</sup>, ver. 4.<sup>a</sup>

tion, kion Li faras? Kiam Li levas mamojn al virinoj, Li ordonas ilin, ke ili mamnutru; dikigante iliajn mampintojn Li avizas ilin, ke ili estos patrinoj; la radioj de lakto, kiu venas, estas kvazaŭ pikiloj per kiuj Li incitas ilin, ke ili alproksimigu al si, tion, kion ili naskis.

Sed al ĉio ĉi tio, kelkaj faras kvazaŭ ili estas surdaj, kaj sin senkulpigas dirante, ke tio estas laboro, kaj, ke naski kaj mamnutri, estas fariĝi maljunaj frue.

Laboro estas, mi tion konfesas; sed se tion oni akceptas, kiu faros sian oficon? Ne skermu soldato ŝian glavon, nek sin kontraŭmetu al malamiko, ĉar estas danĝera kaj ŝvita afero; kaj ĉar multe sin difektas paŝtisto en kampo li forlasu siajn ŝafojn. Estas laboro, naski kaj mamnutri; sed ili komprenu ke ĝi estas laboro alkonformigita, kaj, ke ili ne havas permeson por ĝin partigi. Se malplaĉas al ili mamnutri, ili ne nasku, kaj se al ili plaĉas naski, ili ankaŭ mamnutru. Se en tio ĉi estas peno, tiu de la nasko estas senkompare la pligranda. Do, kial tiuj, kiuj estas tiel kuraĝaj pri tio, kio estas pli, malkuraĝiĝas pri tio, kio estas malpli? Bone oni komprenas tiujn, kiuj tion faras, kaj kvankam ne pro siaj gefiloj, pro tio, kion ili ŝuldas al sia honto, ili devus havi pli kovritaj kaj kaŝitaj siajn inklinojn.

Naski, kvankam ĝi akute doloras, fine pasas. Al mamnutrado ili ne kontraŭstaras, ĉar ne estas ravo, kiu tion perlogu. Kvankam se bone oni rigardas, eĉ tio ĉi ne mankas al patrinoj, kiuj mamnutras; ankoraŭ ĉe tiu ĉi laboro, naturo saĝa kaj prudenta, disdonis grandan parton da plezuro kaj kontento; kiun kvankam ni, homoj, ne sentas, prudento diras al ni, ke ĝi estas, kaj ĉe ravajoj kiujn faras patrinoj al siaj geinfanoj, ni tion vidas.

Ĉar, kia peno ne pagas infano al patrino, kiam ŝi havas ĝin nudan sur jupo, kiam ĝi ludas je la mammo, kiam ĝi ŝin batetas per maneto, kiam ĝi rigardas ŝin ride, kiam ĝi trilas? Do, kiam ĝi sin ligas al ŝia kolo

kaj kisas ŝin, ŝajnas al mi, ke ankoraŭ ĝi faras ŝin devigita.

Mamnutru, do, la bona edzino sian filon, kaj finu ĉe ĝi la bonon, kiun ŝi formis, kaj ne donu farajon el siaj internaĵojn al tiu, kiu ĝin difektos, kaj ŝi ne volu, ke estu renaskita malbone, tio, kio estis naskita bone, nek, ke lakto estu al ĝi, majstro de malvirtoj, nek faru bastardo sian posteulon, nek ŝi toleru ke ĝi konu alian, antaŭ ol ŝi, kvazaŭ patrino; eĉ, nek ŝi volu, ke ĝi komencante vivi, komencu trompiĝi. La unuan aferon, kien ŝia infano malfermu okulojn, ĝi estu ŝi, kaj el ŝia vizaĝo figuriĝu la ĝia.

La picco, la dolĉeco, la singardemo, la modesteco, la bonscio, kune kun ĉiuj ceteraj bonoj, kiujn ni donis al ŝi, ne nur ŝi ilin transdonu per lakto en korpon de la infano, sed ankaŭ ŝi komencu ilin fiksi en ĝian malfortan animon, per siaj okuloj kaj per siaj mienoj: kaj ŝi ŝatu kaj deziru, ke ŝiaj filoj estu tute ŝiaj, kaj ne metu sian kutimon naski multajn filojn, sed mamnutri malmultajn bonajn; ĉar la tiaj per siaj agoj ŝin laŭdos ĉiam, kaj multafoje per vortoj, dirante tion, kio sekvas.

## XIX

**Kiajn laŭdojn meritas perfekta edzino, kaj kiel, por tio esti, estas necese, ke ŝi estu ornamita de multaj perfektecoj.**

*Multaj filinoj kunigis riĉaĵojn, sed vi plialtigis super ĉiujn (1).*

Filinoj nomas hebreo kiujn ajn virinojn.

Riĉaĵoj ni devas kompreni, ne nur la bienojn de la havo, sed ankaŭ tiujn de la animo, kiel estas la kuraĝo,

(1) Prov., ĉap. XXXI.<sup>a</sup>, ver. 29.<sup>a</sup>

la fortikeco, la lerteco, la plenumado de nia ofico, kun ĉio cetera, kio apartenas al perfekteco de tiu ĉi virto, aŭ, por tion diri pli mallonge, riĉaĵoj tie ĉi esprimas tiun ĉi geedzan virton metitan en ĝian perfektecon.

Kaj diras Salomon'o, ke gefiloj el perfekta edzino, laŭdante ŝin, ŝin altigas super ĉiujn, kaj ili diras, ke el la bonaj, ŝi estas la plej bona, kaj jen diras aŭ skribas Salomon'o, ke ili tion diros laŭ kutimo el tiuj, kiuj laŭdas, en kiu estas ordinare, meti ekster ĉiun komparon ĉion, kio estas laŭdata, kaj plie, kiam ĉe tiuj, kiuj laŭdas, kuniĝas al prudento la ŝato.

Kaj vere, ĉio, kio estas perfekta en sia klaso, havas tion ĉi, ke se ni ĝin rigardas atente, tiel ŝveligas la vidon de tiu, kiu ĝin rigardas, ke ne permesas al ĝi pensi, ke estas io egala. Aŭ ni tion diru alimaniere, kaj estas, ke oni ne faras la komparon kun aliaj edzinoj kiuj estis perfektaj, sed kun aliaj kiuj ŝajnis voli esti tiaj.

Kaj tion ĉi tre bone alĝustiĝas, ĉar tiu ĉi virino, kiun tie ĉi oni laŭdas, ne estas iu aparta, kiu estis tiel, kiel tie ĉi oni diras, sed estas modelo kaj kvazaŭ komuna ideo, kiu enhavas ĉiun tiun ĉi bonon, kaj ŝi ne estas unu perfekta, sed ĉiuj perfektaj, aŭ por pli bone diri, tiu mem perfekteco; kaj tiel, oni ne ŝin komparas kun alia perfekteco de ŝia klaso, ĉar ne estas alia, kaj en ŝi estas ĉio, sed oni ŝin komparas kun aliaj kvalitoj, kiuj vojiras al ŝi kaj ne alvenas al ŝi, kaj kiuj en ŝajno estas tiu ĉi bono, sed ne en la karatoj.

Ĉar ĉiun virto sekvas kaj imitas alia kiu ne estas ĝi nek estas virto; kiel maltimo ŝajnas fortikeco kaj ne estas tio, kaj malŝparemulo ne estas liberalulo, kvankam li tion ŝajnas.

Kaj sammaniere estas edzinoj kiuj volas sin montri ĝustaj kaj perfektaj en sia ofico; kaj tiu, kiu ne atentis, bone kredas, ke ili tiaj estas, kaj vere ili ne trafas; kaj tio ĉi laŭ malsamaj manieroj; ĉar unuj, se ili estas hejmemaj, ili ankaŭ estas avaraj; aliaj, kiuj maldormas pri

gardo de la havo, en cetero malatentas; unuj edukas la gefilojn kaj ne ŝatas pri servantaro; aliaj ŝategas kaj dorlotas familion, kaj kun ĝi formas bandon kontraŭ la edzo. Kaj ĉar ili ĉiuj havas iom el tiu ĉi perfekteco, pri kiu ni raportas, ŝajnas, ke ili plene ĝin havas, kaj efektive ili mankas pri ĝi, ĉar ĝi ne estas afero kiu oni vendas po partoj.

Kaj eĉ estas iuj, kiuj penas pri ĉio, sed ne penas pri tio pro prudento, sed pro inklino aŭ pro kaprico; kaj tiel, ili estas ŝanĝanimaj, kaj ne konservas ĉiam unu ordon, nek ili havas veran virton, kvankam ili multe similas al boneco, ĉar tiu ĉi virto, kiel ceteraj, ne estas kreskaĵo, kiu produktiĝas en kiu ajn tero, nek estas frukto el ĉiu arbo, sed ĝi postulas sian propran trunkon kaj radikon, kaj ĝi ne elvenas nek fluas, se ne estas el unu fonto kiu estas tiu, kiun oni elmontras en tio, kio sekvas.

## XX

**Kiel virino, kiu estas bona, devas zorgi sin purigadadi kaj aranĝadi por tiel montri sian animon ordigitan kaj aranĝitan, kiun ŝi devas precipe ornami per sankta timo al Dio.**

*Trompo estas la bona spriteco, kaj moko la beleco; virino kiu timas Dion, tiu estas laŭdinda (1).*

Li metas belecon de bona virino, ne pri vizaĝaj trajtoj, sed pri sekretaj virtoj el animo, kiuj ĉiuj enhaviĝas en la Skribo sub tio ĉi, kion ni nomas timi Dion.

Sed kvankam tiu ĉi timo al Dio, kiu beligas virinan animon kiel precipa beleco, oni devas serĉi kaj estimi en ŝi, ne mankas demando pri tio, kion pri korpa beleco

(1) Prov., ĉap. XXXI.<sup>a</sup>, ver. 30.<sup>a</sup>

diras tie ĉi la Saĝulo, kiam diras, ke ĝi estas vana kaj ke ĝi estas moko; ĉar iuj dubas ĉu estas taŭge al bona virino esti bela kaj belkreska. Kvankam vere, tiu ĉi dubo ne rilatas tiel rekte al tio, al kio estas devigitaj perfektaj edzinoj, kiel al tio, kion devas serĉi kaj elekti edzoj kiuj deziras esti bone edzigitaj.

Ĉar se virino estas bela aŭ malbela, tio estas kvalito kun kiu oni naskiĝas, kaj ne afero kiun oni akiras per propra volo, nek pri kiu oni povas doni leĝon nek ordonon al bonaj virinoj.

Sed kiel beleco konsistas en du aferoj: unu, kiun ni nomas bona proporcio ĉe figuroj, kaj alia, kiu estas pureco kaj aranĝo, ĉar sen tio pureco estas nenio bela; kvankam vere, neniu ne estante bela, ŝi povas sin figuri bela, eĉ se ŝi tion klopodas, kiel oni ĝin vidas en tio, ke multaj tion klopodas kaj en tio, ke neniu el ili sukcesas: sed pri tio, kio rilatas al aranĝo kaj pureco, tiu ĉi estas afero kies pligranda parto estas komisiita al ilia zorgo kaj volonto; kaj kvalita afero, kiu kvankam ne estas el virtoj kiuj ornamas animon, estas frukto el ĝi kaj granda montro de pureco kaj bona ordigo kiu estas en animo, estas korpo purigita kaj bone aranĝita. Ĉar tiel, kiel lumo enfermita en lanterno ĝin lumigas kaj trapasas kaj sin malkovras tra ĝi, tiel animo klara kaj kun brila virto, pro la multa frateco kiun ĝi havas kun sia korpo, kaj ĉar ĝi estas intime unuigita kun ĝi, ĝin lumigas kaj al ĝi donas figuron kaj kunmetas ĝin, kiom eble, laŭ sia sama kunmeto kaj figuro. Tiel, se ne estas anima virto la pureco kaj aranĝo de la korpo, ĝi estas signo de animo ordigita kaj purigita kaj aranĝita. Almenaŭ ĝi estas necesa zorgo ĉe virino, por ke ŝi konserviĝu kaj pliiĝu la amo de ŝia edzo al ŝi, se ja li ne estas tia, ke li sin raviĝas kaj sin malvirtigas en la koto.

Ĉar, kian vivon havos tiu, kiu estas trovonta apud si ĉiam en manĝotablo kie li sidiĝas por ĝui, kaj en lito kiun oni ordonas por senlacigo kaj ripozo, malaranĝon



kaj naŭzon kiun oni ne povas vidi sen deflankigo de okulojn, nek tuŝi ne ŝtopinte la nazojn? Aŭ kiel eble, ke oni trudu la koron al tio, kion nature ĝi malamas, kaj el kio forkuradas la sento?

Estos sendube al edzo, ĉiama kaj malmola brido la malpuriĝo de lia edzino, kiu ĉiufoje kiam li klinas aŭ volas klini sian animon al ŝi, lin haltigos kaj lin apartigos, kaj kvazaŭ deflankigos al alia loko. Kaj tio ĉi ne estos nur kiam li vidas ŝin, sed ĉiufoje kiam li eniros hejmen, kvankam li ne vidas ŝin. Ĉar domo kaj ĝia pureco, nepre odoros laŭ virino al kies zorgo estas ĝia aranĝo kaj purigo, kaj kiom ŝi estos aranĝita aŭ malaranĝita, tiom domo kiel manĝaĵoj kaj lito estos puraj aŭ malpuraj.

Tiel do, pri tio, kion ni nomas beleco, la unua parto, kio konsistas en tio esti virino aranĝema kaj purema, estas afero, kiu esti tia, dependas nur de volo de virino kiu volas tia esti, kaj afero kiu konvenas al ĉiu ĝin deziri, kaj kiu apartenas al perfekteco pri kiu ni parolas, kaj ĝin kunmetas kaj beligas kiel ĝiaj ceteraj partoj. Sed la alia parto, kiu konsistas en bonaj koloroj kaj trajtoj, nek estas en mano de virino ĝin havi, kaj tiel tio ne apartenas al tiu ĉi virto, nek eble konvenas al tiu, kiu edziĝas serĉi virinon kiu estas superega pri beleco; ĉar, kvankam beleco estas bona, tiuj havas tre pretan okazon ne esti bonaj, kiuj estas tre belaj.

Bone diris pri tio la poeto Simonido (1).

Bela afero estas vidi belvirinon.  
Bela por la aliaj; ĉar al edzo  
Estas kara domaĝo kaj malfeliĉo.

Car tion, kion multaj deziras, oni devas gardi de multaj, kaj tiel estas al tio pli granda danĝero, kaj ĉiuj ŝatas bonŝajnon.

(1) Apud Stobeam, serm. LXXIII.<sup>a</sup>

Kaj estas gravega malhelpo, ke ĉe geedza vivo, kiu estis ordigita por ke ambaŭ partoj helpu ĉiu el ili, kaj sin senzorgigu, parte, per akompano de sia najbara, oni elektu tian akompanantinon, kiu necese devigu vivi kun timemo kaj zorgo; kaj, ke serĉante virinon por ne atenti pri sia domo, la viro prenu tia, ke ŝi lin turmentu per suspekto ĉiuhore kiam li ne estas en domo.

Kaj, ne nur tiu ĉi beleco estas danĝera, ĉar ĝi altiras al si kaj ekbruligas avidecon ĉe koroj de tiuj, kiuj ŝin vidas, sed ankaŭ ĉar vekas ĉiujn, kiuj estas belaj, al tio, ke ili ŝatu esti aviditaj; ĉar se ĉiuj ĝenerale ŝatas bone ŝajni kaj esti viditaj, estas certe, ke tiuj, kiuj tiaj ŝajnas, ne volos vivi kaŝitaj; plie, ke al ni ĉiuj estas nature aminiajn aferojn, kaj samkaŭze deziri, ke ili estu taksitaj kaj estimitaj, kaj estas signo, ke virino estas taksita, kiam multaj ŝin deziras kaj amas; kaj tiel, tiuj, kiuj sin kredas belaj, por kredi, ke ili estas tiaj, ili volas, ke tion atestu la ŝatoj de multaj.

Kaj se oni diros veron, ne estas, ja, honestaj tiuj, kiuj ĝuas esti rigardataj kaj delogataj malhoneste.

Tiel, do, kiu serĉis tre belan virinon, tiu vojiras kun oro en lando plena je rabistoj, kaj kun oro kiu ne konsentas esti en sako, sed kiu mem eliras kaj sin metas antaŭ okuloj de la rabistoj, kaj ke eĉ se ĝi ne kaŭzus alian pligrandan malutilon kaj zorgon, nur ĉe tio ĉi ŝi faras, ke edzo sin konsideru tre insultita, se li havas prudenton kaj valoron; ĉar ĉe simila virino, okazo kiu estas por ke ŝi ne estu bona, pro avidateco de multaj, tiu mem faras ĉe multaj, grandan suspekton pri tio, ke ŝi ne estas tia; kaj tiu ĉi suspekto sufiĉas por ke ŝia honoro estu fame difektita kaj perdita.

Kaj se tiu ĉi bono de beleco havus ian gravecon, povus pro ĝi sin meti la homoj ĉe tiu ĉi risko: sed, kiu ne scias tion, kio valoras, kaj tion, kio daŭras tiu ĉi floro, kiom rapide ĝi finiĝas, per kiaj senpripensaj okazoj ĝi

velkas, al kiaj danĝeroj ĝi estas ligita, kaj la pensiojn kiuj ĝi pagas?

«*Ĉiu karno estas fojno, diras la Profeto (1), kaj ĉiu ĝia gloro, kiu estas ĝia tuta beleco kaj ĝia brilo, estas kiel fojna floro.*»

Do, bone estu, se pro malgrava kaj momenta gusto de la okuloj volus saĝa homo maldolĉigi la staton ĉe kiu li estas persistonta kiom vivo persistos ĉe li: kaj, se por ke lia najbaro plaĉe rigardu lian virinon, li mortus vundita je morta malkontento, kaj, li negocus, per siaj propraj bedaŭroj, la malproprajn plezurojn.

Kaj se tio ĉi ne sufiĉas, estu al li puno lia kulpo, kiu mem lin turmentos; tiel do, kvankam li pentos iam, kaj multajn tagojn li konos senprofite sian eraron, kaj li ĝin malaprobos, li diru kvankam malfrue, tion, kion tie ĉi diras la Sankta Spiritu pri tiu ĉi perfekta modelo de virinoj:

«*Trompo estas la bona spriteco, kaj ŝerco la beleco; virino kiu timas Dion, tiu estas laŭdota.*»

Ĉar oni devas kompreni, ke tiu ĉi estas la fonto de ĉio, kio estas vera virto, kaj la radikoj el kie estas naskita ĉion, kio estas bona, kaj tio, kio nur povas fari kaj faras, ke ĉiu plenumu tute kaj perfekte tion, kion al li devigas, la timo kaj respekto al Dio, kaj atenti Lian leĝon; kaj tio, kio en tiu ĉi ne fondiĝas, neniam alvenas al supergrado: kaj kvankam bone ĝi ŝajnas, ĝi glaciĝas en floriĝo.

Kaj ni komprenas kiel timon al Dio, laŭ stilo de la Sankta Skribo, ne nur la amo pri la timo, sed sin okupi volonte kaj per agoj en la plenumo de Liaj ordonoj, kaj je tio, kion, per unu vorto, ni nomas Dia servo.

Kaj Salomon'o elmontras ĉe la fino tiun ĉi radikojn, ne ĉar ĝia zorgo devas esti la lasta, ĉar antaŭe, kiel ni

(1) Isaia, ĉap. XI.<sup>a</sup>, ver. 6.<sup>a</sup>

diras, la komenco de ĉiu tiu ĉi bono estas ĝi; sed tio unue, ĉar timi Dion kaj gardi zorge Lian leĝon ne estas pli propra el edzino ol el ĉiuj homoj. Al ĉiuj konvenas en tiu ĉi afero ĉiuj zorgoj de nia volo kaj ŝato, ĉar sen ĝi neniu povas plenumi, nek la ĝeneralajn devojn de kristano, nek la apartajn de sia ofico. Kaj due, li diras ĉe la fino por tion lasi pli firme en la memoro, kaj por komprenigi, ke tiun ĉi Dian zorgon oni devas kredi ne nur unua, sed ankaŭ lasta; mi volas diri, ke ŝi komencu, kaj duonigu, kaj finu siajn ĉiujn aferojn, kaj ĉion tion al kio ŝin devigas ŝia stato, el Dio, kaj en Dio, kaj por Dio; kaj, ke ŝi faru tion, kio decas, ne nur per fortoj, kiujn Dio al ŝi donas por tio, sed laste kaj precipe por plaĉi al Dio, kiu ilin donas al ŝi.

Tiel do, la celtabulo kien ŝi devas celrigardi en ĉio, kion ŝi faras, decas esti Dio, tiel por peti de Li favoron kaj helpo pri tio, kion ŝi faros, kiel por fari tion, kio ŝi devas nur al Li: ĉar tio, kion oni faras kaj ne por Li, ne estas tute bona, kaj tio, kion oni faras sen Li, kiel afero el nia prudento, estas tre malmulte valora.

Kaj tio ĉi estas certa, ke tiel granda entrepreno kaj kien kunvenas tiel diversaj kaj malhelpaj devoj, kiel estas, ke plenumu edzino sian staton, neniam oni faris, eĉ meze, sen tio, ke Dio provizu sufiĉegan favoron.

Kaj tiel, Dia timo kaj servo devas esti en ŝi la ĉefa kaj unua, ne nur ĉar estis al ŝi ordonita, sed ankaŭ ĉar estas al ŝi necese; ĉar tiuj, kiuj ne sekvas tiun ĉi vojon, ĉiam perdiĝas, kaj krom esti malbonaj kristaninoj, laŭ edzinaj leĝoj neniam ili estas bonaj, kiel oni vidas ĉiutage. Unuj penas pro timo al edzo, kaj tiel, ili nur faras bone tion, kion li vidos kaj komprenos. Aliaj, kiuj laboras, car ili lin amas kaj volas al li plaĉi, tuj kiam amo malvarmiĝas, ili forlasas la laboron. Tiuj, kiujn instigas avareco, ne estas hejmemaj, sed malsufiĉemaj, kaj pli ol malsufiĉemaj, mankohavaj pro sama kaŭzo pri aliaj virtoj, el tiuj, kiuj apartenas al ilia ofico, kaj tiel, pro unu

elmontro de bono, ili havas neniun. Aliaj, kiuj kliniĝas pro honoro kaj amas ŝajni bonaj, por esti honoritaj plenumas tion, kio ŝajnas, sed ne tion, kio estas, kaj neniu el ili trafas tion, kion ili pretendas, nek ili havas unu opinion pri tio, kion ili faras, sed kun la tagoj ili ŝanĝas intencojn kaj ŝajnojn, ĉar ili vojiras, aŭ sen gvido, aŭ kun malbona gvido, kaj tiel, kvankam ili laboras, ilia laboro estas vana kaj senfrukta.

Sed kontraŭe tiuj, kiuj sin helpas per Dio, kaj direktas siajn agojn kaj laboroj al Dio, plenumas tutan sian oficon, ĉar Dio volas, ke ili tion tute plenumu, kaj ili ĝin plenumas, ne ŝajne, sed vere, ĉar Dio ne sin trompas; kaj ili trairas sian laboron ĝuste kaj rave, ĉar Dio al ili donas fortojn, kaj ili persistas en ĝi, ĉar Dio persistas; kaj ili ĉiam estas ne ŝanĝeblaj, ĉar tiu, kiu ilin kuraĝigas estas Li mem; kaj ili vojiras sen eraro, ĉar ne estas eraro en sia Gvidanto; kaj ili pligrandiĝas en la vojo kaj trapasadas antaŭen, kaj per malmulte da intertempo trapasas longajn interspacojn, ĉar ilia ago havas ĉiujn bonajn kvalitojn kaj kondiĉojn de la virto; kaj fine ili estas tiuj, kiuj trafas la prezon kaj la premion; ĉar tiu kiu ĝin donas estas Dio, kiun ili ĉe sia ofico atentis kaj servas; kaj la premio estas tiu, kiu Salomon'o finigante ĉiun tiun ĉi doktrinon, metas en tio, kio sekvas.

## XXI

**Pri la premio kaj pago, kiun Dio tenas pretigita por perfekta edzino, ne nur en alia vivo, sed eĉ en tiu ĉi mondo.**

*Vi donu al ŝi el la frukto de ŝiaj manoj, kaj laŭdu ŝin en placoj ŝiaj agoj (1).*

La fruktojn de la virto, kiuj kaj kiaj ili estas, Sankta Paŭlo notas en letero, kiun li skribis al galatanoj dirante (2): «*La fruktoj de la Sankta Spirito estas amo kaj ĝojo, kaj paco kaj sufero, kaj malavareco, kaj boneco, kaj longa espero kaj delikateco, kaj fido kaj modesteco, kaj sobreco kaj pureco.*» Kaj al tiu ĉi riĉa aro da bonoj, kiu per si mem ŝajnus sufiĉa, aldoniĝas, aŭ sekvas, alia pli bona frukto, kiu estas ĝoji Dion dum eterna vivo.

Ĉar tiuj ĉi fruktoj estas tiuj, kiujn tie ĉi la Sankta Spirito volas kaj ordonas kiujn oni donu al la bona virino, kaj tiuj, kiujn Li nomas fruktoj el ŝiaj manoj, tio estas, el ŝiaj agoj. Ĉar, kvankam ĉio estas Lia dono kaj la efiko kaj la pago de la bona ago, sed pro Lia senfina boneco Li volas, ke ĉar ni obeis Lin kaj ni submetis nin al Lia ekimpulso, oni nomu kaj estu frukto de niaj manoj kaj lerteco tio, kio precipe estas dono el Lia liberaleco kaj donemeco. Vidu, do, nun la virinoj kiom bonajn manojn havas la bonaj, kiom estas riĉaj la laboroj, kiujn ili faras, kaj kiom grandprofitaj.

Kaj ili ne nur el ili eltiras profiton, sed ankaŭ honoron, kvankam oni kutimas diri, ke tio ne estas ebla. La profito estas bonoj kaj riĉaĵoj el la ĉielo, honoro estas aparta laŭdo en la mondo.

(1) Prov., ĉap. XXXI.<sup>a</sup>, ver. 31.<sup>a</sup>

(2) Prov., ĉap. V.<sup>a</sup>, ver. 22.<sup>a</sup>, 23.<sup>a</sup>

Kaj tiel Li aldonas: «*Kaj laŭdu ŝin en placoj ŝiaj agoj;*» ĉar se Dio ordonas, ke oni ŝin laŭdu, ĝi estas certigi, ke oni ŝin laŭdos; ĉar, kion Li ordonas, tion oni faras, kaj tial, ke laŭdo sekvas kiel ombro virton, kaj oni ŝuldas nur al ĝi. Kaj Li diras «*En placoj,*» ĉar ne nur sekrete kaj aparte, sed ankaŭ publike kaj ĝenerale bruos laŭdoj al ŝi, kiel laŭvorte okazas.

Car, kvankam ĉio kie brilas ia bono estas rigardita kaj taksita, neniu bono tiom trafas la homajn okulojn, nek kaŭzas ĉe homaj brustoj tiel grandan plezuron, kiel perfekta virino; nek estas alia afero pri kiu, nek per tiom da gajeco, nek per tiel trolaŭdantaj vortoj, homoj malfermas buŝojn, aŭ kiam ili traktas solaj, kun si mem, aŭ kiam ili parolas kun aliaj, ĉu interne de siaj domoj, ĉu en placoj publike. Ĉar unuj laŭdas hejmemecon, aliaj trolaŭdas diskretecon, aliaj altigas al ĉielo, la modestecon, la purecon, la piecon, la dolĉan kaj honestan delikatecon. Ili diras pri pura vizaĝo, pri aranĝita vesto, pri laboroj kaj pri maldormoj. La servantinoj provizitaj, rakontas pri plibonigo de la havo, la amika kaj paca intertrakto kun najbarinoj; ili ne forgesas ŝiajn almozojn, ripetas, kiel ŝi amis, kaj kiel ŝi allogis sian edzon; ili trolaŭdas la edukadon de la filoj, kaj la bonan trakton por ŝia servantaro; ŝiajn faktojn, ŝiajn diraĵojn, ili laŭdas. Ili diras, ke ŝi estis Sankta por Dio, kaj feliĉega por sia edzo; ili benas pro ŝi ŝian domon kaj altrangigas ŝian parencon, kaj eĉ tiujn, kiuj meritis ŝin vidi kaj al ŝi paroli ili nomas feliĉaj; kaj, kiel la Sanktan Judit'on (1), ili nomas gloro de sia idaro kaj krono de tuta ŝia popolo; kaj se eĉ multe ili diris, ili ĉiam trovas ion pli por diri.

Genajbaroj tion diras al geeksteruloj, kaj gepatroj per tiu ĉi doktrino instruas siajn gefilojn, kaj el gefiloj transiras al genepoj, kaj ĉie vastiĝas la famo kreskante, kaj pasas per klara kaj eterna voĉo ŝia memoro el unuj

(1) Judith, ĉap. 15.<sup>a</sup>, ver. 10.<sup>a</sup>

al aliaj generacioj, kaj ne ĝin difektas la jaroj, nek pro tempo ĝi maljuniĝas, pli bone per la tagoj ĝi pli floras; ĉar ĝi havas sian radikon apud akvoj, kaj tiel, ne eble ke ĝi defalu, nek malpli povas okazi, ke pro aĝo falu konstruaĵo kiu estas fondita en la ĉielo, nek iamaniere estas eble, ke mortu laŭdo de tiu, kies ŝia tuta vivo nur estis ĉiama laŭdado pri boneco kaj majesteco de Dio, al kiu nur oni ŝuldas eterne laŭdegon kaj gloron. Amen.

FINO





## TABELO DE LA ENHAVO

---

	Paĝo.
Biografio de monaĥo Ludoviko de Leon. . . . .	I
Al Sia Moŝto Sinjorino Mario Valera Osorio.— <i>Enkonduko.</i> . . . . .	I
§ I.—Kelkaj avertoj de la aŭtoro por eniri en la traktadon de la afero. . . . .	13
§ II.—Kiom multe estas bezone, por ke virino estu perfekta, kaj kiom multe devas tion ĉi peni tiu, kiu estas edzino. . . . .	15
§ III.—Kian konfidon bona virino devas naski en la brusto de sia edzo, kaj kiel koncernas al edzin- ofico la konservado de la bieno, kio konsistas en ŝia neelspezemeco. . . . .	20
§ IV.—Pri la devo, kiun havas la geedzoj, sin ami kaj sin helpi reciproke. . . . .	30
§ V.—Kial la Sankta Spirito uzas terkulturistan virinon por modelo de la perfektaj edzinoj; kaj, kiel ili, ĉiuj, eĉ estante plej riĉaj kaj noblaj, devas labori kaj esti laboremaj. . . . .	35
§ VI.—Oni elmontras kio estas hejmema virino kaj kiamaniere ŝi devas pligrandigi la bienon. . . . .	43
§ VII.—Oni trograndigas la edzindevon frumateni, kaj oni konvinkas pri tio, per bclega priskribo de la ravoj, kiujn kutimas alporti kun si la mateno. Oni avizas ankaŭ, ke la fruleviĝo el la lito, devas esti por aranĝi la geservantojn kaj provizi la familion. . . . .	45
§ VIII.—Perfekta edzino, ne nur devas zorgi provizi sian domon kaj konservi tion, kion edzo akiras, sed ŝi devas, ankaŭ, pligrandigi la havon. . . . .	52

§ IX.—Kiom bona virino devas eviti senokupecon, kaj pri malvirtoj kaj malbonaj rezultatoj kiuj el ĝi devenas. . . . .	54
§ X.—La perfekta edzino devas esti bonkora por malriĉuloj kaj bezonuloj; sed ŝi devas zorge vidi, kiun ŝi akceptas domen kaj kiun ŝi favoras. . . . .	58
§ XI.—Pri bona trakto kaj kvieta karaktero, per kiu devas konduiti sinjorinoj kun siaj helpantinoj kaj servantinoj. . . . .	64
§ XII.—La vestoj kaj vestmaniero de perfekta edzino devas esti konforma al tio, kion petas honesteco kaj prudenteco. Oni mallaŭdas uzi ŝmirajojn, kaj oni malaprobas belvestojn kaj ornamojn, ne nur per kialoj prenitaj el naturo mem de la aferoj, sed ankaŭ per diroj kaj sentencoj de la patroj de la Eklezio kaj aŭtoritatoj de la Sankta Skribo. . . . .	67
§ XIII.—Bona virino devas esti feliĉo, gloro, feliĉa sorto kaj beno de sia edzo. . . . .	98
§ XIV.—Lerteco kaj zorgo ĉe bona edzino devas trafi, ne nur tion, kio sufiĉas al ŝia domo, sed ankaŭ tion, kio malmankas. . . . .	100
§ XV.—Pri modereco kaj mezeco kiun devas plenumi perfekta virino en sia kondiĉo kaj trakto. . . . .	100
§ XVI.—Kiom estas grave, ke virinoj ne multe parolu, kaj, ke ili estu afablaj kaj dolĉekondiĉaj. . . . .	102
§ XVII.—Ne devas esti virinoj stratamemaj, vizitemaj kaj vagiremaj, sed ili multe devas ami rifuĝon kaj sin kutimi resti dome. . . . .	107
§ XVIII.—Kiel apartenas al ofico de perfekta virino fari bona la edzon, kaj pri la devo kiun havas tiu, kiu estas patrino, mamnutri per si mem la gefilojn. . . . .	110
§ XIX.—Kiajn laŭdojn meritas perfekta edzino, kaj kiel, por tio esti, estas necese, ke ŝi estu ornamita de mutaj perfektecoj. . . . .	118
§ XX.—Kiel virino, kiu estas bona, devas zorgi sin purigadadi kaj aranĝadi por tiel montri sian animon ordigitan kaj aranĝitan, kiun ŝi devas precipe ornami per sankta timo al Dio. . . . .	120
§ XXI.—Pri la premio kaj pago, kiun Dio tenas pretigita por perfekta edzino, ne nur en alia vivo, sed eĉ en tiu ĉi mondo. . . . .	127

## RIMARKITAJ ERAROJ

Oni montras:

La *paĝojn* per la dikaj numeroj.

La *liniojn* per la ceteraj numeroj.

La *erarojn*, inter krampoj.

La *korektaĵojn*, ekster krampoj.

2, 9 (profundan amon) profunda amo—11 (liberu) liveru

3, 17 (sia) Lia—18 (dirante. *Ne*) dirante: *Ne*—20 (estis) esti

4, 1 (preni viro virinon) preni virinon

5, 1 (kutimigas) kutimas

6, 6 (kiun ĝi) kiu ĝin

7, 29 (monanejo) monaĥejo—32 (kiu) kies

8, 1 (kulpigas) kulpigas—7 (ke) kiel

9, 10 (devigita) devigata

10, 9 (malfelico) malfeliĉo—17 (la unu kaj la alian instruas al ni) pri la unua kaj pri la dua instruas nin—18 (diras) Li diras—32 (diras) Li diras

12, 8 (tio) tion—11 (el) de—14 (ne) ĝi ne

13, 4 (ĉio) ĉion—9 (silenti) silentiĝi

14, 1 (Car) Ĉar—11 (Maniere) Tiamaniere

15, 14 (malfacila) malfacile

16, 18 (tio) tion—20 (edzidojn) edzinojn

17, 16 (respondas) respondu—19 (materio, kaj, kiu) materio, kiu

18, 1 (Car) Ĉar—10 (Maniere) Tiamaniere—11 (al la bona virino, ne nomis ŝin iel) la bonan virinon ne nomis iel—13 (nomis) Li nomis—13 (valoran virinon) valora virino—28 (eldiras) Li eldiras—35 (bonest-) bonesti-

19, 1 (multekosiaj) multekostaj—12 (sürmetas) surmetas—18 (havinte) havante—20 (he) ke

20, 4 (servadon) servado—6 (Al ŝi konfidas la koron de ŝia edzo, senigoj ne senkreditigos lin) *Al ŝi*

*konfidas la koron de ŝia edzo, senigoj ne senkreditigos lin*—9 (ŝatis) ŝatigis

21, 17 (pri kio) kies

22, 5 (al) por—15 (sinturnus) sin turnus—19 (agetojn) agetojn—28 (pritakti) pritrakti—33 (senigojn,) senigoj

23, 24 (kio per) kion per, 32 (provizumita kaj riĉa) provizumita kaj riĉa

24, 5 (Car) Ĉar—11 (estas tiel kvazaŭ) estas kvazaŭ—21 (kiun) kiu

25, 6 (malpi) malpli—16 (ilian estimon, tiuj) sian estimon tiuj—21 (kio) kion—31 (vivo; kaj laborado,) vivo kaj laboradi—35 (kio) kion—36 (ne ŝanĝiĝo) neŝanĝiĝo—36 (konstata) konstanta

26, 1 (ĝiaj) siaj—25 (ĝiu) ĝin

27, 8 (virinoj) virinojn—24 (moderatoj) moderataj—30 (ĝi) ĝi ĝin—30 (ŝia, elspeco nur unu taga) ŝia elspeco nur unutaga—33 (multaj malmultaĵoj) multaj malmultaĵoj

28, 2 (pasión) pasion—8 (sin je vidigante) sin vidigante—32 (uileco) utileco

29, 12 (al mi) min

30, 24 (maltrankvilecojn) maltrankvilecon

32 17 (kion) kio—19 (forlosos) forlasos—25 (edzimon) edzinon

33, 8 (ĉirkaŭias) ĉirkaŭas—20 (kuraĝa koro,) kuraĝan koron—29 (malkuraĝigas) malkuraĝigas

36, 7 (ĉiuj vivmanieroj eblaj) ĉiujn vivmanierojn eblajn—15 (nomo) nomon

38, 26 (edziniĝitan) edziniĝintan

40, 8 (ŝtofo) ŝtofon—9 (ŝia teksado kaj malteksado) sian teksadon kaj malteksadon—26 (kiuj,) kiujn

41, 7 (laboraĵojn) laboraĵoj

43, 2 (kia maniere) kiamaniere—7 (provizon) provizo

45, 15 (helpaŝtistoj) helpaŝtistoj

46, 12 (helpaŝtistoj) helpaŝtistoj

49, 13 (kiu) kiun

50, 12 (dolce) dolĉe

51, 11 (kiu la Sankta Spiritu) kiun la Sankta Spirito—13 (ordonis tio unue) ordonis unue—14 (edzinon) edzino—31 (ordigi) ordigas

52, 9 (kiom) kion—11 (oficoj) oficojn

53, 4 (esti sed granda) esti granda—5 (ceteroj) ceteraj—19 (fierigiĝu) fieriĝu—23 (havon) havo

54, 17 (*nokten*) *nokte*

55, 12 (edzinita) edzinigita—28 (tio) tion—29 (men) mem—31 (diras pro tiel) diras tiel

- 56, 2 (humiligegiĝas) humilegiĝas—17 (men kvazaŭvirinigas) mem kvazaŭvirinigas
- 58, 17 (fojojn) fojojn—27 (multo) multe
- 59, 5 (multa) multe
- 60, 14 (bieran disdonon) bona disdono
- 61, 20 (dekonoj) dekonojn—31 (akceptas) akceptas
- 64, 16 (ŝiajn) ŝiajn
- 65, 7 (siajn) iliajn—7 (sammetala) sammetalaj—12 (servi) servos—27 (nenion) nenio
- 66, 3 (plenajn) plenajn
- 68, 1 (eksceson) eksceso—2 (negliĝon kaj malbonan purigon) negliĝo kaj malbona purigo—27 (tiu) tio—28 (sengardemo) singardemo
- 69, 7 (ĝian) sian—21 (malamikinojn) malamikinojn—25 (naŭzaj kaj malbelaj) naŭzaj kaj malbelaj
- 70, 1 (Ĉar) Ĉar—9 (vitrobotelojn) vitrobotelojn—10 (ĝiajn ceterajn juvelojn) ĝiaj ceteraj juveloj—25 (sajni) sajn—34 (verdenegran) verdnigra
- 72, 7 (malamitaj) malamitaj
- 73, 11 (Ĉar) Ĉar
- 75, 12 (vizaĝohaŭto) vizaĝohaŭto
- 76, 6 (rifirmi) reformi—15 (farmita) formita—29 (*malpresa*) malpresa
- 77, 7 (ilin) al ili—33 (homoj) al homoj
- 78, 10 (sin) al si
- 79, 1 (gardito) gardito—9 (antikvan) antikva
- 80, 14 (*intencas*) intencas
- 81, 2 (vortoj) vortojn—11 (malhaladzeco) haladzeco
- 82, 1 (Cu) Cu
- 83, 24 (malbelecon) malbeleco—34 (siajn vizaĝojn) siajn vizaĝojn
- 84, 3 (estu) estus—25 (bonoj) bonojn
- 85, 3 (ŝia) sia—3 (liverigo) liberigo—5 (, dirita) dirita, —24 (ue) ne
- 86, 20 (ŝmiraj) ŝmiras
- 87, 4 (kristo) Kristo—7 (vin) al vi)—30 (ekcepte) ekcepte
- 89, 2 (kvazaŭ) kvazaŭ—23 (Cu) Cu
- 90, 1 (deziri) deziro—26 (alieigas) aliigas
- 91, 19 (sendanĝero) sen danĝero
- 92, 6 (prezon) prezo
- 93, 19 (al) la—27 (Neniu motivo) neniu motivo
- 94, 5 (edifio) edifio
- 95, 14 (perfektecon) perfekteco—24 (kio) kion
- 96, 16 (kutimita) kutiminta—30 (tio) tion

- 104**, 17 (kiu) kiun li  
**106**, 6 (dimancan) dimanĉa—6 (semajnojn) semajnoj  
 —7 (monatojn) monatoj  
**107**, 24 (ŝin) al ŝi  
**109**, 9 (placojn kaj stratojn) placoj kaj stratoj—29  
 (fojoj) fojoj  
**110**, 12 (gefliojn) geflojn—15 (havi) se havas  
**114**, 29 (ternaĵojn) ternaĵoj—29 (kiu) kiun  
**115**, 25 (posteulon) posteulo—30 (multuj) multaj  
**116**, 19 (senheridigi) senheredigis—26 (ĉu) se  
**118**, 5 (internaĵojn) internaĵoj—10 (unuan aferon)  
 unua afero  
**119**, 13 (tiel) tiel ĝi—18 (tion) tio—28 (virto) virton  
 —31 (tion) tio  
**120**, 6 (kiu) kiun—19 (purigadadi) purigadi  
**121**, 13 (sen tio pureco) sen pureco—22 (aranĝitaj)  
 aranĝita—32 (li sin raviĝas) li raviĝas  
**122**, 17 (kiu) kiu por  
**123**, 14 (ciuj) ĉiuj  
**124**, 2 (kiuj) kiujn—16 (Spiritu) Spirito—22 (ĉion)  
 ĉio—26 (glaciĝas) glaciĝas  
**125**, 16 (decas) devas—17 (kio) kion  
**126**, 17 (sia) ŝia—23 (kiu) kiun  
**127**, 16 (kiujn) ke  
**128**, (Car) Ĉar



